


LA HISPANA



TRAGEDIA

JEF LAST





LA HISPANA TRAGEDIA



LA AÜTORO

JEF LAST

LA HISPANA TRAGEDIO

EL LA NEDERLANDA LINGVO TRADUKIS

G. J. DEGENKAMP

ILUSTRITA DE LA AŬTORO

LIBROSERVO **F**EDERACIO DE **L**ABORISTAJ **E**SPERANTISTOJ
POSTBUS 4050 - AMSTERDAM

Klarigon de neologismoj kaj tradukon de hispanaj
vortoj oni trovos sur paĝoj 183—187.



DEPOZ. v.
NED. PUBL.
K.B.

ENKONDUKO.

Nun, post kiam la okazaĵoj en Hispanio ŝanĝiĝis tragike, mi sentas bezonon aldoni mian propran opinion pri la tiulandaj okazaĵoj, kiel konkludon al la travivaĵoj kaj spertoj, el kiuj ĝi kreskis. Tio tamen metas min antaŭ malfacilan taskon.

Por paroli pri la armado kaj reformo de l'armeo, pri la kuraĝo de la kamaradoj en la tranĉeoj, pri la suferado de l'civila loĝantaro, pri la kruelaĵoj de l'malamiko, pri la bonega agado de l'registararo sur tereno kultura aŭ pri la mirigaj latentaj fortoj aktiviĝintaj en la hispana popolo, mi estas kompetenta, ĉar tion mi spertis kaj en tio mi partoprenis.

Sed koncerne la politikan situacion miaj spertoj estas negativaj. Mi timas, ke vi apenaŭ povas imagi kiel vivas izolita frontoficiro en sia pozicio, kiom malmulte li povas supervidi la militoperaciojn eĉ distance de nur kelke da kilometroj. La novaĵoj el la ekstera mondo nur gut-gute atingas lin per la cenzuritaj ĵurnaloj, kiujn li ricevas nur neregule. Krome lian opinion kompreneble influas la politika konsisto de l'armekorpuso, en kiu li devas vivi. Sian imagon pri la mondo li formas el tio, kion li, pli malpli hazardokaze, aŭdis aŭ legis; por sistema analizo mankas tempo, same kiel por vere precize kontroli la diversajn onidirojn. Pro tio mi ĝis nun limigis min en ĉio, kion mi diris kaj skribis, ekskluzive ĉe tio, kion mi mem estis vidinta.

Malgraŭ tio mi formis al mi imagan bildon pri la evoluo de l'okazaĵoj, kvankam konsciante, ke ĉi tiu imaga bildo ne prezentas kompetentan juĝon, ĉar ĝi estas ankoraŭ ĉiudetale

kontrolota. Mi ne troviĝis, kiel multaj ĵurnalistoj, en la centro de l'okazaĵoj, tie, kie oni decidas pri sorto kaj destino; la okazaĵojn mi povis vidi kiel vidas ilin ordinara homo, per la okuloj de soldato en tranĉeo, kvankam havante krom tio kelke da avantaĝoj, pri kiuj disponas ne ĉiuj. La hispanan lingvon mi legis kaj komprenis bonege kaj poste mi kapablis legi ankaŭ katalunajn ĵurnalojn. Mi vivis hejme de laboristaj familioj kun ĉiaj politikaj nuancoj, kaj en „Alianza”¹⁾ mi renkontis hispanajn artistojn kaj intelektulojn ĉiatendencajn. En Gran Via mi renkontis la eksterlandajn ĵurnalistojn. Ofte mi gastis ĉe la rusa delegacio en Gailord kaj okaze de l'kongreso de verkistoj en Madrid mi longe parolis kun multaj eminentaj literaturistoj el Sud-Ameriko kaj Eŭropo.

Tamen ne kiel intelektulo, sed unuavice kiel frontsoldato mi deziras paroli al vi. Sed antaŭ ĉio mi menciuj, ke ekzistas konsiderinde granda kontrasto inter la fronto kaj la postfronta landparto, kaj vere granda indigno regas inter la viroj en la tranĉeoj pri la politiko farata postfronte. La soldatoj havas, ĉu prave aŭ ne, la impreson, ke ĉiuj, kiuj efektive sinceras pri siaj idealoj, jam en la komencaj tagoj iris fronten, kaj ke la politikajn kontrastojn post la fronto daŭrigas kaj troigas iuj politikistoj, kiuj en konstantiĝo de tiuj ĉi kontrastoj havas personan intereson kaj la eblon ne mem esti sendata fronten. Pro la komuna vivado ĉe la fronto la iamaj politikaj kontrastoj pli kaj pli mildiĝis; restis nur la volo por la venko, kaj la ĝenerale regantan opinion de la frontsoldatoj oni povus koncize esprimi per la vortoj de Durutti: „Se necese, ni pretas perdi ĉion, escepte la militon”.

La viroj en la tranĉeoj, jen la popolo mem, la simplaj laboristoj, kamparanoj kaj etburĝoj de Hispanio. Multaj el ili apartenas al iu partio, kvankam eĉ ne konante aŭ komprenante

1) Ligo de artistoj por defendo de l'kulturo. Trad.

la programon de tiu partio. Se oni kapablas esplori post la devizoj, kiujn ili lerne kutimigis al si, oni trovas en iliaj koroj ne ekonomian aŭ politikan sistemon, sed ekskluzive diversajn justajn, ĝenerale homajn dezirojn.

Tiuj ĉi deziroj tamen kaŭziĝis, multe malpli ol oni ĝenerale kredas, el personaj ekonomiaj interesoj. Laboristo, deziranta nur loĝi kiel etburĝo, certe ne eltenus plurmonatan vivadon en la pedikoplenaj kuŝejoj de tranĉeo. Kamparano serĉanta nur por si mem pli komfortan vivon, ne pretus ĉiutage denove riski libervole tiun vivon.

Kiu deziras varbi la junularon, ekskluzive agante laŭ ĝiaj deziroj, ĝia amuzado aŭ ĝia distrado, tiu perdas la junularon, ĉar nur transante siajn interesojn, montrante kuraĝon kaj sinoferadon, la junularo povas pruvi sian valoron al si mem kaj al la cetera mondo. La malamo de tuta junularo kontraŭ „racia” pacifismo estas klarigebla el la fakto, ke la pacifistoj propagande konsideras ĝiajn timon kaj malkuraĝon. Pro tio ekzemple digna knabo ne timas propran domaĝon, ribelante kontraŭ la patro, se tiu klopodas prudente pruvi al li, ke la spicista negoco pli bone kontentigas liajn interesojn ol la artista profesio, en kiu oni devas suferi malsaton.

La proletaro tamen estas la junularo de l'homaro, ankoraŭ pruvonta sian valoron al si mem kaj al la mondo. Ĝuste en tio konsistas la diferenco inter la stahanov-laboristo proklamita kiel socialista heroo kaj la efektivaj, nekonataj socialistaj herooj en malliberejoj, koncentraj punkampoj, sur la barikadoj kaj en la tranĉeoj, ke ilia agado estas kontraŭracia en tia grado, en kia ĝi povas alporti al ili nur la malon de persona profito aŭ favoriĝo super aliaj.

Sendube la hispanaj laboristoj esperis, ke post la venko iliaj familioj ne suferos plu tiom multan malsaton, ke ili loĝos pli komforte ol antaŭe kaj ke por iliaj infanoj montriĝos pli bonaj perspektivoj en estonteco. Sed la malamo kontraŭ

la terposedanto loĝanta en palaco meze de iliaj domaĉoj, rezultas ne, kiel kredas la burĝaro, el deziro ankaŭ mem loĝi en tia palaco (rimarkindaj tiurilate estis la eldiroj de miaj kamparaj junuloj, kiam mi kondukis ilin tra la palaco de „Alianza”); pli ĝuste ĝi estas morala malamo rezultanta el ofendita sento por justo, ne povanta toleri pro la propra homa digno tian diferencegon. Ne pro tio, ke li fiekspluatis ilin, miaj kámpistoj el Jaen¹⁾ pafmortigis sian mastron, sed ĉar li obstine rifuzis iam ajn persone paroli kun ili, sed respondis al ili nur pere de sia sekretario.

Sub la politika kovraĵo la efektivaj deziroj de tiuj ĉi homoj direktiĝas nur al pli multe da amo, da libero, da justo, da kulturo kaj iomete malpli multe da malsato.

Ŝajnas al mi, ke la efektivaj deziroj de l'popolamaso, kaŝiĝantaj sub teorioj, estas nur tre modestaj kaj, per moderna utiligado de l'produktaj fortoj kaj enteraj trezoroj de la lando, efektive kontentigeblaj interne de la limoj de demokrata respubliko. La praktiko de demokratio kun politika libereco, protekta leĝaro por la laboristoj, kaj vivnivelo, kia ekzemple en Norvegio, sendube ŝajnus fabela paradizo al la granda plimulto da soldatoj nun troviĝantaj en la tranĉeoj.

Ĉi loke mi aŭdacu intermeti iom danĝeraspektan anekdoton.

Kiam ni en novembro 1936a troviĝis en la duone detruita antaŭurbo Carabanchel, mi venis iumatene en la domon, kie nia kapitano Pepe loĝis kaj super kies pordo ankoraŭ pendis enkadrigita bildo prezentanta la respublikon: bela hispana virgulino flankumita de leono kaj la nacia trikoloro. Kun miro mi vidis, ke la tuta virgulino estas traborita per kugloj, sed tiufanken ne povis atingi la kugloj de la malamiko.

Mire mi demandis al kapitano Pepe, dudek-unujara komunisto, kio okazis. Ridete li montris sian revolveron: „Mi

1) La literon j oni prononcas en la lingvo hispana kiel ĥ.

ja devis provi tiun ĉi novan objekton!" „Sed, Pepe, ĉu vi do tute frenezigiĝis, ĉar vi pafas al la respubliko?"

„Fi", diris Pepe, „esta vieja puta (la malpurulino), tio ja estas nur la burĝa respubliko!"

Tiun ĉi anekdoton mi rakontis ĝuste pro tio, ke nun, post unu kaj duona jaroj da interna milito, absolute neebliĝis, ke komunisto aŭ respublika oficiro povas preni tian sintenon. Ĝuste la komunistoj enkondukis ĉie la standardan paradon kun saluto al la nacia trikoloro, kaj en kunvenoj iliaj komisaraj parolas nur ankoraŭ pri la defendo de l' respubliko, kaj neniam plu pri la socia revolucio. Sed pli gravas, ke ankaŭ inter la soldatoj mem enkondukiĝis ĉi tiu nova terminologio.

La tempo forpasis, kiam la devizo de l'komunistoj: „por parlamenta demokratia respubliko novtipa" renkontis, speciale en la organizita junularo, grandan kontraŭstaron. Kiel ĉie, la parlamentismo trovis siajn adeptojn precipe en la maldekstrapolitika burĝaro, sed plene kompromitita ĝi estis en la okuloj de l'junularo ekkoninta krom ĝi nur senlaborecon kaj mizeron. Oni deziris pli efekan demokration esprimiĝantan per la devizoj: sinregadon por la efektivaj vivkomunoj, sindikatisman federaciismon, sovetsisteman registaron aŭ proletaran diktatorecon.

Oni konstatu, ke tiaj devizoj, almenaŭ en la armeo, eĉ en intimaj interparoloj, nuntempe apenaŭ aŭdiĝas, kaj ke en la terminologio oni ĝenerale eĉ ellasas la adjektivon „novtipa" ĉe la ideo „demokratia respubliko".

Por klarigi tiun ĉi vere drastan ŝanĝiĝon en la opinioj de l'popolamaso, estas necese iom rerigardi en la historion.

Kiam en 1931a la reĝo fuĝis el la lando, tio estis neniel socialisma revolucio. Okazis nenio alia krom disfalo de feŭda sistemo plene bankrotinta kaj pereinta pro propra forputro. Pli longe ol aliie en Eŭropo la feŭdismo, subtenata de la eklezio, konstantigis sin en Hispanio. Krom tio ĝi fariĝis nepra

bremso kontraŭ ĉia progreso. Nek la industrio, nek la agrikulturo povis malvolviĝi, laerctrezoroj venis en manojn alilandajn kaj ne estis hazarde, ke, ĝuste en la ekonomie plej progresintaj partoj de la lando (Katalunio kaj Baskio), la burĝa movado, postulanta aŭtonomion, pli kaj pli fortiĝis. Fine la hispana burĝaro volis okupi sian lokon en la lando. Sed dume, same kiel en Rusio en la mondmilita tempo, la malvolviĝo jam tiom progresis, ke sian lokon la burĝaro povos konkeri nur helpe de l'revoluciema proletaro. Ne estas mirige, ke ĝi, kvazaŭ la sorĉisto de Goethe, baldaŭ timis la fortojn, kiujn ĝi mem estis malliberiginta kaj ke ni pro tio vidis la burĝajn „patrojn de l'republiko", Zamora, d-ron Maranan kaj eĉ kolonelon Franco post unu alian revenanta en la sinon de l'reakcio.

Ĉe tio ni memoru, ke la hispana popolo en siaj vastaj tavoloj estis kulture neprogresinta popolo, kaj ke sur la bazo de ĉi tiu neprogreseco elkreskis tipe hispane romantika anarĥiismo, Sendube la anarĥiismo en Katalunio havis siajn teoriojn, siajn organizojn, siajn revuojn kaj siajn tre lertajn gvidantojn. Sed pri granda parto de la kamparanoj same nomantaj sin anarĥiistoj, ni konfesu, ke ilia anarĥiismo grandparte konsistas el miksaĵo de malamo kontraŭ la subpremantoj, venĝosentoj kaj ĥilliasma espero pri feliĉego. Pro sia politieke ekstreme maldekstra pozicio tiu ĉi anarĥiismo en la unuaj jaroj de l'republiko senvole favoris la reakcion. Ne partoprenante la balotojn kaj laŭprincipe rifuzante partoprenon en la regado, ĝi kaŭzis, ke la regado venis en la manojn de l'reakcia registaro Lerroux. Ankaŭ pro tio la komence nur tre malfortaj socialistaj kaj komunistaj grupoj en Madrid pli kaj pli povis preni al si la gvidadon super la proletaro, precipe kiam tiuj ĉi lastaj plenumis profunde sentatan bezonon de l'popolamaso, proklamante la unuigĝan fronton. Plivastigita kiel popola fronto tiu ĉi taktiko formis la bazon por la balota venko en 1936 kaj la formado de l'registaro Azaña.

Jam dekomence tiu ĉi hezitema, pure burĝa registaro ne havis la simpation de l'amaso. Same kiel en Francio, la maldekstraj partioj estis, interne de l'popola fronto, la malliberigitoj de l'dekstra gruparo. Vere drastaj reformoj ne povis realiĝi interne de la kadro de l'burĝa respubliko.

Oni akceptis kaj apogis la registaron kiel la sole eblan koncentriĝon por defendi sin kontraŭ la kreskanta faŝismo, sed pri ĝiaj pozitivaj rezultatoj oni estis neniel kontenta.

Kiam fine okazis la eksplodo, malgraŭ la fakto, ke Azaña per modera agado esperis malhelpi ĝin, kaj kiam la generaloj rompis sian ĵuron pri la konstitucio, tiu ĉi registaro subite staris sendefenda; nek pri polico, nek pri armeo ĝi povis disponi por obeigi sian aŭtoritaton; kaj nur la rapide armita popolo sukcesis, sen oficiroj, senplane kaj sen artilerio, venki la faŝistojn en la ĉefaj urboj de la regno kaj post tio rapidis en la montaron por bari la almarŝon de l'faŝistaj hordoj.

Ne estas mirige, ke en tiuj tagoj la popolo kredis havi la rajton por meti postulojn multe superantajn la moderajn planojn de l'tiama registaro. En tiuj tagoj ŝajnis, ke en Hispanio eksplodos revolucio kaj ke la milito okazos kiel revolucia milito. En tiu tempo multaj kredis, ke el la intermiksiĝo de individualista anarĥista liberamo kaj komunista disciplino, ĉe la frontoj kaj en la fabrikaj komitatoj mem, elkreskos nova kaj ĝojiga tipo de laborista movado. Kaj en la politikaj kunvenoj, kiujn oni tiutempe kutimis aranĝi eĉ interne de l'armeo, ŝajnis efektive, ke oni povas esperi tian perpraktikan kunkreskon de la grupoj.

Tiuj ĉi esperoj ne realiĝis. Kvankam okazis inter Durutti kaj Rosenberg intertraktoj pri unuiĝa fronto, la komunistoj tamen prezentis al si tiun unuiĝan fronton en tia formo, ke ili mem havigos la oficirojn kaj la aliaj la soldatojn.

Neniun partion ni akuzu, sed ni nur konstatu, ke ĉi tie ripetiĝis la tragedio de Germanio. Same kiel en tiu lando

social-demokratoj kaj komunistoj ne sukcesis kuniĝi, en Hispanio oni ne sukcesis formi unuigĝan fronton el la du efektive grandaj grupoj dividantaj la proletaron. Pro ĉi tiu tragika fakto la batalo en Hispanio plilongiĝis almenaŭ unu jaron; ĝi postulis centmilojn da homaj vivoj kaj finfine kondukis la faŝistojn ĝis en Katalunio.

Ni konfesu, ke estis tre malfacile trovi bazon por tia sincere intertraktita unuigĝa fronto.

La ekzistantajn kontrastojn ni povas montri ne pli bone ol donante pormomente la parolojn al la gvidantoj de ambaŭ inter si ekstremaj grupoj:

En decembro 1936a la Centra Komitato de P.O.U.M.¹⁾ publikigis jenan proklamon (represitan el „Spanias Frihets-kamp” de Trond Hegna, pĝ. 98—99):

„La demokratia parlamento estas institucio konformiĝanta al la periodo antaŭ la 19a de julio. Nek per sia konsisto, nek per sia karaktero ĝi povas konformiĝi al la nuntempaj revoluciaj postuloj. Nenia parlamento povas formi la novan socion; povas formi ĝin nur konstitucia kunveno sur la bazo de Hispanio liberigita el terposedantoj kaj kapitalistoj. La delegitoj al tia konstitucia kunveno ne estu elektataj laŭ ĝenerala balotrajto, ĉar estanta restaĵo el la burĝa demokratio, sed ili estu elektataj el reprezentantoj de fabrikaj, laborejaj kaj kamparanaj komitatoj kompletigitaj de delegitoj el la frontoj. Tia ĉi kunveno iniciatu la socialisman reformadon de la lando, kun registaro el laboristoj kaj kamparanoj reprezentanta la popolamason, la amasojn batalantajn kontraŭ la faŝismo kaj verŝantajn sian sangon ne por demokratia respubliko, sed por socio liberigita el kapitalisma fiekspluatado”.

1) Partido Obrero Unificacion Marxista (Laborista Partio de l'Marksisma Unuiĝo). Trad.

Kontraŭe Juan Comorera parolis en januaro 1937a antaŭ la Centra Komitato de P.S.U.C. (Kunigita Social-demokrata-Komunista Partio en Katalunio):

„La kunigita socialista partio en Katalunio batalas por la demokratia kaj parlamentisma respubliko. La tutmonda burĝaro jam ne havas fidon en la parlamento kaj komencis sisteman agadon por miskreditigi ĝin. Ekzistas laboristoj influataj de tiu miskreditiga agado. Kompreneble ĝustas, ke nia demokratia kaj parlamentisma respubliko havu alian karakteron ol la antaŭa portanta la stampon de tradiciaj privilegiitaj grandterposedantoj kaj grandfinancistoj. En la demokratia kaj parlamentisma respubliko la laboristaj amasoj de l'popolo havu efektive la rajton destini la sorton de la lando; ĝi ne lasos lokon al la faŝismo, kiu estu proskribita kaj kies materiajn fundamentojn ni estos detruintaj.

Hispanio estas lando kun neprogresinta ekonomio, ne povanta malhavi la mondmerkaton. La kataluna industrio tre altgrade dependas de l'importo. Katalunio preskaŭ ne posedas krudmaterialojn kaj eĉ sian karbon ĝi devas importi el Britio. En tiaj cirkonstancoj paca kunlaboro kun tiuj landoj, kiuj amike rilatas al Hispanio, estas vivpremiso. P.S.U.C. ne malkonfesas siajn socialismajn idealojn, sed ĝi konscias, ke ĝi portas pezan respondecon al la tuta popolo pri la certigo de la venko en tiu ĉi milito. Kaj dezirante tiun ĉi venkon, ni malhelpu, ke ni, krom la faŝista enmiksiĝo, kaŭzu al ni ankaŭ la malamikecon de la demokratiaj ŝtatoj.

La teritoria, internacia kaj politika situacioj de Hispanio estas tute aliaj ol tiuj de Rusio dum la granda revolucio. Kaj politiko ne konsideranta la geografian kaj internacian situacion nepre kondukos al pereco”.

El la verko de Jean Richard Bloch pri Hispanio ni scias, ke en Katalunio jam estiĝis ĝojigaj novaj formoj de sinregado en la laborista klaso kaj ke ili parte bonege funkcias (pli bone ol la

malnova ŝtata aparato plena de spionoj, sabotuloj kaj burokratoj); ni vidas tie antaŭ ni kvazaŭ la vojon, kiu efektive povus konduki al formorto de la ŝtato. Mi mem neniam estis en Katalunio, sed de la tempo, kiam mi forlasis Hispanion, interparoloj kun multaj kamaradoj tie batalantaj kaj ankaŭ libroj kia la tre leginda „Civil war in Spain” de Bertram D. Wolfe, konvinkis min, ke la agado de la anarĥiistoj eble formas la plej interesan kaj plej admirindan parton de la tuta interna milito. Sed vero tamen estas, ke ankaŭ inter P.O.U.M. kaj la anarĥiistoj ne ekzistis komuna opinio pri la direkto de l’agado. Dum kiam P.O.U.M. deziris fondi sovetojn, C.N.T.¹⁾ preferis sindikatajn komitatojn kaj sindikatan registaron. Praktike rezultis el tiaj sindikataj komitatoj plej ofte privilegiado de certa grupo de laboristoj, koste de la cetera loĝantaro. Krom tio al P.O.U.M. kontraŭagis ankaŭ la trozkiistoj kun sia organo „La Voz Leninista”.

Pli gravaj ol la teoriaj konceptoj estas la praktikaj skrupuloj, kiujn esprimas Camorera.

Eĉ en la plej favoraj tagoj de l’milito la fronto de Teruel situis neniam pli ol 150 kilometrojn distance de la marbordo. Ĉe la fronto de Madrid malamika trarompo de 15-kilometra larĝo povus havi fatalajn sekvojn. Ĉiu stagno en la industrio, transportado aŭ nutraĵa provizado povus fariĝi fatala; al la kampistoj neniel plaĉis la eksperimentoj kelkloke faritaj; mankis intelektuloj; ne estis konsilinde malamikigi kontraŭ si la etburĝaron, kiu krom tio en Hispanio estis tradicie revoluciema. Kaj eventuala aktiva enmiksiĝo de Britio kontraŭ Sovet-Hispanio certe signifus pereon.

Kiu ŝatas historiajn hipotezojn, tiu eble prezentus la tezon, ke revolucia malvolviĝo en Hispanio eblus, se oni en la unuaj

1) Confederacion General Trabajadores (Nacia Ligo de Laboristoj). Trad.

semajnoj estus definitive venkinta la faŝistojn. Eble la grand-potencaj ŝtatoj, starante antaŭ decidita fakto, ne kuraĝus interveni, same kiel ĉe la faktoj deciditaj de faŝistaj revolucioj. Sed tiel komplete venki organizitan armeon eblus nur, se ni, krom pri revolucia entuziasmo, estus disponintaj ankaŭ pri aliaj armiloj ol pri tiuj, kiujn Meksiko liveris al ni en la unuaj monatoj. Alivorte: tio eblus, se Sovet-unio estus helpinta la respublikon same maltime kaj impertinente kiel la faŝistoj jam de l'unua momento helpis siajn samideanojn. Pri tia politiko Sovet-unio ne povis decidi, ĉar ĝi tuŝus la aliancon kun Francio kaj kondukus Sovet-union en novan mondmiliton efektivigantan kontraŭ ĝi la plej malfavoran kombinon de mondpotencoj. Krom tio la geografian interligon inter Sovet-unio kaj Hispanio regas Italio kaj pli kaj pli direktonŝanĝanta Turkio.

Estas vere, ke ni, en julio 1936a, okaze de vizito en Sovet-unio, tre indigniĝis, ne renkontante interesiĝon pri la hispanaj okazaĵoj. En neniu kunveno oni parolis pri ili kaj, en privata interparolo tuŝante tiun temon, ni ekhavis impreson, ke oni skrupule evitas elparoli pri ili propran opinion.

Sed ankaŭ veras, ke, kiam fine en la lastaj tagoj de aŭgusto la ĵurnaloj instigis subteni Hispanion, la rusa popolo akceptis tiun instigon kun grandega entuziasmo.

Jean Richard Bloch informas nin, ke la 23an de oktobro Sovet-unio decidis pri pli aktiva subteno. Tio proksimume ĝustas. Sed kiel ajn estis, la 5an de novembro, kiam furiozis la decida batalo apud Getafé, ĉe neniu fronto oni povis disponi pri rusaj armiloj. En tiuj tagoj ni defendis la sep kilometrojn longan vojon de Toledo al Madrid per du malnovaj hispanaj Hotchkiss-maŝinpafiloj. La rusa armila helpo venis nur kvin minutojn post la dek-dua, t.e., post kiam la Internacia Bataliono estis rebatinta la maŭrojn ĉe la eniro de l'Universitata Urbo. Niajn unuajn ĉasaviadilojn mi vidis super Villaverde.

De tiam alvenis armiloj, kvankam proporcie neniam tiakvante, kiom Franco ricevis armilojn el Italio kaj Germanio, kaj ekskluzive en tiujn lokojn de la fronto, kie la influo de la anarĥiistoj estis neniigita. En Aragono komenciĝis la unua ofensivo per modernaj armiloj nur post malfondo de l'anarĥiista soveto de Aragono.

Tiutempe oni defendis sin, sen artilerio kaj sen tankoj, per dinamitjetiloj, kiujn la anarĥiistoj post la fronto mem fabrikis en malgrandaj vilaĝaj forĝejoj.

Kvankam fine de julio ĝis komence de aŭgusto 1936a ankoraŭ ekzistis eblo por revolucia malvolviĝo, post la batalo apud Getafé kondukanta la malamikon ĝis en la antaŭurboj de Madrid, ĝi fariĝis — konsidere pri la politikaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj rezultontaj el ĝi — tute malebla.

La grava misfaro de P.O.U.M. ne estis ia perfido, kiun kelkaj atribuis al ĝi, sed la eraro, ke ĝi klopodis akceli la revolucion malvolviĝon, longtempe post kiam la objektivaj premisoj por tio tute nevalidiĝis. Ni konfesu, ke, post la grandiozaj sukcesoj en Barcelona, Madrid, Valencia kaj Malaga, la hispanaj revoluciaj partioj komence imagis la batalon kontraŭ la faŝismo multe tro facila. Ili konsideris ekskluzive la efektive tre bagatelajn faŝistajn fortojn en Hispanio mem, sed ne la venontan eksterlanden intervenon. Fakte tiutempe ne la armita popolo staris ĉe la fronto, sed pli ĝuste la armitaj partioj. Oficirojn oni elektis laŭ ilia fidindeco kiel partianoj, sed ne laŭ iliaj militistaj kapabloj. Ĉiu grupo posedis siajn proprajn armilojn kaj armilejojn, kaj eĉ okaze de l'batalo apud Getafé oni ne povis enpoziciigi du infanteriajn kanonojn starantajn en iu magazeno, ĉar la anarĥiistoj rezervis ilin por sia propra privata milito. Ĉiu partio preparis sin por la batalo por akiri la potencon *post* la venko.

Kiam tamen en Toledo la faŝistoj masakris samokaze anarĥiistojn kaj komunistojn, kiam la araboj staris antaŭ Madrid,

komuna danĝero kunigis la kamaradojn ĉe la frontoj. La eksterlanda interveno vundis la hispanan fieron, kaj la devizo „milito por la nedependeco” komencis superregi la ideon de l’socia revolucio. La revoluciaj devizoj „diktatorecon de l’proletaro!” kaj „ĉiom da potenco por la sovetoj!” miskreditigis sin mem, ĉar neniu deziris la diktatorecon de sovetoj aŭ de iu partio, kiu subpremus la aliajn grupojn. Oni volis gajni la militon kiom eble plej rapide, kaj tiucele postulis unuigan komandon kaj fortan registaron. Sed Largo Caballero ne montriĝis la persono, kiu povas kontentigi tiujn postulojn.

Dume la komunista partio prenis la aranĝojn postulatajn de l’momenta situacio. Tiu ĉi partio havis la pli grandan nombron de siaj membroj ĉe la frontoj; ĝi donis ekzemplon de disciplino, akceptante la roan de oktobro la militistigon kaj envicigante siajn trupojn en la armeon. Ĝi organizis la heroan kvinan regimenton, la atakajn batalionojn kaj la fortikaĵojn de Madrid. Ĝiaj junulaj membroj formis la instigan forton en la „junta de defensa”. Ĝiaj stahanovistoj pligrandigis la produktadon en la industrioj.

Ĝi disponis pri noblaj, fantazion ekscitantaj figuroj kia Passionaria, kaj en Alerta ĝi sukcesis fondi la unuan tipon de junula movado pli signifan ol debata klubo.

Sed, kio ankoraŭ pli gravis: ĝi havis internaciajn kunliganojn. En Paris la anarĥiistaj ministroj devis defendi sin en la cirque d’hiver pro sia partopreno en la registaro; en Nederlando oni debatis en anarĥiistaj rondoj, ĉu oni povas ankoraŭ rigardi la hispanajn anarĥiistojn kamaradoj, ĉar ili faris la barbaraĵon, armitamane defendi sin kontraŭ la faŝistoj. Sed la pli multaj libervoluloj en la internaciaj batalionoj konkretigintaj la vorton „solidareco” en agon, estis komunistoj. La unuaj uzebraj armiloj venantaj en niajn manojn, estis meksikaj aŭ rusaj. Ili ne sufiĉis. Informoj de la anoj de l’internaciaj brigadoj tiurilate ne povas esti kriterio, ĉar tiujn ĉi brigadojn oni ĉiam

armis, vestis kaj nutris multege pli bone ol la hispanajn.

Sed eĉ en la internaciaj brigadoj regis terura manko pri peza artilerio kaj malpezaj maŝinpafiloj. Eĉ en oktobro 1937a ni povis disponi sur la ekzerca tereno de l'Internacia Brigado pri sep fusiloj, per kiuj devis pafi dumil viroj, pri unu peza kaj unu malpeza maŝinpafiloj sen municio, kaj tute mankis ĵetgrenadoj, pikildrato, dratondiloj kaj signaliloj.

En mia propra, hispana, komunista brigado ni ricevis en aprilo 1937a la unuajn ovoformajn ĵetgrenadojn, ŝtalajn kaskojn kaj gasmaskojn kaj en majo uniformojn kaj bajonetojn. Ankoraŭ en julio niaj armiloj konsistis el malnovaj anglaj Mauser-fusiloj, kies tuboj plurokaze krevis. En la anarĥiistaj regimentoj la bataliloj estis ankoraŭ multe pli malbonaj. La sep tankojn, pri kiuj la anarĥiistoj en tuta Aragono disponis, ili estis importintaj el Meksiko por la konto de la organizoj mem.

En Bilbao oni kondiĉis la liveron de armiloj el rusa ŝipo per postulo agadi kontraŭ P.O.U.M., kiu tiuloke sendube estis sensignifa.

Nia aviado disponis pri bonegaj ĉasaviadiloj, sed havis nur tre malmulte da bombardaj aeroplanoj, kaj laŭnombre nia aviadilaro ĉiam multe malsuperis la malamikan. Laŭ kredindaj informoj mi eksciis, ke de decembro 1936a Rusio ne liveris plu armilojn, kaj ke el tio rezultis la perdo de Teruel kaj la tuj sekvintaj okazaĵoj. Ankaŭ la parolado de Negrin kaj la ĵurnalaj komunikoj ŝajne informas tiutendence. Certas, ke el Rusio oni liveris armilojn ekskluzive kontraŭ kontanta pago en orvaloro.

Sed kvankam la rusa helpo ne sufiĉis por la venko, la nura fakto, ke sen la rusa helpo la milito jam estus malgajnita, kompreneble vekis en la junularo grandegan simpatian por Rusio. Malgraŭ la manko pri papero, la komunista partio sciis tre lerte plifortigi tiun simpatian, distribuante centmilojn da gazetoj, broŝuroj, afiŝoj, filmoj, libroj kaj bildkartoj.

La anarĥiistoj atentigis pri tio, ke la komunistoj konscie bremsis la revolucion, kaj sendube ili pravis pri tio. La partio protektis la interesojn de l'etburĝaro kaj eĉ de l'spekulaciantoj, organizante ilin en „sindikatojn” de bank- kaj borsoficistoj, ovo-, viando- kaj fiŝnegocistoj, registaraj oficistoj k.t.p., kiuj formis al ĝi apogon kaj kontraŭforton kontraŭ la laboristoj en la sindikatoj de C.N.T. Per la stahanovismo ĝi sukcesis enkonduki fortan diferencon inter la salajroj, kio kaŭzis grandan malkontenton inter la nemetiaj laboristoj. Ĝi rifuzis plenumi anarĥiistajn postulojn, eĉ pravajn, kia ekzemple laborista kontrolo pri la burĝa registaro kaj ĝiaj militistaj instancoj. En la armeo oni malpermesis jam ĉe la militistigo, la roan de oktobro, diskuti pri strategiaj aferoj. De tiam la graveco de la soldataj kunvenoj konstante malpliĝis, post kio ankaŭ la politikajn diskutojn anstataŭis nura informado de l'politika komisaro. La oficiojn, kiujn ĝis januaro 1937a la trupoj mem elektis (kio okazis ankaŭ al mi), de tiam nomis kaj translokigis la ministerio. Komence la salajro de l'oficioj, same kiel de la soldatoj, estis dek pesetoj ĉiutage, kio, kompare kun la salajroj de la kamplaboristoj, estis sendube multe tro alta. Poste oni deprenis de tio du kaj duonan pesetojn por nutraĵo kaj vestoj, krom kio la milicanoj de tiam mem devis pagi ankaŭ siajn poŝtmarkojn, tabakon, trambiletojn k.t.p. Samtempe tamen la oficiraj salajroj multege altiĝis: frontleŭtenanto ricevis 220 kaj kapitano 350 pesetojn en dek tagoj. Pli indigniga, speciale en la komunistaj korpuso, estis la enkonduko de poroficiraj kazinoj, en kiujn la soldatoj ne rajtis eniri, kaj la enkonduko, eĉ ĉe la fronto, de specialaj poroficiraj kuirejoj. Kiam la kunveno de oficioj en mia bataliono malacceptis tion, ĉar, kiel Sentella tion esprimis, ne volante, ke la soldatoj en la tranĉeoj perokule formanĝu nian manĝaĵon, venis el Madrid politika komisaro por konvinki nin, ke nia rifuzo estas maldekstra-politika nenormalaĵo. Lia opinio la soldatoj jam kutimiĝu, ke

post la venko venos la demokratia respubliko, sed ne la egaleco de l'anarhiistoj!

Kun la novaj uniformoj, kies kolumoj estu fermitaj eĉ ĉe la plej forta somera varmego, enkondukiĝis ankaŭ la devigita saluto kaj novaj, tre severaj laŭdisciplinaj punoj. Pri ĉio ĉi speciale ekzemplis admirige la germanlingva dek-unua brigado, precipe post kiam Renn kiel stabestro estis intrige forpuŝita de Richard.

En nia ekzerca kampo en Madrigueras komandis Heinz, nobla homo, brava soldato, konvinkita komunisto kaj nelacigebla laboremulo. Bedaŭrinde tamen Heinz prenis la iaman prusan armeon kiel ekzemplon. Krom tio mankis al li, same kiel al la pli multaj germanaj oficiroj, kompreno pri la mentaleco de l'hispanoj kaj de l'nederlandanoj kaj skandinavianoj envicigitaj en tiu ĉi brigado.

Iumatene unu el miaj germanaj oficiroj venis al mi kun la plendo, ke liaj katalunoj estas sabotuloj mokridantaj al li en la vizaĝon. Evidentiĝis, ke li eraris, kriante anstataŭ „cargen armas!” (ŝargu la armilojn!), la hispanan blasfemon „cagen tu armas!” (fekaĉu sur viajn armilojn!). Mian spritan respondon, ke li ĝoju, ĉar ili ne obeis al li, li akceptis nur tre neŝate. „Ĉar mi venis tien ĉi en Hispanio por verŝi por ili mian sangan, oni almenaŭ klopodu kompreni min!”

En nia oficira kunveno iu hispana kapitano esprimis skrupulon kontraŭ la salutdevo, kiu en malgranda vilaĝo kia Madrigueras fakte devigis nin iri konstante kun la pugno ĉe la ĉapo. Germana leŭtenanto respondis al li: „Kamarado, kredu la parolojn de malnova revoluciulo: se vi, hispanoj, dekomence estus havintaj tian disciplinon, kian nia Ruĝfronta Ligo, la faŝistoj neniam estus venintaj ĝis antaŭ Madrid!” En alia kunveno mi aŭdis la riproĉon, ke, kvankam mia kompanio estas la plej bona en la instrubataliono, estas malagrabla al la oficiroj de aliaj kompanioj, ke ĉe mi okazas malmultaj

punoj ¹⁾). Eĉ sur seksa tereno oni imitis la novan puritanismon de Sovet-unio. En lokoj, kie troviĝis garnizonoj de la internaciaj brigadoj, oni fermis la bordelojn, kaj la komunistoj disvastigis la devizon „seksa malsano egalas forkuron”. Nia politika komunisto komisaro diris, ke komunisto povu regis siajn seksajn sentojn. Tamen tute ne ĉiuj estis komunistoj, kaj ĉe viroj troviĝintaj dum pluraj monatoj ĉe la fronto, ne vidante eĉ unu virinon, estiĝis tiumaniere seksa bezono tre malutilanta al la moralo.

Anarĥiistaj gazetoj retenitaj de la pligrandparte komunistaj politikaj komisaroj, ne trovis sian vojon al la tranĉeoj, kio krome estis tre komprenebla, ĉar la akra kaj kolera tono de tiuj gazetoj direktantaj sin pli multe kontraŭ la registaro, la socialistoj kaj komunistoj ol kontraŭ la malamiko, neniel utilis al bona moralo inter la trupoj.

En multaj sektoroj de la fronto la anarĥiistoj vidis pro tiu agado malkreskanta sian influon en la armeo, dum kiam en la lando postfronte precipe U.G.T. ²⁾ sciis kolekti ĉirkaŭ si la ĝis tiam indiferentajn grupojn de l'etburĝaro. Proporcie ilia membronombro malpliĝis; kontraŭe la nombro de la socialistaj kaj komunistaj grupoj forte kreskis. Forpuŝitaj el la registaro ili sugestis, ke venko de ĉi tiu registaro povus signifi la kompletan perdon de ilia propra influo kaj ilian baldaŭan ekstermon fare de la komunistoj. La formoj tamen, en kiujn la rusa socio evoluis, same malmulte logis ilin kiel tiuj de l'faŝismo. Kvankam timante malvenkon, ili tamen ne havis plu intereson en venko, almenaŭ ne de ĉi tiu registaro. Ilia agado stagnis kaj per tio paralizis la malvolviĝon de l'mi-

1) Simile al tio, en la artsilkofabriko en Ede (Nederlando), tiu ĉefo, kiu postulis malpli multe da punpagoj ol aliaj, ricevis riproĉon!

2) Union General Trabajadores (Ĝenerala Laborista Ligo). Trad.

litila industrio en la plej grava industria centro, Katalunio.

Por konstantigi la kvantan nivelon de sia membraro ili tro facilanime malfermis la pordojn al ĉiaj individuoj oftokaze dezirantaj ateston pri membreco de C.N.T. precipe por protekti sin kontraŭ la sekreta polico. Estas kompreneble, ke pro la duone kontraŭleĝa stato, en kiu ili devis agadi, la provokuloj kaj spionoj kun radikala frazeologio povis ankoraŭ multe pli facile enpenetri en P.O.U.M. Krome oni ofte klopodis ligi la membrojn, postulante laborkondiĉojn kaj salajrojn, kies nura rezulto povis esti rapida kresko de la prezoj, protektante malbonajn laborantojn kaj eĉ konfiskante transportilojn da nutraĵoj kaj aŭtomobilojn por disponigi al propraj amikoj. Estas kompreneble, ke tiu ĉi netolerebla stato en Katalunio fine estis draste ĉesigenda. En la kernpunktoj de l'neevitebla konflikto la registaro pravis el historia vidpunkto. Anstataŭigo de l'anarĥiistaj limgardistoj per la nove organizita regna ĝendarmaro estis same necesa kiel la malfondo de la libervolaj polickorpusoj de la diversaj partioj. Vere netolerebla afero estis, ke la barcelonan telefoncentrejon, pri kiu la armekomando ĉiumomente devis disponi, kontrolis kaj gardis armitaj sindikatisoj. Sed tre maljusta estis la maniero, en kiu la polico okupis tiun telefoncentrejon, kio ne povis ne efiki kiel provoko. Pro tio do oni poste eksigis la polican ĉefon, kiu estis ordoninta tiun okupon.

Neĝusta ŝajnas al mi la aserto, ke la konflikton en Barcelona kaŭzis P.O.U.M., kiu neniam estis trotzkiista partio, sed kombino el tri malnovaj marksistaj partioj en B.O.G. (kuniĝo de kamparanoj kaj laboristoj), al kiu Trotzki kategorie riproĉis ĝian tro demokratian bazon kaj ĝian kuragecon okupi starpunkton nepre rifuzan kontraŭ 4a Internacio.

Same ne ĝustas, ke la konflikto en Barcelona finiĝis per plena venko de l'registaraj trupoj. Ĝi finiĝis per arbitracio de la anarĥiistaj gvidantoj tiucele venintaj el Valencia.

Sed estas fakto, ke en la tuta lando, sed precipe en la armeo, la komunistoj taktike utiligis tiun konflikton. Neniu tiutempe staranta en la tranĉeoj, forgesos tiun atakon en la dorso. Ĝenerale oni opiniis: Eble ili estas efektive provokitaj, sed oni nepre ne permesu al si esti tiagrade provokata! La konflikto en Barcelona signifis pereigan baton al la politika influo de la anarĥiistoj.

Post la barcelonaaj okazaĵoj regis la ĝenerala impresoj, ke de nun la registaro estos plene influata de la komunistoj. Ne nur mi, sed ankaŭ „Le Temps” de l'11a de januaro 1938a konstatas, ke okazis la malo. La registaro komprenis la barcelonaajn okazaĵojn kiel averton kontraŭ tro drastaj aranĝoj kontraŭ la organizoj ampleksantaj ankoraŭ milionojn da hispanoj. Ĝi komprenis la danĝeron konsistantan en eventuala kunagado de tiuj elementoj kun la tiutempe tre suspektige ribelemaj katalunaj aŭtonomiistoj. La skismo en U.G.T. kaj la malsukceso de Caballero, kvankam havanta signifon pli personan ol politikan, instigis ĝin agi prudente. La translokiĝo de l'registaro al Barcelona ne nur decide subpremis ĉiujn aŭtonomiistajn movadojn, donante fortikan bazon al la kataluna militindustrio; precipe ĝi kaŭzis gravan trankviliĝon en la politika situacio. Post kiam rompiĝis la anarĥiista ŝtat' en ŝtato, la registaro ne hezitis defendi sian nedependecon ankaŭ kontraŭ la komunistoj.

Sian plej fortan pozicion la komunisto partio havis en la Internacia Brigado, en kiu ĝi disponis pri preskaŭ ĉiuj oficiroj kaj politikaj komisaroj. La unua paŝo tie estis plene subigi la brigadon kaj ĝiajn servojn al la hispana ĉefkomando kaj nomi hispanajn oficirojn proporcie al la nombro da soldatoj (60%). Poste oni forigis ĉian politikan agadon el la komandoj kaj el la stabo. La eksigo de Alvarez del Vayo kiel ĝenerala komisaro kaj la anstataŭigo de 250 komunistaj politikaj komisaroj de l'brigado per aliaj, estis tre grava paŝo en tiu direkto.

Oni certe demandas sin, kiel tia nedependa politiko estis

farebla konsidere la dependecon al Rusio koncerne la liveradon de armiloj.

Unue, oni opiniis, ke ju pli fortiĝos la propra militindustrio en Katalunio, des malpli da signifo havos tiu liverado.

Kaj due, tiu dependeco ne estis sendanĝera por la hispana popolo.

Jam dekomence la sinteno de Rusio neniam estis tiom klara kiom ekzemple tiu de Meksiko. Malgraŭ sia simpatideklaro al Hispanio en kunveno de Ligo de Nacioj, Rusio aliĝis — pro amikeco al Francio —, kvankam kontraŭ korinklino, al la fatala ne-intervencia politiko. Kvankam Sovet-unio la 23an de oktobro reprenis sian liberon por agado, ĝia starpunkto estis tiom rigore laŭleĝa, ke ekzemple okaze de eventuala revolucio en Portugalio, ĝi nepre ekskludus ĉian helpon al tiuj, kiuj ribelus tie kontraŭ sia „laŭleĝa” diktatora registaro.

En London Maisky parolis severajn kaj verajn vortojn, sed la ultimato al Italio fine tamen neniom efikis.

Ne ekzistas motivoj por kredi, ke la italaj Fiat-aviadiloj ne estas hejtataj per rusa benzino. Al sovet-aviadiloj estas tamen ankoraŭ multe pli facile flugi trans la norda poluso al Ameriko ol el Kiew al Barcelona. (Ankaŭ ĉe Teruel la registaraj aviadiloj formis laŭkvante malplimulton). En la intertraktoj pri la revenigo de la libervoluloj kaj imputo de militaj rajtoj al Franco, Maisky ĝis nun paŝon post paŝo cedis pro Britio.

Tio kompreneblas! La multe multaj ekzekutoj en Sovet-unio ne atestas pri tre stabila enlanda situacio; la armeo estas senigita je siaj plej geniaj gvidantoj, sed la milita danĝero de tag' al tago kreskas.

Ĉang Kaj Ĉek, kiu ankoraŭ en 1927a nur en Ŝanhaj masa-krigis 11000 komunistojn, ne estas tre fidinda kunligano, kaj la armeo de la ĉinaj sovetaj respublikoj pereis ĉe la frontoj. Se Ĉang Kaj Ĉek denove, kiel en la tempo de Borodin, konspirus perfidon, traktante pacon kun Japanio, ĉi lasta lando

povus disponi en Ĉinio pri homa rezervo de 400 milionoj kontraŭ Sovetio. En tiaj ĉi cirkonstancoj Sovetio ne povis ne eviti konfliktojn kun Britio, devante koncerne Hispanion des pli multe koncesii al Britio, ju pli prema fariĝis la situacio en oriento.

Pravamotive la hispana respubliko tenis sin skeptika kontraŭ Eden, kontraŭ la monpruntistoj de Franco en City kaj kontraŭ la britaj grandkapitalistoj havantaj akciojn en Rio Tinto.

Ĝi okupis la sole ĝustan starpunkton: ke la hispana popolo liberigu sin mem.

Post verkado de tiu ĉi pritrakto la okazaĵoj en Hispanio fariĝis pli kaj pli fatalaj kaj tragikaj.

La organizo de l'armeo, kiun la registaro Negrin entreprenis kun modela forto, ankoraŭ en novembro plenigis min per espero kaj fido. La akademioj fine havigis al ni bonege instruitajn oficirojn, la instrukcio, same kiel la humoro de l'soldatoj, estis bonega; ni disponis pri grandegaj homaj rezervoj; kontraŭe la teritorio de Franco estis elĉerpita. La faŝistaj poŝtaĵoj, kiujn ni konfiskis en Brunette, estis nurnure kriego pri mizero. Konstante pli da forkurintoj atingis nin, kaj ĉio, kion ili rakontis, atestis pri kreskantaj senespereco kaj ĉagreno en la „nacia" parto de Hispanio.

Verkoj kiaj „Doy Fe", „Yo he creido en Franco", la ekzilo de l'duko de Parma (la tronpretendanto de la karlistoj) kaj la foriro de la jezuitoj pruvis kreskantan malkontentiĝon inter hispanoj kaj alilandanoj en la partio de Franco. En „Aftonposten" la norvega Franco-volontulo Gissholdt publikigis tri grandajn artikolojn atentigantajn pri rapide evoluantaj militista kaj ekonomia malkreskoj tiupartie. Estas vere, ke en izolita Asturio ni malvenkis, sed tiu ĉi Pirho-venko kostis al Franco pli multe da mortigitoj ol nombris tie nia armeo; ĝi kostis al

li la rezervojn, per kiuj li estis atakonta ĉe la centra fronto. Pli kaj pli urĝaj fariĝis la helpopetoj de Franco al Mussolini, sed Mussolini rifuzis sendi novajn trupojn tiom longe kiam Germanio ne pruvis plu interesiĝon. Ĉe la centra fronto apud Brunette, Belchite kaj Quito ni tamen iris de venk' al venko. La konkero de Teruel signifis por ni ne miraklon, sed la triumfon de sistema agado. Per la revoko de eĉ konservativaj parlamentanoj okaze de l'malfermo de l'Cortes, ŝajnis, ke la registaro bonŝance regajni la fidon de la t.n. demokratioj.

La perdo de Teruel kaj la malsukceso de la kontraŭofensivoj de Franco signifis tamen por Mussolini perdon de prestiĝo kaj pozicio, kiun la malforta itala diktatoreco ne eblis elporti. Lasta helpokrio direktis sin al Hitler kaj Hitler konsideris la okazon konvena por realigi la revon de sia vivo.

La germanaj generaloj deklaris sin kontraŭ plua enmiksiĝo, ĉar ne fidante la italan aliancanon kaj timante militon, kiu ne povos fariĝi milito fulmrapida, ili opiniis fronton inkluzivantan ankaŭ Hispanion, tro longigita.

Sed la generaloj estis forpuŝe ignorataj.

Franco ricevis krom italaj soldatoj la grandegajn aviadan kaj tankan materialojn, kiujn li estis petinta.

Hitler akiris Aŭstrion.

En Britio lordon Eden, kiu pretis marĉande forvendi la hispanan respublikon kontraŭ italaj garantioj, anstataŭis Halifax, kiu ankaŭ pretis forvendi ĝin, sed sengarantie.

Kun humana „protesto” kontraŭ la abomenindaj bombardadoj super Barcelona, Pilato-Chamberlain lavis la manojn en senkulpeco.

En Francio fiaskis la popolfrota registaro, kiu intencis defendi nin kontraŭ la faŝismo, kaj kiam ne la franca laborista movado, sed la franca generala stabo lastmomente memoris pri interveno, mankis al ĝi la apogo de ĝia sola aliancano Rusio, kiu per la procesoj estis mem malfortiginta sin.

Ĉu en tiu ĉi tragedio ne ekzistas nur unu lumpunkto?

Ankoraŭfoje la hispanaj milicanoj kun senrivala heroeco retenis la almarŝon de l'malamiko, nuligante ĉiujn planojn de Mussolini kaj lordo Halifax. La nova hispana registaro, en kiun akceptiĝis ankaŭ la anarhiistoj, kvankam la komunistoj ekŝiĝis, multe pli pure reprezentas la hispanan popolon ol la antaŭa. La repermeso al P.O.U.M., same kiel la fine realiĝinta kuniĝo inter C.N.T. kaj U.G.T., formas bonan paŝon en la ĝusta direkto. La registaro Daladier montras rilate al Hispanio pli da energio ol la popolfrota registaro, kaj ankaŭ Rusio, ne sentante sin plu ligita per tiu popolfroto, malgrandskale rekomencis siajn liverojn de armiloj. En Genève oni denove malkonfesis al Alvarez del Vayo la promesojn solene faritajn al la respubliko, sed en Usono oni konsideras nuligon de l'sekstro pri armiloj destinitaj por Hispanio. Franco denove embarasiĝis; liaj rezervoj elĉerpiĝis, kaj Mussolini, por kiu la hispana problemo superas ĉiujn aliajn, serĉas en la t.n. novaj liveroj de armiloj al la respubliko pretekston por ankoraŭ pligrandskale rekomenci sian intervenon.

Ankoraŭ ekzistas ĉiaj ebloj, kiel ekzemple aĉetakiri la italan neŭtralecon per ofero de la respubliko, aŭ rompiĝo de la komec-itaj ital-brit-francaj intertraktoj. Sed kiom ajn malserena ni vidas la situacion, ĉiam ankoraŭ ekzistas la lumpunkto de l'hispana junularo, kiu nereteneble denove relevos sin, tuj kiam la lasta germana aŭ itala soldato estos forlasinta la landon, tuj kiam iom repleniĝos la grandegaj malplenoj kaŭzita per amasa masakro de la plej bonaj homoj.

LA HISPANA JUNULARO.

Knaboj en aĝ' ankoraŭ infanaj,
bravaj junuloj, filoj hispanaj:
„Viro mi iĝos, vokas min fronto;
al la danĝer' mi iros renkonte;
kaj se min antaŭ viraĝa forto
en la batalo trafos la morto,
do en la tombo viro mi estu,
kun la dezir', ke min nur postrestu
lumo de l'suno min ĝojiganta,
mia kuraĝ' en fratoj flamanta”.

En la tranĉeoj kote malpuraj,
en la malvarmaj noktoj teruraj,
en la bruliga suno tagmeze
homoj aktivis forte kaj peze,
homoj ribelaj kontraŭ sklaveco;
volon ilian montru justeco
ĝis glora fin', kaj kiam forportas
ilin flegist', vunditoj jam mortas;
ĝoj' survizaĝe kaj en la koro,
kvazaŭ radias lum' de aŭroro
brile ardanta en la esprimo;
regas la paco, paco sen limo.
Puran arĝenton ili similas
aŭ kiel or' en ŝtonoj subtilas.

Al la tranĉeoj ili rapidis,
ĉar en la koro firme decidis:
„Semi ni volas semojn de l'vero,
kiujn neniu ŝiros el tero”.
Kaj se la mort' al ili aperas,
pri la rikolt' falĉisto fieras.

Sed en mallumaj ombraj anguloj
larmas amantaj karaj okuloj
pri la herooj brave mortintaj.
Ploras patrinoj ilin nutrintaj,
ploras fratinoj, ardas en preĝo
la fianĉinoj blankaj en neĝo.
Ilin trafegis nigra funebro,
kaj en la vejnoj sang' iĝis febro.
Nekonsoleblaj restas vidvinoj
sen la kompren' pri sortaj destinoj;
nur en portretoj kaj en leteroj
restas memoroj, sed sen esperoj;
ilin rigardas amaj okuloj
lacaĵ pro ploro pri la karuloj.

Kovras la kampojn en Hispanio
ostoj de brila generacio;
el viaj agoj fam' restas nure,
kvazaŭ river' ĝi fluas murmure.
Verŝu la sangon sur la kamparo,
brila hispana, vi, junularo;
kiel oliva suk' ĝi revenu,
kaj viaj ostoj kverkojn subtenul

Sed junular' nepreta oferi,
sang' sen kuraĝo verŝon suferi
nomon honoran jam ne meritas,
brili ne povas, gloron eĉ spitas.
Kiu venkita vivon konscias,
tiu maljunas, mortagonias;
antaŭ naskiĝo premas lin aĝo;
por la pluvivo mankas kuraĝo.

Vi, junularo, gloron aliros,
ĉiam triumfos, venkon akiros;
se Hispanion premos minaco,
vi ĝin elsavos; venos jam paco.
Morti per glav' ni volas prefere
ol sub teroro sklavi mizere,
ol senespere vivi turmente,
ol vegetadi honte kaj pente.

Se el la urboj cindro nur restos,
kiel el cindro flamoj protestos,
tiel eksonos flame la krio,
lasta esprim' en mortagonio:
„Por Hispani' la vivon ni portis!
Ho, Hispani', por kiu mi mortis!”

Laŭ Miguel Hernandez.

Madrid, la 10an de oktobro, 1936a.

FREMDULOJ.

Kelke da tagoj antaŭ nia forveturo mi legis en „Rex voor Vlaanderen”¹⁾:

„Sen la franca helpo Irun estus jam hispana!”

La titolo konvenis al informa metodo, kiu ĝenerale kutimiĝis nomi la ribelulojn „naciaj trupoj”, donante al la laŭleĝa armeo de l’respubliko la kolektivajn titolon „la ruĝuloj”.

Pensante objektive, oni klopodu bone prezenti al si tiun fakton!

„Naciaj trupoj”; tio estas la oficiroj ŝurintaj fidelecon al la respubliko kaj enspezintaj de la respubliko sian salajron kun la nura rezulto, ke ili sekrete preparis la konspiron kontraŭ tiu ĉi respubliko.

„Naciaj trupoj”; tio estas tiuj, kiuj per italaj kaj germanaj bombardiloj bombardas hispanajn urbojn kaj vilaĝojn; tiuj, kiuj sur portugala teritorio faras kontraktojn por poste pagi la liveradon de militiloj per hispanaj insuloj kaj marokaj aerodromoj.

„Naciaj trupoj” estas la trude varbitaj arabaj dungitoj, al kiuj oni promese konsentis elrabi hispanajn urbojn.

„Naciaj trupoj”; tia oni nomas la legion de alilandanoj, la rifuĝejon por la kanajloj el la homaro, en kiun oni, ne informiĝante pri nomo, nek pri deveno, akceptas ĉiun ajn, kiu por mono pretas pafi al ĉiu homo, kiun lia oficiro indikas al li.

1) Faŝista gazeto en Flandrio. Trad.

La „ruĝuloj” tamen, estas la dekmiloj da madridaj laboristoj, libervole prenitaj la armilojn, la kastiliaj kamparanoj, la ministoj de Asturio, la modestaj vilaĝaj paroĥestroj de la baskoj, la artistoj kaj intelektuloj de l’ĉefurbo, la gvidanto de l’katolika junularo, Bergamin, kaj la katalunaj naciistoj.

La malgrasaj virinoj, prenitaj la armilojn, la 16-jara knabo, kiu ĉi matene anoncis sin, kvara filo el familio, havanta jam tri filojn ĉe la armefronto, la milicanino ĉe la fronto, kies pentritaj brovoj estas parte forviŝitaj de la pluvo, la kamplaboristo, kiu ridante montris al ni reĝe subskribitan dokumenton: „malaprobata por la militista servo”, la arĥitekta studento, kiu en Naval Perral, jungita kvazaŭĉevalo, antaŭentiris kانونojn kaj la profesoro pri matematiko, kiu estis lia bateriestro, jen: ĉiuj ili estas „la ruĝuloj”. Sed ĉu mi mem ja ne estas pruvo, ke ankaŭ en la armeo de l’republiko servas alilandanoj?

La batalo en Hispanio estas ne nur batalo por la demokrata respubliko; ĝi estas batalo por la demokratio en Eŭropo.

La paco ne estas partigebla — kaj la internacia solidareco estas premiso por konservi la pacon; pro tio do el ĉiuj landoj antifaŝistoj alrapidis por helpo.

Malvenko de l’demokratio en Hispanio signifos strategie, ke la ringo ĉirkaŭ Francio estas fermita kaj ke la faŝismo kun plejeble granda certo pri venko povas komenci la mondmiliton.

La afero de l’internacia proletaro estas nepartigebla tuto, kia la paco, kaj la vorto „Internacio” jam ne havus ian sencon, se proletoj ĉiulandaj ne volus spontanee alkuri por helpi siajn kamaradojn en Hispanio.

Mi scias, ke dekoj da germanaj elmigrintoj pere de siaj lastaj, almoze kolektitaj subvenciaj moneroj, forveturis al Paris por tie anonci sin kiel volontuloj.

Mi scias tamen ankaŭ, ke ili estas preskaŭ ĉiuj malakceptitaj pro tio, ke la hispania respubliko havas abundon da volontuloj, sed mankon pri armiloj.

Generale oni akceptas nur tiujn, kiuj pro militistaj aŭ aliaj motivoj havas specialan valoron por la militaj operacioj.

Mi scias ekzemple, ke la strategian defendon gvidis precipe franca rezervokapitano kaj germana elmigrinto partopreninta la grandan militon. La franca kapitano, kies nomon ni tamen ne scias, estas mortigita en la lasta reduto.

La germano nomiĝis Hoffman. Iu amiko, kiu, de la franca landlimo, estis observinta la militajn operaciojn, rakontis al ni: „Kontraŭe al ili troviĝis la fremdula legio. Ĉiufoje, kiam tiunokte la fusilado dummomente silentis, ni aŭdis Hoffman vokanta: „Kameraden! Ihr seid Proleten wie wir! Warum kämpft ihr nicht mit uns gegen eure Unterdrücker?“¹⁾

Ĉiufoje, post kiam li vokis, sekvis preskaŭ senprokraste salvo.

Nelonge antaŭ mateniĝo la kugloj trafis sian celon. La voĉo de Hoffman silentiĝis, sed daŭrigis ĝin la antifaŝistaj batalantoj kaj ĝi restos vokanta al la „naciaj trupoj“: „Brüder²⁾, warum kämpft ihr nicht mit uns gegen eure Unterdrücker?“

Certe, fremduloj ili estas, volantaj servi la aferon de l'hispana demokratio. La maljuna aŭstrianano, kiun ni, la unuan vesperon en Madrid, renkontis en la centra kazerno de la kvina regimento, estas fremdulo. En la mondmilito li estis kaptata de la rusoj, kaj poste, en Siberio, li batalis flankon ĉe flanko kun siaj antaŭaj malamikoj kontraŭ Kolĉak. Ĝis la ŝtatperforto de Dolfuss li estis metallaboristo en Wien.

Liaj edzino kaj sola filo estis mortigataj okaze de l'bombardado al la Wienaj laboristaj domaroj. Ĉi tie en la kazerno li estas unu el la malmultaj, kiuj scias kiel manipuli maŝinpafilon.

Ankaŭ du studentoj el Oxford, kiuj hazarde pasigis sian ferion en Hispanio, kiam eksplodis la ribelo. Ambaŭ estis

1) Kamaradoj! Vi estas proletoj same kiel ni! Kial vi ne batalas kun ni kontraŭ viaj subpremantoj? Trad.

2) Fratoj. Trad.

pacifistoj. „Guste pro tio”, ili diras, „ni fariĝis militistoj”.

Ili estas fremduloj. Eble po unu en dekmilo, dise troviĝantaj en ĉiuj trupoj, defendantaj la frontojn en la sudo, centro, okcidento kaj oriento. Nur tre malofte kaj tute hazarde ili interrenkontas. Sed tio sufiĉas por pruvi, ke la vorto „solidareco” ne estas senenhava sono.

Ili estas fremduloj, sed la hispanaj kamaradoj faras ĉion eblan por forgesigi al ili la fremdulecon. Mi ne troigas, dirante, ke ĉiu kamarado en la kazerno estas al ili amiko, kaj ĉiu kunulo frato. Ili fieras pri la fremduloj en sia mezo, kiel oni fieras pri nova kaj valora standardo. Oni kondukas ilin tra la teruraj laboristaj kvartaloj de Madrid, kiuj eble estas la plej mizeraj malriĉulaj kvartaloj de l'mondo. Oni prezentas ilin al siaj konatoj, invitas ilin al si hejme por manĝo kaj senkulpigas sin pro la malgrandeco de l'manĝaĵa porcio. Virinoj alparolas ilin surstrate kaj el sia malriĉo donas al ili melonojn kaj figojn. Infanoj pende premiĝas sur iliajn brakojn. La armeaj intendantoj superŝutas ilin per vestoj; neniu milicano foriras al la fronto tiom bone ekipita kiom ili. Se, en la batala linio, la manĝaĵo prokrastiĝas, oni alportas al ili la solan, malsekiĝintan pecon da pano, postrestintan en la manĝosako.

Ĉu fremduloj? Neniam mi vidis kie ajn tiom multe da spontanea kora afablo, kiom inter tiuj ĉi kamaradoj, kiuj apenaŭ interkomprenas. Kaj mi ripetas la parolojn, kiujn iu kamarado formis, malrapide kaj preskaŭ mokete, por bone encerbigi ilin al mi:

„Todos los proletarios del mundo son hermanos!”

La 12an de oktobro.

Ni estis, ĉiuj kune proksimume dudekope, komisiitaj intertempe kompensi la perdojn de iu kompanio, troviĝanta jam du monatojn ĉe la fronto. Nelonge antaŭ la foriro iu kamarado

estis invitinta nin manĝi ĉe li ankoraŭ tiutagmeze. Kiel lerta metalindustria metiisto li loĝis en iom beleta dometo. Dum kiam lia edzino preparis la manĝon, li montris al ni sian legomĝardenon. La bedoj de terpomoj kaj tomatoj estis tute sekiĝintaj kaj malzorgitaj. „Perdido!” Estis nun la tria fojo, ke li iros al la fronto; tiuokaze neniu postrestis, kiu povas kontentige kulturi la ĝardenon. Kvinjara knabino kaj bubeto trijara premiĝis al sia patro kaj grimpis, dum la manĝo, sur liajn genuojn. Lia edzino kun okuloj ruĝaj pro plorado servis al ni. Kiam ni adiaŭis, ŝiaj lastaj paroloj estis: „no pasaran!” (oni ne trapasos!) Kaj eĉ de sur la vojo ni povis ankoraŭ vidi ŝin staranta kun levita pugno sur la verando.

„Niaj hispanaj virinoj suferis multe”, li subite diris serioze — „sed kion ni faru? Neniu alia vojo kondukas al la libero”.

Kiam ni marŝis al la stacidomo, la kamaradoj kantis „Internacio”, „La Juna Gvardio” kaj „Bandiera Roja”. Ĉiuj estis gajaj, sed neniu ebria, nek abunde brua. Inter ili mi vidis Nicasio, kiu estas dek-sepjara kaj Orubio, kamplaboriston el la montoj, marŝintan tri tagojn por militservi ĉe ni. La unuajn tagojn en la kazino ni ofte ridis pri Orubio, kiu en sia hararo, mallonga tondita, estis raziginta krucigitajn falĉilon kaj martelon. Ion tian oni ja povas elpensi nur en vilaĝoj! Iutagmeze, kiam mi iris flanke de Orubio tra Avenido de la Republica, li eksplodis subite kaj ŝajne senkaŭze per plorego. Li montris al virino mamnutranta infaneton, dum kiam knabino proksimume dujara tenis sin ĉe ŝiaj jupoj. „Ankaŭ la miaj estis trimonata kaj dujara”, li diris, „kiam la faŝistoj pafmortigis ilin kaj samokaze mian edzinon, ĉar ŝi ne volis diri, kie mi kaŝis min”.

De tiu momento neniu ridis plu pri la falĉilo kaj martelo de Orubio. Li mem klarigis pri tio jene: „Se eble la faŝistoj kaptos min, ili almenaŭ scios, ke mi estas komunisto!”

Ĉe la stacidomo apud Atocha la malplenaj manĝo- kaj dormovagonoj de la internaciaj trajnoj estis veturigataj sur

relfino. Sub la giganta arktegmento staris nur unu vaporbruanta trajneto forveturonta al la fronto. La duaklasaj vagonoj estis destinitaj por la soldatoj. Niaj kamaradoj okupis en ili lokojn same atente kiel se oni, ĉe aristokrata familio, eksidas en komfortajn seĝojn. Eĉ ne unu grateto estis rimarkebla sur la lignaĵo, nek makulo sur la veluraj sidlokoj.

En la vagono apud la nia estis eksidinta, inter siaj soldatoj, subkolonelo, portanta ankoraŭ la uniformon de l'malnova, regula armeo. Mi eksidis flanken de li kaj komencis, franclingve, konversacion. Li rakontis, ke li ankoraŭ kun Franco kaj Mola servis en Afriko. „Kiam eksplodis la revolucio”, li diris, „oni metis nin antaŭ la alternativon: ĵuri fidelecon al la respubliko aŭ, kun konservo de niaj salajroj, ekŝiĝi el la militista servo. Franco ĵuris fidelecon por tiom pli certe kaj plene havigi al si la militmaterialon de la respubliko. Por mi tamen ĵuro estas ĵuro kaj perfidulo perfidulo. En Toledo Mola masakris per siaj maŭroj sepcenton da niaj milicanoj, sepcent kaptitojn”. Li montris al la kamaradoj ĉirkaŭ ni en la vagono. „Sepcent virojn, kiaj ĉi jenaj. La plej bonan homan materialon, kiun Hispanio iam ajn havis. Kaj tiaj homoj nomas sin naciistoj!”

En la kupeo nun estis mallume. Ĉar ni venis en la efektivan frontzonon, la trajno pluveturis kun estingitaj lampoj.

Naval Perral estis la lasta loko, kiun niaj trupoj ankoraŭ okupas. Dum kiam post la montetara rando la mitraloj boje furiozis, oni veturigis nin tra la mallumo al konfiskita bien-domo. Ni volvis nin en niajn kovrilojn kaj dormis, kiom tio almenaŭ eblis, sur la pavima planko, uzante niajn dorsosakojn kiel kusenojn.

La redutoj konsistas el grizaj ŝtonegoj, jen kaj jen interligitaj per parapetoj el senzorge amasigitaj ŝtonoj. Post ni, en la profundo, situas Naval Perral, kie la grenadoj senĉese

eksplozas en nubojn da kirle supren blovitaj ŝtonoj kaj polvo. Antaŭ ni, sur la pli altaj montkrestoj ĉirkaŭantaj la vilaĝon, kuŝas, same nevideblaj post siaj ŝtonegoj, la maŭroj. Jam dufoje la vilaĝo estis en iliaj manoj, dufoje la kolono de Mangada rekonkeris ĝin al la malamiko. Nun ili klopodas triafoje fermi ĉirkaŭ ni la feran ringon, kiu nur tiuloke, kie la kirastrajno sur la fervojo senĉese al- kaj forveturas, havas mallarĝan aperturon en la direkto al Navas del Marques. Dume tiu ĉi ringo fariĝis jam tiom malvasta, ke tie, kie ni kuŝas, nia altebenaĵo estas atingebla ne nur de la malamiko kontraŭ ni, sed ankaŭ de la ĝenerale hazardaj kugloj el la dekstra kaj maldekstra flanklinioj.

Jam pleniĝos la tria tago, dum kiu ni kuŝas tie ĉi kaj ankoraŭ ne estas komunikinda ia heroa faro el nia kompanio. Post la granda bombardado de dimanĉo pasinta, kiam la malamiko ĵetis pli ol dumil grenadojn en nian vilaĝon, la stabo ĝenerale atendis atakon de maŭra kavalerio kaj streĉatente ni rigardadis antaŭ ni en la mallumon. Iuj kamaradoj diris: „Nepre zorgu konservi ĉiam unu kuglon! Se la maŭroj kaptos nin, ili ne simple pafmortigos nin, sed per siaj bajonetoj ili distranĉos nin vivaj en pecojn”. Niaj kartoĉuoj pendis malfermitaj kaj la manojn ni tenis sur la ĉanoj. Sed la atako prokrastiĝis. Laŭdire la maŭroj, deprimitaj de l'malvarmo, rifuzis ataki. Poste en la nokto eksplodis, kvazaŭ de rabie furioziĝintaj hundoj, la boja hurlado de l'mitraloj, ĉiufoje denove sur aliaj sektoroj de la fronto. Ĉe ni fajfis nur jen kaj jen, kvazaŭ kole-regaj vespoj, hazardaj kugloj super niaj kapoj aŭ sekasone enpremiĝis en la ŝtonojn de la parapeto. Ne la kugloj de l'kontraŭulo estis nia efektiva malamiko, sed la malvarmo kaj la pluvo. Dum tiu tuta unua nokto torentis senĉese la pluvo. Dum kiam malfortiĝis la streĉiteco kaj nur la gardostaranto observis, ni kuŝis, volvitaj nur en niaj kovriloj, frostotremante unuj apud aliaj sur la ŝtonoj, kiuj brilis pro la akvo. Ĉe la ma-

teniĝo novaj malpure grizaj nubomasoj malrapide alproksimiĝis rampe el post la montoj en okcidento. Iliaj kvazaŭperde forsvingitaj trenaĵoj volvis nin ĉiufoje denove dum minutoj en sian froste malvarman nebulon. Eĉ ne unu momenton trabrilis la suno. Post dudek horoj la ŝuoj kaj ŝtrumpoj estis trae malsekiĝintaj kaj la kovriloj pezis kvazaŭ plumbo sur la ŝultroj. La varma manĝo prokrastiĝis, ĉar la malamika artilerio estis ĵetinta kelke da grenadoj meze en nian kuirejan baterion. La duan tagon, kiam la malamiko elektis nian interligan linion al la vilaĝo kiel pafocelon, prokrastiĝis ankaŭ pano, kolbasoj kaj vino. Ĉi matene nia serĝento ventre rampis tra la pafa linio kaj revenis kun malgranda bareleto da vino kaj kelke da vinbergrapoloj. Ni ricevas po nur duona pokalo, „ĉar“, diras la kamaradoj, „multe trinkinte kun malplena stomako, oni jam ne povas pafi celtrafe“.

Kvazaŭ la kugloj fajfas malpli proksime super niaj kapoj ol hieraŭ, malgranda Nicasio iras trankvile ien kaj revene sur la ebenaĵo, tranĉante per sia bajoneto kardojn, per kiuj ni, post la plej granda ŝtonego, faras mizeran fajron, kiu havigas multe pli da fumo ol da varmo . . .

Tiumatene je la dek-unua preteriris la kapitano. „Ĝis la kvina ĉi vespere ni klopodu elporti tion, viroj! La tuta rezervo estas bezonata por la aliaj sektoroj, kie la malamiko konstante atakas. Nur tiujn mi povas anstataŭigi, kiuj nepre sentas sin malsanaj!“

Neniu anoncis sin.

En niaj tute malsekiĝintaj kovriloj ni kaŭris post la ŝtonegoj kaj Jezus Martin Perez, madrida stratpurigisto, kuŝanta apud mi, diris:

„Anstataŭo jam je la kvina! Tio eĉ superas mian atendon. Antaŭ du semajnoj ni kuŝis sammaniere inter la rokoj dum ok tagoj seninterrompe, el kiuj tri senmanĝe“.

Oni ne povas, miaopinie, sufiĉe akcenti, ke ĉiuj niaj mili-

canoj eĉ sen unu escepto estas volontuloj kaj ke niaj regimentoj konsistas nur el armitaj partiaj formacioj. De la roa de oktobro tamen validas la militistigo, enkondukiĝas la unuecigo de komando sub la militan ministerion, samtempe kun nova, demokrata, sed severe militista disciplino. Firme fidante la volon de l'popolo por venki, la registaro permesis, meze en la milito, al ĉiu, kiun la militistigo ne kontentigas, liberiĝi el la militservo kaj la roan de oktobro iri hejmen.

Tiuposttagmeze anstataŭis nin kompanio antaŭ kelke da horoj veninta el Madrid. Preskaŭ ĉiuj estis volontuloj, unuafoje venantaj al la fronto. Ne nur laŭaĝe, sed en sia tuta agado ili iom similis infanojn. Ili transprenis de ni la fusilojn kaj ni vidis iliajn lastajn vicojn kantante malaperantaj post la montetaran randon. La frazo: „sabemos vencer o morir” (ni scias venki aŭ morti), el „La Juna Gvardio”, estis al ili multe pli ol nura devizo.

Sen armiloj ni restis kiel rezervo en nia vilao. La tutan postan tagon ni povis el la turĉambro observi la operaciojn. La malamiko komencis lastesperan ofensivon kaj sukcesis, en kelke da horoj, bari la solan vojon ligantan nin kun Madrid. Nur nia kapitano havis revolveron. Kolere la viroj diris: „Se ili nun trabatos sin, la maŭroj tamen kaptos nin vivaj!”

El nordo oni komunikis novan flugistan atakon.

Tiumomente niaj serĝentoj venis kun la informo, ke en la granda teretaĝa salono nia politika delegito parolos pri la signifo de l'militistigo. Kvin minutojn poste la maŭroj kaj la flugistoj super niaj kapoj estis forgesitaj. Akre ardiĝis la pasioj en la diskuto. Estis inter ni kamplaboristoj ne povantaj kompreni la diferencon inter kapitalisma kaj demokratia disciplinoj. Ili diris: „Ni estis soldatoj sub la reĝo kaj ĝuste kiel volontuloj ni batalas, por ke niaj infanoj ne devu fariĝi soldatoj”. Aliaj diris: „Ni rifuzus laŭkomande pafmortigi kamaradojn pro ia ajn malprudentaĵo, eĉ se oni dekfaje ordonus tion al ni”.

Pli principaj kaj funde bazitaj estis la kontraŭargumentoj

de l'anarĥiistoj. Unu el ili formulis jene: „Ni estas la armita popolo, la batalantoj de l'revolucio kaj ni ne volas degeneri en senvolajn trupojn de burĝa registaro”.

Nia delegito atentigis, ke ankaŭ la sindikatistoj konfesis en siaj gazetoj la neceson de fera disciplino. Li diris, ke la komuna agado kaj la kontrolado de la partioj garantios, ke oni ne povu misuzi la trupojn. Li atentigis, ke ĝis nun niaj perdoj estis dekoble tiom grandaj, kiom ili bezonis esti ĉe militista disciplino kaj celkonforma ekzercado. Li akcentis la neceson de la venko, kiu, kontraŭ la militiste ekzercitaj trupoj de la ribeluloj, eblos nur ĉe nepra submetiĝo sub unu solan militistan gvidadon.

Ne farinte definitivane decidon, la kunveno finiĝis. La elektra kondukilo estis interrompita kaj ĉie en la koridoroj kaj ĉambroj la fenestrokovriloj estis fermitaj. En la mallumo ni palpe serĉis lokon por dormi. La fusilado malpliigis kaj ni eksciis, ke niaj trupoj rekonkeris siajn antaŭajn poziciojn.

Tri tagojn poste nia kompanio forpermeso revenis al Madrid. Tiuj, kiuj konsentis pri la militistigo povos, du tagojn poste, reanonci sin en la kazerno. Ĉi matene, sur la interna korto, mi revidis ĉiujn: Orubio, José, Nicasio kaj Jezus, la parolinton por la anarĥiistoj. Post unu alia ili ricevis sian novan soldatan libreton. Jezus salutis min laŭ la maniero de la anarĥiistoj, laŭ kiu la mano de unu ferme premas la manartikon de alia. Li ridis. Ni ja formas unu kompanion kaj ni restos kune. Ĉefafero estas la venko.

Post du tagoj ni do eble reforiros kun la samaj „friponoj” al la fronto. Oni diras, ke sur Sierra jam kuŝas neĝo!

La 20an de oktobro.

POST LA FRONTO.

Madrid ŝanĝiĝis! Mi jam konis Gran Via kaj Calle Alcalá

kun iliaj paradaj nubaltaj domoj kaj ilia parada elmontrado de luksaj aŭtomobiloj. Mi jam konis la supersatan aristokratecon de la internaciaj hoteloj, la bulvarojn, kie oni senokupe promenas kaj la trinkejojn, kie, ĉe senfinaj konversacioj eĉ la tempo en blua nebulo da cigareda fumo stabiligis. Mi jam konis, — en la subtera fervojo, sur la ŝtupoj de benkoj, hoteloj kaj teatroj, en parkoj kaj antaŭ la preĝejoj, — la invalidojn, almozulojn kaj patrinajn, ekspluatantajn la mizeron de siaj infanoj. Mi jam konis la kaŝitecon de la malriĉulaj kvartaloj kaj la biletantajn pintoĉapelojn de la *guardia civil*, impresantaj kiel lakitaj ĉerkoj.

La almozuloj malaperis, samtempe kun la *guardia civil*. La luksaj aŭtomobiloj estas konfiskitaj kaj krude surpentritaj per ruĝaj aŭ blankaj literoj. La enue kaj sencele promenantaj burĝoj malaperis el la stratoj. Anstataŭ ĉio ĉi svarmas en la stratoj uniformoj, aŭ pli ĝuste, — ĉar pri veraj uniformoj ne estas parolo! —, svarmas laboristoj en surtutaj kiteloj, koneblaj kiel milicanoj nur laŭ ĉapo, rimenzono, ŝnurligita revolvero aŭ surŝultra fusilo. Ĝuste ili donas al la urbo ĝian novan aspekton: la nemiskomprenoblan proletaran aspekton de l'revolucio!

Ne, nenie mi vidis, en la centro, en la popolkvartaloj, eĉ nur unu rompitan butikan fenestron. Ĉiuj butikoj estis malfermitaj. La malaltprezaj ĉionvendejoj same kiel la juvelejoj, la grandaj luksartiklaj magazenoj kaj la frukt- kaj manĝaĵvendejoj. Ĉio estis aĉetebla kaj la prezoj estis malpli altaj ol tiuj, kiujn ni pagis en Paris. Polico same kiel trafikpolico malaperis el la urbo. Rimarkinda estas la subita, preskaŭ tuta malapero de la krimo. Ĉiuflanke oni certigas al ni: „Nuntempe oni ne ŝtelas plu en Madrid!” Parte tio estas komprenebla. Kie la polico havas nur du okulojn, la proletaro havas da ili milon. En la nuna tempo ŝtelo estas ŝtelo malprofite de l'popolo; kaj la popolo punas kun senindulga severo.

Iun milicanon en nia kazerno, freŝfare kaptitan ŝtelante monujon, oni pafmortigis unu horon poste, kondamnita de siaj propraj kamaradoj. En iu kastilia vilaĝo oni pafmortigis la tutan revolucian komitaton, ĉar la membroj, konfiskante faŝistajn posedaĵojn, prenis aferojn por si mem.

La *alvarez* diris al mi: „Por ni la afero estas tre simpla. Temas ne nur pri „venko aŭ morto”. Sed se ni mortos, mortos kun ni ĉiom da espero, da progreso, ĉio, pro kio valoras la vivo. Ĉio arta, intelekta, humanisma en Hispanio troviĝas niaflanke, kaj aliflanke la plej aroganta, plej malprudenta burĝaro, la plej impertinenta terposedantaro kaj la plej senscia pastraro, kiujn la mondo iam ajn konis. Pro tio ne povos finiĝi tiu ĉi batalo tiom longe, kiam vivos ankoraŭ deko da homoj efektive amantaj Hispanion. Ĉiufoje denove eksplodos la revolucio”.

Kaj la eklezio? oni certe demandas. Ĉu iu kuraĝas malkonfesi, ke la religion kaj ĝiajn servantojn oni persekutis laŭ plej terura maniero kaj ke la sango de la pastroj denove fluis kiel en la tempo de l'unuaj kristanaj martiroj?

Sed ni ne juĝu tro facile! En domo krimula oni ne parolu pri peko! La hispanan eklezion, kies historion makulas aŭto-dafeoj kaj inkvizico, ne teruru sango! Ankaŭ la liberpensuloj havas siajn martirojn; ni memoru nur la nomon de Ferrer! Oni mortigis pastrojn, sed multaj el ili portis en unu mano krucon kaj en la alia revolveron. Oni eksplodigis preĝejojn, en kies turoj kaŝiĝis mitraloj, kaj oni bruldetruis monaĥejojn, post kies muroj mahometanaj pafistoj manipulis siajn fusilojn!

La flugmaŝinoj, kiuj bombardas la popolkvartalojn kaj lernejojn en Madrid, portas benitan skulptaĵon de Sankta Kristoforo kaj sur ĉiu tanko de Franco troviĝas emajlita bildo de la Sankta Koro de Jezuo! Ĉu ni per tio malkonfesu, ke ĉie, escepte en Baskio, eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj la preĝejoj estas fermitaj, la pastroj forpelitaj aŭ mortigitaj kaj la monaĥoj forkurintaj?

Nepre ne!

Ne la revolucia popolo, sed la eklezio mem defendu sin kontraŭ la plej terura akuzo, kiun la historio povas menci.

De la epoko de la maŭroj la katolika eklezio en Hispanio regis senlime super tiu ĉi 25-milionhoma popolo. Maŭroj kaj judoj estis forpelitaj kaj la herezuloj bruligitaj. Registaro, instruado, filantropio, gazetaro, arto, cenzuro estis sub ĝia potenco. De naskiĝo ĝis morto ĝi influis la vivon de ĉiu hispana civitano. Senmezuraj estis ĝiaj trezoroj; pli grandnombra ol en kiu ajn alia lando de l'mondo estis ĝia pastraro.

Nun tamen, post pli ol dek jarcentoj da oficiala katolikismo, la popolo starigas la bilancon; nun pruviĝas, ke la senlaca agado de la pastroj semis en la korojn de milionoj da laboristoj kaj kamparanoj nenion krom profundaj malestimo, malamo kaj furiozo kontraŭ eklezio, kiu dum ĉiuj ĉi jarcentoj estis la konscia kunhelpanto de fiekspluatado kaj subpremado.

Ĉiun tagon novaj dekmiloj foriras spontanee al la batalkampoj. Senescepte ĉiuj estas baptitaj kaj partoprenintaj la unuan komunion; multaj estas eklezie edzigitaj; ĉiuj iam aŭskultis la pastron sur la katedro predikanta pri infero kaj eterna kondamno.

Sed el ĉiuj ĉi dekmiloj eĉ ne unu timas la eternan kondamnon; neniu sentas en la horo de l'morto bezonon pri la lastaj sakramentoj de la pastro. Mi vidis ilin mortantaj sur la batalkampoj kaj iliajn okulojn mi komparis kun piedpremitaj floroj.

Eĉ la malamiko konfesis la heroan kuraĝon, kun kiu tiuj ĉi liberpensuloj scias morti.

Ĉu estas imagebla pli forta akuzo kontraŭ la eklezio, ol ke centmiloj da ĝiaj filoj kun la morto antaŭ okuloj konscie rifuzas por si mem ĝiajn sakramentojn?

Mi memoras la nervan, fortspirititan personon Bergamin, la konatan katolikan filozofon kaj verkiston. Liaj movoj estas

iom rigidaj, pro kio li iafoje similas kvazaŭ invalidon. En vero li estas konstanta fonto de energio kaj entuziasmo. Alberti diris pri li: „Bergamin estas la plej heroa el ni ĉiuj”.

En iu malgranda restoracio en Madrid mi parolas kun Bergamin; kontraŭ mi sidas iu, kvazaŭ vokanta en la dezerto kaj aŭskultas, aŭskultadas, ĉu iu post la horizonto respondas la vokon de frato.

„Mi scias”, diras Bergamin, „ke la socia renaskiĝo de l’kato­likismo estas same necesa kiel la moraliĝo de l’komunismo, kiu sen tio degenerus en marĉon de oportunismo. Mi scias, ke komunio kaj komunismo deriviĝis de la sama vortradiko kaj ke, spite al kies ajn racio, niaj koroj jam interamikiĝis, ĉar ni ĉiuj postulas juston por tiuj modestuloj en la mondo, kiuj al Kristo estis plej proksimaj. Ne estas hazarde, ke la apostoloj de Kristo estis laboristoj, sed ne generaloj kia Mola!”

BERGAMIN, KATOLIKO KAJ REVOLUCIULO.

Ĉe la unua renkonto oni demandas sin, sur kiu pentraĵo de Greco oni jam iam vidis tiun ĉi plene spiritiĝintan vizaĝon. Senvole oni okule serĉas ian korpan kriplaĵon kaj nur poste rimarkas la belan viran vitalecon en tiu ĉi ŝajne malfortika figuro. De l’unua momento oni certas pri lia spirita supereco super lia tuta ĉeestantaro; sed la varma humaneco, elradianta el li, estas tiom intensa, ke ĝi jam anticipe ekskludas ĉiun ajn senton de malplivaloro. En kunesto de Bergamin estas, kvazaŭ figuro kia Francisko de Assizi subite reenkar­niĝis ... Bergamin estas filo de unu el la plej konataj advokatoj en Madrid, kiu estis konservativa ministro sub la reĝa reĝimo. Mem li studis juron. Liaj amikoj diras ride: „Tio estis eraro, ne estas juro, sed Justo, pri kiu Bergamin dum tuta sia vivo sentis interesiĝon”. Por li tiu ĉi sento por justo estas nerompeble ligita al lia profunde katolika vivprincipo.

Apud mi, ĉe la malgranda restoracia tableto, sidas la viro, kiu, kiam la registaro petis al li kiel katoliko lian konsilon, deklaris sin *kontraŭ* remalfermo de la madridaj preĝejoj: „Prefere la katakombojn; tio estas almenaŭ sincera. La problemo de l'hispana katolikismo estas tro profunda, ol ke oni povas, por la eksterlanda propagando, kontentiĝi per nur oportunisma aranĝo. *Ne temas pri fermo aŭ malfermo de preĝejoj, sed pri la purigita rekreiĝo de l'vera katolikismo en la koroj*”.

Tiel scias paroli nur la viro, kiu jam antaŭ tri jaroj en la titolon de sia revuo fiksis la programon pri senindulga batalo kontraŭ ĉia manko pri energio. Tiu ĉi revuo nomiĝis: „Cruz y Raya”, malfacile tradukebla hispana vortludo, signifanta „tabula rasa”¹⁾ kaj krome „plus aŭ minus” kaj „jes aŭ ne”. „Cruz y Raya” evoluis el literatura revuo ĝis eldonejo, liveranta ĉion, kio, laŭopinie de Bergamin, enhavas pli profundan humanan valoron. Ĉe „Cruz y Raya” aperis ne nur verkoj de Malraux kaj Alberti, sed eĉ la famaj hispanaj mistikaj verkoj. „Cruz y Raya” eldonis verkojn de modernaj hispanaj kaj hispanamerikaj poetoj, same kiel biografion de Sankta Katarino de Siena, la studaĵojn de Bergamin pri Lope de Vega kaj la reeldonojn de la famaj hispanaj klasikuloj.

Dume aperis tie ankaŭ la sprite entuziasmaj verkoj de Bergamin mem: kolekto da aforismoj: „La raketo kaj la steloj”, lia dramo: „Tri scenoj sub 90°”, lia verko pri la taŭromahio: „La kapo plena de birdoj” kaj „Disparadero Español”, kiun titolon mi ne scias traduki.

En mallonga tempo „Cruz y Raya” fariĝis la centro, kien kolektiĝis ĉiaj nuancoj de l'hispana intelektularo, fonto de revolucia energio sur ĉia tereno de l'spirita vivo.

Ĝi tamen ne miksis sin en la ordinaran politikon. „Invitante

1) Latindevena sentenco signifanta proksimume: rekomenci kun bona intenco, pura koro, repurigita konscienco. Trad.

matematikiston verki ion pri matematiko aŭ muzikiston pri muziko," diras Bergamin, „mi eĉ ne demandis min mem, ĉu lia politika konvinko kongruas kun la mia. Tiom forte mi estas konvinkita, ke ĉia vera scienco, ĉia vera arto kaj ĉia nepre vera religio finfine havas la saman rezulton: servadon al la homaro”.

En „Las cosas claras”, citaĵoj el la grandaj hispanaj pensuloj kaj poetoj, Bergamin klopodis pruvi ĉi tiun unuecon de l'homa volado kiel la ruĝan fadenon traŭrantan la tutan hispanan, eĉ la tutan internacian kulturon: „Ĉiam la granda tradicio de Hispanio estis revolucia. Ĉiu pensosistemo estas dialektike konstruita el du maloj: la konservativa volo konservi la eterne validajn verojn kaj la revolucia tendenco celanta, en forpasa rilato, konstantan progreson. Niaj klasikuloj estis grandaj, ĉar ili konstante havis vivan kontakton kun la popolo; kaj ĉi tie en Hispanio la ideo „popolo” sinonimas kun la ideo „revolucio”.

En ĉi tiu humanismo Bergamin vidas la principon, kiu, super la limoj de la politikaj partioj, povos fariĝi la bazo por unuiga fronto pli efektiva ol nur oportunisma.

„Ĉie estas la homo”, li diras, „kaj ĉio estas por la homo. Mi estas kristano, ĉar en Kristo Dio iĝis homo, kia mi estas. Se en Dio ni ne vidus homon, ne eblus al ni efektive rilati kun Li. En tiu ĉi kredo pri la homo, tamen, kristanoj kaj ne-kristanoj povas spirite interrenkonti. *La celo de l'kristanismo estas la spirita renaskiĝo de la homo*, sed tre rimarkinde estas, ke nuntempe mi povas paroli pri la „renova homo” nurnure kun komunistoj. Ankaŭ Nietzsche, kiom ajn malamike li rilatis al la kristanismo, serĉis en sia „Uebermensch” nur ĉi tiun renovan homon, kiun ankaŭ ni alcelas, kaj kiu, en formo alia, estas la ĉiufoje revenanta temo de la rusa moderna literaturo. Tiu ĉi literaturo parencas al nia pensa vivo, ĝuste pro tio, ke ĝi, same kiel ni, kredas, ke ĉiu homo jam en la nuno portas en si la ĝermon de ĉi tiu „renova homo”.

Ekzistas tamen ankoraŭ io alia, kio unuigas nin.

Depraepoke la homaro konas la ideon *raso*. Laŭvorte raso signifas: *postesignon*, la postesignon de la sango trairanta la tempon. Tiuj, kiuj, kiel la nunaj nacisocialistoj, rigardas la rason sia idolo, estas la sklavo de l'heredo de la sango. Sed ĝuste tial venis Jesuo Kristo, por ke Li per Sia sango liberigu nin el ĉi tiu heredo. Sian sangan Li fordonis por pruvi, ke sango *ne* estas la plej alta ideo. Tial la kristanismo instruas, ke la kredo fariĝu al ni kvazaŭ sango. La kredo tamen, kaj la spirito estas unusama. Trafe tio esprimiĝas en la Eŭkaristio, en kiu ni nutras nin per la Karno kaj Sango de l'Savinto, kaj per tiu ĉi materia unuiĝo samokaze ekhavas spiritan kontakton. Jam ĉe sia promeso tiu ĉi Sakramento kaŭzis indignon, ĉar oni opiniis ĝin tro materia, tro konkreta — mi eĉ volus diri: tro materialisma. En la katolika eklezio tamen, ĉi maniere ĉio estas „materialisma“; kaj tial mi volonte asertas, ke filozofiasence kristano ne povas esti idealisto, sed ke la historia materialismo estas al ni multe pli proksima ol oni ĝenerale kredas. La spirito ja fariĝu al ni karno kaj sango. Kristo fordonis Sian Sangon por, per la spirito, liberigi nin el la sklaveco al raso, familio kaj posedo. La oferdono de Kristo estis servo *al la homaro*; kaj ĝuste tial ke ni estas kristanoj, interesas nin nur la homo.

Malraux estas proksima al ni, ĉar en la „homa manko“ li serĉas kaj transas la limojn, kiuj malhelpas la homon iĝi vera homo. *André Gide* estas al ni proksima, ĉar lia tuta aktivado estas serĉadi tiun renovan, feliĉan homon. *Karl Marx* estas al ni proksima, ĉar li serĉas la materiajn bazojn, sur kiuj tiu renova homo povos kreiĝi.

Kiel katoliko mi interesiĝas pri ĉiu pensulo kaj ĉiu reformanto, kiuj serioze serĉas la vojon por fari al la homo la vivon konstante pli homa.

Kaj kvankam sur multaj terenoj de l'pensado ni interdiferencas, mi tamen akceptas la parolojn de *Malraux* kiel miajn:

„Pri la vivo ni ĉiam povas interkonsenti, eĉ havante diferencajn opiniojn koncerne la morton!”

„Kian parton de l’hispana popolo”, mi demandas al Bergamin, „vi povis atingi pere de „Cruz y Raja”?”

Senhezite li konfesis: „Nur tre malgrandan malplimulton da intelektuloj. Nia revuo havis eldonkvanton da 1700 ekzempleroj, el kiuj krome eĉ granda parto iris al Ameriko. La oficiala mondularo, la granda gazetaro kaj la pastraro ignoris nin per silento, kio estis pli malbona ol kontraŭagado. Krom tio en tuta Eŭropo oni eble ne povas imagi burĝaron, kies spirita vivo ĝenerale estas tiom malaltnivela kiom en Hispanio. Kio tamen plej multe ĝojigis min, estas la kompreno, kiun mi ĉe mia agado ĉiufoje trovis ĝuste inter la modestuloj kaj analfabetoj en la ordinara popolo. Mi memoras, ke mi iam faris kelke da prelegoj en Asturio pri Dostojevski kaj pri Cervantes, du kristanaj aŭtoroj, kiujn mi kutimis preferi super ĉiuj aliaj. La burĝaro kunvenis sufiĉe grandnombra por propraokule vidi la mirigulon: katolikan revoluciulon. Aplaudeto pro ĝentilo estis la sola respondo al mia parolado. Poste en la salono tamen, sidis dudeko da ministoj kaj en ilia nomo unu el la kamaradoj venis hezite al la podio por fari kelke da demandoj. Ĝuste tiuj demandoj pruvis al mi, kiom ili partoprenis en miaj paroloj kaj kiom ankaŭ iliaj koroj sentis tion, kion iliaj neinstruitaj intelektoj ne povis kompreni. Mi memoras, ke alifoj mi estis invitita paroli en Burgos pri Lopé. Al la peto aranĝi tiun ĉi kunvenon la guberniestro eĉ ne respondis, per tio evitante plejeble malkuraĝe kian ajn decidon. Sed la laboristoj de Burgos decidis nepre okazigi la kunvenon kaj mi parolis antaŭ ili en teatro plenigita ekskluzive de proletoj. Laŭ ilia propra peto mi ne tuŝis — por eviti politikajn komplikojn — ĉiun ajn aktualaĵon, kaj malofte mi faris prelegon pli pure filozofian kaj akademian. Sed forlasinte la salanon mi iris surstrate inter du vicoj da laboristoj, salutantaj min

per levitaj pugnigitaj manoj. Ili plene identiĝis kun miaj pensoj.”

Kiam Bergamin parolas pri la popolo, liaj vangoj komencas ardiĝi kaj lia vizaĝo preskaŭ ekhavas esprimon de ekstazo. Por li ne estas la popolo, kiel por la faŝistoj, la senenergia amaso da malsuperaj homoj, bridenda de eta grupo da regemuloj; por li la popolo estas la ĥaoso, el kiu kreiĝos nova mondo, la neelĉerpebla rezervujo da fortoj, el kiu ĉerpu ĉiu pensulo kaj ĉiu poeto, se ili volas ne esti izolitaj ekster la vivo mem. Same kiel por Wies Moens, antaŭ ol li fariĝis faŝisto, tiel por Bergamin la popolo estas la „patrino de la generacioj”, la origino kaj kaŭzo, al kiu refluas ĉio havanta homan racion.

Mi demandas al Bergamin, kiun lokon povas okupi la eklezio kiel organizo en ĉi tiu lia sistemo prefere elektanta la simplan homon el la popolo.

„Sed”, respondas al mi Bergamin, preskaŭ naive, „ĉu do la eklezio estas io alia ol la popolo mem, la komuno de ĉiuj kredantaj la kristanan veron? Ne izolita, sed nur en komuno la homo povas realigi la kristanan juston surtere. Jen la granda eraro de l’protestantismo: opinii, ke la homo individue, sed ne en komuno kun aliaj, senpere povas trovi Dion. La vojo al Dio estas la konstanta komuniĝo kun aliaj, kaj ĉi tiu komuniĝo konkretiĝas en la organizo de l’eklezio. La neceso de organizo de tiu ĉi komuno mi agnoskas senrezerve; sed ĝuste tial, ke tiu organizo estas neeterna, ĝi ne estas, kiel ĉiu alia organizo surtere, nelibera je erarado kaj koruptado. Tia korupto tamen, okazas preskaŭ tuj kiam la eklezia organizo ekokupas terenon, kiu ne estas ĝia, alivorte, tuj kiam ĝi fariĝas politika. Tiumomente la ekleziularon anstataŭas la klerikalismo kaj *tiam estas mia tasko*, kiel observema katoliko, kritiki la monstran interligon de l’eklezio kun la potencoj de la mondo”.

La pensoj de Bergamin estas por mi ideoj el nepre alia

spirita mondo ol tiu, en kiu mi kutimas vivi. La pasio kaj animnobeleco de Bergamin tamen, estas la samaj kiaj tiuj, kiujn mi ekkonis ĉe la plej bonaj komunistoj de nia epoko. Ankaŭ Bergamin, se li starus antaŭ la juĝisto, atestus kiel Dimitroff. La interparolo kun Bergamin plifortigis mian konvinkon, ke kontrastoj, kiujn oni imagas netranseblaj, eble estas malpli profundaj ol oni komence kredas, kaj ke la faŝismo, krom la multa malbono, kiun ĝi kaŭzas en la mondo, havas almenaŭ la jenan bonan flankon, ke ĝi pli kaj pli interproksimigas la plej bonajn homojn el ĉiuj progresemaĵaj partioj en unu saman bataladon por nova, pli feliĉa homaro.

Madrid, la 23an de oktobro, 1936a.

Certe, de kiam mi skribis al vi mian lastan leteron, la aspekto de Madrid grave aliĝis. Revenante el Naval Perral niaj ŝarĝveturiloj grimpis supren laŭ la krutaj deklivoj de Sierra. La frosta nokta vento penetris tra niaj vestoj kaj la solo varmiganĵa estis la kantado de la kamaradoj. Fantome la fortikaj blankaj muroj de Aescorial leviĝis el la mallumo. Malpli laŭte bruante niaj veturiloj malsupreniris al la ebenaĵo ĉirkaŭanta Madrid, kaj tuj la temperaturo mildiĝis. Jam la sekvintan tagon ni ĝuis, sur la madridaj bulvaroj, la bonfaran varmon de l'somero. Sub la brilanta suno la ĝojo ne povas tute morti. Ankoraŭ nun Madrid estas gaja urbo kaj oni sentas tie kvazaŭ senfine daŭran ferion. Sed ĉi tiu ĝojo bridigiĝis kaj digniĝis pro la seriozo de la situacio kaj la aranĝoj de la registaro. Ne senmotive Mola certigas, ke interne de Madrid li disponas pri kvina, sekreta kolono. Vestitaj en milicanaj surtutaj kitoj kaj havante ofte falsajn identigilojn, la malamikoj de la respubliko kunvenis en kafejojn kaj sur la terasoj priparolis siajn planojn. Kelkfoje ili pafis kiel kaŝmurdantoj el la mallumo. Iuokaze faŝistoj pafis noktmeze sepfoje al la konstruaĵo de nia Alianza.

La kontrolo estas treege severigita; nur kelke da kafejaj terasoj estas surireblaj kaj je la deka vespere oni fermas la restoraciojn kaj teatrojn. Sen speciala permeso neniu rajtas esti post la dek-unua surstrate. Tiuhore ĉiuj lampoj estas estingitaj aŭ kolorigitaj bluaj, kaj ĉiuangule de la mallumaj stratoj postenas gardistoj. Tage grandaj manifestacioj de virinoj trairas la urbon. Oni aktivas laŭ la devizo: ĉiuj virinoj eklaboru, por ke ĉiuj militkapablaj viroj povu iri al la fronto aŭ okupiĝi por la fortikigado de Madrid.

Vespere niaj kompanioj faras propagandajn marŝojn tra la stratoj. Jen kaj jen ni ekhaltas kaj iu laboristo alparolas la popolon. Ni marŝas inter vicoj da pugnigitaj manoj kaj la bruaĉo de niaj paŝoj supersonas „viva!“-krioj el la popolamaso.

Fine la registaro faras la nepre necesajn aranĝojn. Riproĉinde estas nur, ke tiuj aranĝoj tre malfruas, efektiviĝas nur en plej krizaj momentoj kaj pro forta insistado de l'popolo. Interalie ni fine havas, de la deka de oktobro, la nepre necesan unuecon en komando. Kvankam koncerne la militekzercadon restas ankoraŭ multego dezirinda kaj kvankam oni forbabilas terure multe da tempo, oni tamen povas vidi rimarkindan pliboniĝon en la disciplino de la trupoj. Kun fusiloj ni ne promenas plu, sed ni marŝas. Mankas al ni sufiĉe da kartoĉoj por regule ekzerci nin, sed tamen jam ne foriras trupoj, kiuj ne pafis almenaŭ unu- aŭ dufoje. Ni lernas la elementajn metodojn de marŝado laŭ tirajlora linio kaj de falsinkaŝo. Ankaŭ en tio la fervoro kaj bona volo de la soldatoj kompletigas la nesufiĉan scion de la instruantoj. Oni pripensu, ke tiu ĉi popolo estis la plej anti-militarista en la mondo kaj ne havas spertojn el la mondmilito. Ekzemple pri la grandega signifo de pikildrato kiel defendilo kontraŭ kavaleriaj atakoj oni preskaŭ ne havas scion.

Fine oni ĉesigis la tutan konstruan laboradon, sed la tempo por tio jam urĝegis. Ankaŭ la enkonduko de distribuaj biletoj por nutraĵoj kaŭzis en la lastaj tagoj grandan plibonigon.

Efektiva manko pri nutraĵoj ne ekzistas, sed la normalan distribuadon multe subfosis provizaĉetado de tiuj, kiuj povis disponi pri mono.

La dekreto de l'registararo pri divido de faŝista terposedaĵo havaskompreneble grandan politikansignifon. Sed praktike ankaŭ en tio la popolamasoj jam antaŭ longe antaŭagis la registaron.

Mi havas tamen grandegan fidon en la revolucia forto de tiu ĉi popolamaso mem kaj admiras la disciplinon, laŭ kiu oni prokrastas ĉiun diskuton ĝis post la venko. Politike nevalidiĝis la malnova devizo „no pasaran!” (ili ne trapasos!) kaj nia nova devizo estas „pasaremos!” (ni trapasos!).

Ĉe taglumo ĉio aspektas multe malpli grava; la stratoj estis same homplenaj kiel dimanĉe en Amsterdam. La aeroplanoj cirkle flugis super la urbo, kiam je la dek-unua horo la popolo amase plenigis la teatron Español, kie oni ludos teatraĵon de Ramon kaj kie ankaŭ parolos la burĝe maldekstra parlamentano por Sevilla, Aquillar (profesoro pri historio). Pro la ruĝa kaj ora koloroj kaj la modesta lumigado la salono faris impreson pri literatura prezentado. Mi diru, ke Aquillar parolis tre bone, kvankam li speciale akcentis, ke li parolas kiel liberalulo neniam sentinta simpatian por la komunismo. Li atentigis pri tio, kun kiom grandega pacienco la hispana popolo elportis sian malriĉecon, ne kompareblan kun la malriĉeco de kiu ajn alia popolo. Tiu ĉi popolo respiris, kiam kreiĝis la demokrata respubliko, de kiu ĝi lastinstance esperatendis sociajn plibonigojn. La respubliko tamen, agis neniel radikale. La enspezimposto sumiĝis, eĉ por la plej grandaj kapitaloj, nur dek kvar procentoj. La eklezio, disponanta pri grandegaj trezoroj, ne pagis imposton. La jezuitan ordenon oni likvidis, sed la ordenanoj povis senĝene resti en la lando. Oficiroj, rifuzintaj la ĵuron al la respubliko, ricevis provizoran pension egalan al ilia antaŭa salajro. Sed eĉ tiujn ĉi nemultajn, hezite faritajn reformojn ne volis toleri la grandterposedantoj kaj la militarista

partiaĉo. Ili prenis la armilojn, kaj la laŭleĝa registaro povis defendi sin, fidante nur la proletaron. En tiuj ĉi momentoj evidentiĝis, ke la veraj trezoroj de Hispanio ne kuŝas kaŝitaj en la bankaj keloj, sed en la noblanimaj koroj de l'hispana laborista klaso. Aquillar finis sian paroladon dirante: „Al tiu ĉi popolo ni volis doni indajn al homoj vivcirkonstancojn, normalajn en ĉiu alia demokratio. Ni opiniis, ke ni povos fari tion laŭ la muziko de „el hymno de Riego” (la popola himno de l'republiko). Pruviĝis tamen, ke eĉ la plej simplajn reformojn ni povis enkonduki nur laŭ la muziko de „Internacio”.

Madrid, la zan de novembro.

Verkante mian raporton pri la aspekto de Madrid, mi ricevis neatendinte informon el la kazerno, ke la sekvontan tagon, do hodiaŭ, ni reiros fronten. Ĉar je la naŭa mi devos esti ĉe la kazerno, mi ellitiĝis je la sesa, por ke mi povu ankoraŭ skribi iom al vi. La tagoj en Madrid forflugis. Post la mizero ĉe la fronto mi ekloĝis subite en gastoĉambron en la iama palaco de la duko de Herida Spinola. La plej agrabla el ĉio estis laborĉambro por mi mem. Kiom multe mi laboris kaj kiom mi povus ankoraŭ labori en tiaj cirkonstancoj!

Elirinte la ĉambron mi renkontas malsupre en la halo aŭ en la salonoj la aliajn kamaradojn-artistojn. La revolucio tuŝis ilin per sia seriozo kaj ni ĉiuj fariĝis unu granda frataro.

Antaŭhieraŭ mi havis la grandan ĝojon renkonti Ludwig Renn en „Alianza”. Senbrue kaj sensensacie li venis tien ĉi. Akcente li deklaris: „Mi venis ne kiel verkisto, sed kiel ekstaboficiro de l'prusa armeo”. Kia eminentulo! Impona pro modesteco, kun simpatia koreco kaj la sola deziro batali inter kaj kun niaj milicianoj. Kia evoluo! Nobela oficiro, antimilitaristo, komunisto, malliberigito, — kaj nun: „la ĝojo, ke mi fine povos utiligi mian militistan scion por popolo kaj afero al mi karaj!”

Renn tuj eklaboris kaj ĉiuj loĝantoj de „Alianza” helpas al li. Estas admirinde kaj kortuŝe, kiel tiuj ĉi artistoj kaj intelektuloj kun plena sinforgeso kaj kun plejeble grandaj precizo, fervoro kaj genio plenumas la plej necesajn taskojn! La unua, kion Renn faris, estas verki malgrandajn trafikajn devizojn, el kiuj esprimiĝas la ĉefaj agadreguloj por la soldato en*la batalo. Desegnistoj tuj komencis ilustrati ĉi tiujn devizojn kaj antaŭ ol dudek kvar horoj pasis, la flugfolioj estis pretaj. Hieraŭ vespere paroladis Renn kaj kelke da hispanaj verkistoj en la partia salono apud nia kazino. Diferenco inter salono kaj podio ne rimarkiĝis. Ĉiu parolo trafis sian celon, tuŝante la amon kaj pasion de centoj da sindediĉaj koroj. Kvazaŭ ŝipoj la okuloj sekvis la onde gestantajn manojn. Maria Theresa Leon similis subakviĝiston, pretan ĵeti sin en la muĝantaj ondojn de l'amaso. La voĉo de la malgranda eleganta poetino estis kvazaŭ la vibre sona voĉo mem de la virinoj, kies mizeron, atendon kaj esperon ŝi esprimis. Ĉi tiuj uniformitaj poetoj estis la fratoj mem de la milicanoj en la salono, kun kiuj ili estis starintaj ĉe la sama fronto kaj kies pensojn ili interpretis. Tio ĉi jam ne estis kunveno, sed publika konfeso, preskaŭ religia ekstazo, spirite levanta la tutan popolon. Kaj tamen oni parolis nur pri la plej praktikaj demandoj: kiel ni organizu ĉiujn ĝis la lasta viro kaj la lasta virino por la defendo de Madrid?

Nia foriro ne okazos neatendite. La unua, dua kaj kvara kompanioj formariĝis jam hieraŭ, ritme paŝante kaj kantante. Edzinoj kaj patrinoj staris sur la trotuaroj, salutante la trupojn per pugnigitaj manoj. Tia bataliono marŝanta tra la kvartalo konsistas el preskaŭ ekskluzive viroj el la kvartalo mem. Ankoraŭ parton de la vojo malgrandaj knaboj akompanas siajn forirantajn fratojn. El ĉiuj domoj, kiom ajn mizeraj, pendas ruĝaj tukoj aŭ flagoj. Tio atestas pri fiera ĝojo tiom bela, ke la postrestantaj batalionoj envasias siajn forirantajn kamaradojn.

La febro reiri fronten ardigas al ni ĉiuj la sangon. Por fine kvitigi la konton! Por fine frakasi la faŝismon! *No pasaran!*

La montriloj de mia horloĝo turniĝas multe tro rapide.

Ankoraŭ dek minutojn kaj poste mi devos foriri. Mi scias certe, ke neniu mankos. Jen pruvo pri nia libervola, proleta disciplino en armeo, en kiu eĉ la vorto „puno” estas nekonata, armeo, en kiu ĉiu plenumas sian devon, neniam aŭdinte pri elirmalpermeso aŭ ĉelpuno, armeo kvazaŭ klubo de piedpilkludantoj, en kiu ĉiuj kuneagadas, sed sen rigardantoj kaj sen persona ambicio. Ni scias, ke nin atendas la plej fortega ofensivo, kiun Mola povas efektivigi per ĉiom da sia teĥniko kaj ŝtalaj armiloj. Sed ni scias, por kio ni batalas, kaj ni venkos. Diru tion al la kamaradoj en Nederlando!

Madrid, la 16an de novembro.

... Ĵus mi revenis el la tranĉeo kaj laŭcirkonstance fartas bone.

Ĉi fronte kaj okaze de l'sieĝo de Madrid mi spertis tiajn terurajn tagojn, ke mi ankoraŭ ne povas trankvile skribi pri tio. —

Sed unu aferon mi tamen povas skribi al vi: kiom ofte en tiuj ĉi tagoj mi memoris vin . . . Nek en la danĝero — nek en la tranĉeoj dum elaera atako, kiam eskadro de dek du aeroplanoj ĵetis dudek bombojn sur nian linion, nek apud Getafé, kie kvin kirasautomobiloj dum kvar horoj pafadis al nia linio — ni timis eĉ unumomente. —

Tion kaŭzis ne nur la fakto, ke ni batalas kun bravaj kamaradoj, sed precipe, ĉar ni scias, ke de ĉio ĉi dependas via estonteco.

Mi scias, ke ni eble malvenkos en tiu ĉi batalo kaj ke tiuokaze venos tre malfacila tempo por la laborista klaso, ankaŭ en Nederlando. —

Sed mi scias ankaŭ, ke per malvenko ne finiĝos la batalo por nova sociordo — kaj ke nova generacio rekomencos la batalon. — — —

Madrid, la 20an de novembro.

Neniam, pri tio mi estas certa, la mondo spertis ion tiom teruregan, kiom ĉi tiu seninterrompa bombardado al tute sendefenda milionhoma urbo. Neniam, en kiu ajn lando, la trupoj, kiuj kuraĝas nomi sin blafeme kontraste „naciaj”, esprimis tiom bestialan kruelon kontraŭ virinoj kaj infanoj de sia propra ĉefurbo. Ĉar, kaj oni ne povas sufiĉe akcenti tion, ĉi tiu tuta bombardado estas nepra teroro, ne turnanta sin kontraŭ trupoj, nek havanta ian militistan celon, sed ekskluzive celanta ekstermi la civilan loĝantaron. Mi vidis la bombojn falantaj sur la malriĉulan kvartalon, kies virinoj iam alportis al ni sian lastan panon kaj sian lastan vinon. Jam neniam mi povos forgesi la teruregajn ĝemadon kaj dolorplendadon, sonantajn el la ruinaĵoj. Mi vidis la kadavretojn de infanoj forportataj en ŝarĝaŭtomobiloj; mi vidis la domarojn, kies fasadoj estis forŝiritaj, pro kio la tuta mizero de la laboristaj loĝejoj eksteren montriĝis. Tagmeze, matene, nokte falas la bomboj, sur Puerta del Sol, la plej multhoman placon de la urbo, sur la hospitalon Don Carlos, sur la palacon Liria, kiu estis unu el la plej famaj muzeoj de la urbo, eĉ sur la katedralon, en kiu, laŭdire de Franco, oni liadezire celebros meson tuj, kiam li estos okupinta la urbon. Dum iuj tagoj la tuta admirinda silueto de la urbo kaŝiĝas en pulva nebulo; dum iuj noktoj la tuta urbo estas, pro la fajroj de disblovataj bruloj, lumigita kvazaŭ piroteĥnike.

Kaj malgraŭ ĉio ĉi, kvankam la malamiko staras distance de apenaŭ ok kilometroj de Puerta del Sol, kvankam la faŝistoj paraŝute faligis korbbon enhavantan la distranĉitan kadavron

de unu el niaj aviadistoj, kvankam ĉie la morto teruras, la homoj daŭrigas sian laboron senpanike kaj kun heroeco apenaŭ imagebla.

Pri kapitulaco neniu pensas. En ĉiuj stratoj kaj stratetoj la junularo konstruas barikadojn. Se la faŝistoj enmarŝos Madrid, ili okupos urbon konsistantan el ekskluzive ruinaĵoj, kies eĉ lastan domon oni ankoraŭ defendos.

Sed ili ne enmarŝos! La bestiala krueleco de ĉi tiuj bombardadoj estas nur senpova furiozo pro nia rezisto. La proletaro de Madrid scias, ke ĝi defendas ne nur sian propran vivon, sed ankaŭ tiun de aliaj popoloj. Ĉu en Nederlando oni konscias pri tio? Ĉu oni spirite partoprenas la mizeron de niaj virinoj, viroj, infanoj, kiujn eĉ teroro ne povas subpremi? Ĉu eble fine aŭdiĝos en Eŭropo protesta sono kontraŭ tiom multe da hontiga kruelado, kontraŭ „naciistoj”, kiujn tiom klare abomenas ilia tuta nacio?

Madrid, la 18an de novembro.

La kaŭzoj de nia retiriĝo ĉe Getafé estas tre komplikitaj kaj eble estas parte neeviteblaj en batalo kia tiu ĉi, pro armeo ne laŭsisteme konstruita dum multaj jaroj, sed kelkmonate kvazaŭ improviziĝinta de l'proletaro. Krome influis ĝin ankaŭ la specialaj politikaj cirkonstancoj en Hispanio. La kontrastoj inter anarĥiistoj kaj komunistoj kaj la timo de ambaŭ grupoj, ke la alia el ili uzurpos la regadon, kaŭzis, ke ĉie oni promociis oficiroj ne tiujn, kiuj estas la plej kapablaj, sed ekskluzive tiujn, kiuj el partia vidpunkto estis plej fidindaj. La promocio de tiuj personoj okazis en la batalo rekompence pro evidenta heroeco, kio tamen multokaze estas io tute alia ol militista kompreno aŭ organiza talento. Nia kapitano, ekzemple, estas tre ĉarma junulo dudekjara, kiu dum unu kaj duona jaroj frekventis la lernejon, naŭjara eniris la fabrikon, en sia dek-

unua jaro partoprenis unuafoje strikon, havante dek kvin jarojn jam troviĝis en malliberejo kaj poste faris bonegan nelaŭleĝan laboron en la junulara movado. Li estas brava, afabla, tre bonvola, sed reale ankoraŭ granda infano ne havanta aŭtoritaton, nek militistan komprenon. Ke niaj soldatoj, ĉiu aparte, estas bravaj, jam sufiĉe pruviĝis ĉe Naval Perral kaj aliloke, sed unue ankaŭ ili mem estas grandaj infanoj neniam rigardantaj perspektive, kaj due ili profundakore estas tiom anarĥiistaj kaj antimilitaristaj, ke ĉiun klopodon enkonduki pli da militista disciplino en la trupon ili rigardas malfide. Kvankam ĉi rilate la politikaj komisaraj faris bonan laboron, kaj kvankam oni pli kaj pli serioze enkondukas la unuecon de komando, ni estas tamen ankoraŭ tre malproksime de efektive moderna armeo. Kvazaŭ por troigi la malfeliĉon ĵus plenigis nian kompanion nombro da novaj volontuloj el la vilaĝoj, unuafoje venantaj en la frontlinion.

Vespere je la oka oni ordonis al ni formarŝi kaj ĝis la dua nokte ili kantis kaj ridis, kvazaŭ ili estis forirontaj al festo. Aldone mi rimarkigu, ke tiaokaze ĉia drinkaĵo en la kazerno estas malpermesita, pro kio ebrieco ne eblas. Cetere, la junuloj mem avertis: „Atentu, drinkinte oni ne povas bone celpafi”.

La duan horon nokte forveturis niaj aŭtobusoj kaj ĉe la komenca pala matenlumo ni anstataŭis la unuan kaj kvaran kompaniojn en la tranĉeoj. Ĉi tiuj tranĉeoj mem apartenas al la fortikaĵoj de Madrid, kiujn rapidege konstruis ensialiberatempo virinoj, knaboj kaj laboristoj tro maljunaj por porti armilojn. El militista vidpunkto ili nepre ne sufiĉis, ĉar ili estis tiom mallarĝaj, ke la oficiroj ne povas libere preterpasi; sen kubutapogejo, sur kiun oni bezonas meti ankaŭ la kartoĉojn, sen defluilo okaze de pluvoj kaj, kio pli gravas, sen kaŝejoj, en kiujn la soldatoj povas ŝirmi sin kontraŭ vento kaj malvarmo.

Do ankaŭ en tio ĉi rimarkiĝas la tipa improvizo.

Kiam leviĝis la suno, evidentiĝis, ke proksimume tricent metrojn antaŭ nia linio troviĝas ankoraŭ dua vico da niaj soldatoj. Estis belega vetero, preskaŭ somera; la kanonoj silentis kaj ni havis senton kvazaŭ ni ekskursas kampare por nia sano. Fervore mi studis la hispanan lingvon el malgranda lernolibro, kiun mi estis aĉetinta. Eskadro da aeroplanoj bombardis la antaŭan linion, lasante nin trankvilaj. Nur la manĝprovizado funkciis malbone. La tutan tagon kaj la sekvintan ni ricevis por manĝi nur iom da seka pano kun malgranda peco da kolbaso. Tagmeze preterpasis aŭtomobilo kun virinoj de Mondkomitato por la Paco. Ili rakontis al ni, ke la unuan linion tre sendisciplinigi la bombardado, kaj ili disdonis kelke da boteloj kun konjako. Krome mi longe interparolis kun du flegistoj de la skota ambulanco, kiu faras ĉi tie bravan laboron. La nokto estis froste malvarma, sed en iu konservejo ni trovis iom da pajlo kaj sub la kovriloj ni dormis kontentige bone. La tereno estis onduma, pro kio mi ne povis supervidi la linion dekstre de la vojo.

Ĉar ŝajnis, ke ankaŭ tiu ĉi tago pasos senbrue, nia kapitano iris al Madrid por ricevi kovrilojn kaj vestojn por la trupo. Je la dek-unua komenciĝis subite forta fusilado ĉe la unua linio kaj iom antaŭ la unua horo ni vidis la trupojn el ĉi tiu linio sin kviete retirantaj. Ni haltigis ilin. La oficiroj komandis al ili, reiri en tranĉeon nian. Tio estis la unua granda eraro. Pro tio la tranĉeo tropleniĝis kaj eĉ de sendisciplinaj elementoj. Anstataŭe ja estis necese, ke ili formu trian linion, post la nia, por ŝirmi la vilaĝon.

Duahore komenciĝis la granda batalo. La malamiko komencis sur nian linion intensan bombardadon, seninterrompe daŭranta pli ol du horojn. Krom tio kvin tankoj, aŭ pli ĝustedire, kirasaŭtomobiloj al- kaj reveturis laŭ la vojo, senĉese pafante al ni per mitraloj. Mem ni disponis nur pri kirastrajno sur la fervojo, kaj sur la ŝoseo pri senvalora kirasaŭtomobilo, kiu

tamen jam baldaŭ devis retiriĝi. Niaj du maŝinpafiloj datiĝis el la mezepokoj kaj ofte malfunkciis. Rimarkinde estis, ke malgraŭ ĉio ĉi la malamika pafado efikis nur malmulte en nia tranĉeo. Pli domaĝe estis, ke pro nerveco niaj kamaradoj pafis ofte, kvankam ne jam vidiĝis malamiko. (La kirasautomobiloj estis kompreneble nedifekteblaj per niaj fusiloj). Krome la pli multaj pafis, ne ĝuste celante kaj tiom malbone, ke ofte la kugloj frapiĝis en la teron apenaŭ tridek metrojn antaŭ nia linio. La rezulto estis, ke ĉe vesperiĝo ĉie komenciĝis manko pri municio kaj ke multaj fusiloj difektiĝis. En nia sekcio mi klopodis kiom eble ĉesigi la pafadon, kun iom da sukceso, sed mia voĉo aŭdiĝis kompreneble ne pli malproksimen ol centon da metroj.

Poste okazis la atako. Ĉar ĉe nia sektoro la tankoj ne povis trabati sin, ili veturis je la kvara horo dekstren de la ŝoseo kaj sukcesis duloke trabati sin tra la linio kaj tiumomente estiĝis paniko ĉe la ekstrema dekstra flanko kaj unu el la kompanioj komencis forkuri. Unu kompanio infektis alian, kaj precipe la soldatoj ne havantaj plu municion aŭ kies fusilo ne funkciis plu, senorde forkuris el la linio. La oficiroj ordonis al ili persiston, sed kamaradeco evidente malhelpis ilin pafi al la forkurantoj, kvankam eble per tio la forkurado estis ankoraŭ haltigebla. Pli kaj pli larĝiĝis la breĉo kaj nun ankaŭ dekstre de ni komenciĝis la retiriĝo. En mia sekcio mi retenis la virojn kiom longe mi povis, parole, sed iufoje ankaŭ minacante ilin per la fusilo. Ni persistis eble kvaronhoron pli longe ol la aliaj, sed fine mi tamen estis sola en la tranĉeo kun nia *alvarez* (vicleŭtenanto), kiu estis reveninta, ĉar mi insultis lin malkuraĝulo. „Somos solos” li diris. (Ni estas solaj). Tiumomente la malamiko estis distance de tricento da metroj. Mi komprenis, ke jam nenio estas farebla kaj forkuris kun li al Getafé.

Ĉe fervoja kruciĝo ni renkontis kelke da oficiroj kaj kun ili ni formis, por kelke da minutoj, duan defendan linion, sed

ankaŭ tiu pozicio fariĝis nedefendebla. Surfone de la subiranta suno ni vidis la liniojn de l'faŝistoj malrapide proksimiĝantaj. Mia gorĝo estis seka kvazaŭ ledo kaj spiregante ni trenis sur la strato keston da kartoĉoj, kiun ni tamen baldaŭ devis lasi por forporti vunditon. Lia sango fluis sur miajn manojn kaj senĉese li plende kriis: „aŭtomobilon, aŭto-“. Fine ni trovis ambulancan veturilon, sed dume fariĝis plena mallumo. En iu domo mezvoje al Madrid mi ripozis. Eble duonan horon, ĝis kiam subita alarmo forpelis nin eksteren. Sur la vojo staris kompanio da niaj „asaltoj“. (Asaltoj ne estas volontuloj, sed regulaj trupoj). Mi demandis ion al ili, sed evidente ili rigardis min spiono aŭ faŝisto okaze tro multe antaŭen veninta. Tio estis la plej terura momento en tiu ĉi nokto, ĉar ili staris pretaj kun siaj fusiloj por pafmortigi min. Feliĉe mi sukcesis pruvi al ili per miaj dokumentoj, ke la afero estas en ordo; mi aliĝis al ili kaj remarŝis en la direkto al Getafé, kie ni proksimume centope okupis la vojon. Tie ni kuŝis la tutan sekvintan matenon, sen ia helpo kaj havante ne alian manĝaĵon krom nematuraj tomatoj kreskantaj sur la kampo. Mi pensis, ke, se okazos atako, tio estos la fino. Malgraŭ tio la laciĝo estis tiom intensa, ke, en laŭvoja fosaĵo, ni ekdormis. Mi vekigis pro tio, ke iu taŭzis min kaj subite mi vidis antaŭ mi la bonkore afablan vizaĝon de nia serĝento Rubio. Li estis reveninta en la frontinion por serĉi min. Mi kredas, ke neniam en mia vivo mi tiom multe ĝojis. Kun li mi retrovis en Madrid nian kompanion.

Samvespere ni formarŝis kun nia reformita kompanio al Villa Verde Bajo, kie oni komisiis al ni, defende ŝirmi baterion de nia artilerio tie starigitan. Kiam parto de nia kompanio okupis la tranĉeojn, oni kondukis nin en brikfarejan fornegon, kio estis la plej fantazia spektaklo, kiun oni povas imagi. Pro la varmo ni tuj ekdormis, sed apenaŭ du horojn poste la artilerio ŝanĝis pozicion kaj ni translokiĝis en la kelojn de ia kastelo,

kies turon okupis la observa posteno de nia artilerio. Apenaŭ tagiĝis, kiam la malamiko eksciis tion kaj baldaŭ pluve falis grenadoj. Oni ordonis al ni, retiri nin post iun fervojan digon. Ĉar la duono de nia kompanio ne havis plu kartoĉojn, Peppe ne sciis kion fari. Mi konsilis al li, ke li ordonu, ke tiuj, kiuj ne aŭ malmulte havis da kartoĉoj, reiru al Madrid kaj ekmarŝu kun la restantoj. Tion li klopodis, sed mankis al li sufiĉa aŭtoritato por efektiviĝi tion. Tiumomente okazis io konsterna: iuloke ĉe la fronto fariĝis dua trarompo kaj grandaj grupoj da forkurantoj venis en nia direkto. Mi komprenis, ke tio estas paniko kaj ke ne minacas vera danĝero; tial mi klopodis persvadi Peppe, ke li ekmarŝu kun nia kompanio por haltigi la forkuron kaj iu kaporalo proponis ekmarŝi mem, esperante, ke la aliaj sekvos.

Estis tamen nur ses, kiuj kuniris. Proksimume kvar kilometrojn nia malgranda patrolo iris antaŭen, tra la kampoj kaj forlasitaj tranĉeoj, ĝis kiam ni fine survoje al Cadiz trovis taĉmenton da proksimume kvardek viroj, kiu defendis tiun ĉi linion. Ili tre ĝojis pro nia veno kaj la tutan posttagmezon ni sukcesis per nia pafado teni la malamikon ekster Villa Verde Alto.

Iom antaŭ la vespero venis helpo kaj la komandanto permesis al ni, ke ni retiru nin por reserĉi nian propran kompanion. Tiu vespero estis eble ankoraŭ pli terura ol la antaŭa. Ĉie, kie ni pasis, ni trovis vojerarintajn grupojn da milicanoj sen armiloj aŭ sen municio, malsataj, sen oficiroj kaj ne sciante, kien iri. La fervojo, laŭ kiu ni marŝis, estis bombardata kaj la stacidomo estis nur fumanta ruinaĵo. Sur la sange ruĝa ĉielo ĉirkaŭe flugis dekoj da aeroplanoj. Multfoje ili glitflugis malalte super la kampo, mitralpafe mortigante dekonon de la forkurantaj milicanoj. Kvazaŭhajle falis iliaj bomboj kaj el ĉiuj vilaĝoj, kiujn ni povis vidi, leviĝis altaj kolonoj el fumo kaj flamoj. El la modela ĝardenvilaĝo de fervojlaboristoj postres-

tis post kelke da minutoj nur ununura brulanta ruinaĵo. Fermin, kiu la tutan tagon akompanis min, diris: „Madrid kapitulacis”, kaj ankaŭ mi kredis tiumomente, ke restas farebla jam nenio krom pafi al mi mem kuglon tra la kapo, sed la vivdeziro estis pli forta kaj krome mi estis survoje kolektinta multe da kamaradoj el nia kompanio, kiuj perdis la prudenton. Kun ili mi formis malgrandan sektion, kun kiu mi formariĝis kiom eble plej rapide al nia kazerno ĉe Puente de Vallecas por ricevi novajn ordonojn. La komandanto konsideris tion, kion mi komunikis al li, tiom grava, ke li tuj kondukis min aŭtomobile al la stabejo. Kun ĝojo mi rimarkis tamen, ke tie oni ne tiom perdis la prudenton, kiom mi estis konjektinta. Kvankam la trarompo de l'faŝistoj estis tre grava, ĝi estis samtempe al ili danĝera, ĉar ĝi okazis nur laŭ malgranda parto de la fronto, pro kio ili mem venis kvazaŭ en sakon.

Aŭskultinte, kion mi povis rakonti, la stabo havigis al mi bonan banon kaj la unuan varman manĝon post kvar tagoj, kaj kvazaŭ alia homo mi revenis al la kazerno. Sekvintatage ankaŭ Domela kaj la aliaj revenis al la kazerno. Tiunokte ili estis defendintaj la saman vojon al Cadiz, kie estis ankaŭ ni.

Kiom ajn miriga tio ŝajnas, la plej deprimaj tagoj estis la tagoj de relativa ripozo, kiuj nun sekvis. Nia kompanio okupis la tranĉeon post Manzanares, sed dume la malamiko ŝanĝis la direkton de atako kaj turnis sin pli suden en la direkto al Casa de Campo. Nur la artilerio kaj la aeroplanoj senĉese atakis nin. Ŝajnis, ke ili celas speciale nin, ĉar du grenadoj enfrapiĝis en la parapeton de nia tranĉeo, unu distance de du, alia distance de nur unu metro de la loko, kie kuŝis Domela, Peppe kaj mi. Ni plene kovriĝis per tero kaj nur la hazardon, ke ili ne eksplodis, vi danku, ke mi povas ankoraŭ skribi al vi. Apenaŭ kvin minutojn poste alflugis eskadro aeroplanoj

kaj en la momento, kiam mi vidis falantaj la bombojn podeke kvazaŭ blankaj ovoĵ, mi kredis, ke venos la fino. Ankaŭ al ili la vento ŝanĝis direkton kaj ili eksplodis dudek metrojn distance de nia loko. Ĉion ĉi mi tamen ne aludas, parolante pri „la plej grava”, ĉar ĉio ĉi ja apartenas al la milito.

Proksimume ducent metrojn post nia linio troviĝas unu el tiuj malriĉulaj kvartaloj de Madrid, sen kloakaro kaj sen akvokondukiloj, kies al homo malindan mizeron mi jam priskribis en „Domo senfenestra”. La amo, kun kiu oni akceptis nin en tiu ĉi kvartalaĉo, ne estas priskribebla. Maljuna virineto venis, alportante al ni sian lastan panon kaj sian lastan vinon kaj preparis . . .

(Ĵus venis telefona ordono, ke mi tuj anoncu min kazerne, foriru fronten . . .).

La 24an de novembro, 1936a.

CITÉ UNIVERSITAIRE.

Ni estas do denove ĉe la fronto, sed ĉe fronto la plej miriga, kiam oni povas imagi, apenaŭ ok minutojn distance de l' subtera fervoja stacio Quatro Caminos. Pro tio la transporto de nia kompanio fronten estis ĉi foje tre simpla: ni foriris nur per la subtera trajno. Sed samtempe vi komprenos el tio, kiom danĝera estis la trarompo de l' faŝistoj, kiu kondukis ilin efektive ĝis la enirejoj de Madrid, kvankam tio okazis en formo kojna, pro kio ilia fronto estas ĉi loke tre mallarĝa.

Kiam mi subite devis interrompi mian antaŭan leteron, mi ĝuste intencis skribi pri la plej terura, kion mi vidis tie ĉi. Tio estas la terurega kaj nepre nenecesa suferado de la ne batalantoj. Ĉar estas evidente, ke la malamiko preskaŭ ekskluzive kaj kun

plej rafine elpensita kruelo koncentras siajn bombojn kaj grenadojn ne sur lokojn strategie gravajn, sed sur la laboristajn kvartalojn, esperante kaŭzi en ili timegon kaj panikon.

Mi skribis al vi pri la domaro post niaj linioj, kie loĝas nur la plej mizeraj malriĉuloj, kaj kiel ili venis al ni, alportante siajn lastajn posedaĵojn por zorgi por ni. Siajn kelke da mizeraj kokinoj, siajn litkovrilojn, siajn matracojn, siajn tomatojn, ĉion ili volis doni. Ili kudre fiksis niajn butonojn, lavis niajn vestojn, ili zorgis por ni kvazaŭ por siaj propraj infanoj. Estas ja kompreneble, ke ni ne elmetis ilin al danĝero per konduko de trupoj en la domaron; niaj tranĉeoj troviĝis minimume tricent metrojn distance de tie, sed la malamikaj aviadistoj bombardis kun sadista ĝuo iliajn mizerajn domaĉojn; en la tranĉeoj ni povis aŭdi la terurajn kriojn de l'viktimoj. Poste ni forportis el la ruinaĵoj la kadavretojn de la infanoj, kiuj iam estis sidintaj sur niaj genuoj kaj la misformitajn korpojn de la virinoj, kiuj por ni estis zorgintaj.

Kiu kuŝas en la tranĉeo, havas almenaŭ fusilon en la manoj kaj per tio havas la iluzion, povi defendi sin, sed en la urbo oni povas fari nenion krom atendi, ĉu la sekvonta bombo eble falos sur onian propran domon kaj onian propran familion. Kaj mi eĉ kredas, ke en mia memoro konserviĝis ne pli kortuŝa spektaklo ol tiu pri la troplenigitaj stacioj de l'subtera fervojo, kien rifuĝis la loĝantaro de la antaŭurboj kaj kie dum multaj tagoj kaj noktoj virinoj kaj infanoj vivas kaj dormas sur kelke da sakoj aŭ litkovriloj kunportitaj.

Tiu ĉi teruraĵo ne venis al fino. Tuj kiam brilas la suno, dudek, ufoje eĉ tridek ĝis kvardek malamikaj aeroplanoj cirkle flugas super la urbo, faligante siajn bombojn; kaj kiam la vetero malsereniĝas, la malamikaj baterioj ŝetas siajn bruligajn bombojn trafe maltrafe al la urbo. En ĉi tiuj cirkonstancoj mi ne povas pensi pri mokofendo pli grava ol elparolo de la vortoj „konscienco de l'mondo". Eĉ la hordoj de Atilla ne detruis

sian propran ĉefurbon kaj ne uzis siajn armilojn por elmurdi la virinojn kaj infanojn de sia popolo!

La 10an de decembro, 1936a.

FRENTE DE L'ESTACION DE GOYA.

Kiam la malamiko antaŭ proksimume kvar semajnoj trampis la liniojn, unuafoje apud Getafé kaj poste apud Villa Verde, unu momenton mi pensis, kaj ne mi sola, ke ĉio estas perdita. Mi vidis la disbatitajn kompaniojn, el kiuj certe dekonon mortigis mitrala pafado de malalte flugantaj Heinkel-maŝinoj; ni preteriris vilaĝojn kaj stacidomojn, el kiuj alte leviĝis flamoj kaj kiuj sub la fajro de l'grenadoj disfalis; maŭra kavalerio sabre disbatis ĉiun, kiun ĝi renkontis, repelante niajn trupojn ĝis „Ponto de l'Reĝidinoj” kaj „Ponto de l'Francoj”. Mi asertas, ke en tiuj senesperaj tagoj Madrid estis savata de la virinoj. Ĝuste la virinoj laŭvorte repelis fronten la virojn, rifuĝantaj al siaj domoj, aŭ aliokaze ili prenis la forĵetitajn fusilojn kaj mem defendis la eniron al la urbo el post rapidege konstruitaj barikadoj. Sed baldaŭ evidentiĝis, ke la forkuradon en la antaŭaj tagoj ne kaŭzis malkuraĝeco de la milicanoj, sed tipa paniko. Kiuj en la antaŭaj tagoj estis forkurintaj, nun rerapidis al siaj kompanioj; ili ne nur rezistis, sed komencis, en ekstreme pli malfacilaj cirkonstancoj la kontraŭofensivon kaj sukcesis kun teruregaj sinoferoj kaj senlima kuraĝo definitive haltigi la pluan enmarŝon de l'malamiko kaj regajni plurajn gravajn poziciojn. Mi ripetas, kion mi jam antaŭe skribis: niaj milicanoj estas la plej taŭga kaj brava homa materialo, kian oni povas imagi, kondiĉe ke ili estu bone gvidataj. Multrilate ili tamen similas infanojn, tre neimunaj kontraŭ psika infekto, kiam mankas forta gvidado

aŭ kiam la oficiroj perdas la prudenton. Kiam tiaokaze ili poste rekonsciiĝis, ili estas, honte pri si mem, pretaj por la plej furioza kuraĝo por korekti la eraron. La tagoj de Getafé kaj Villa Verde pro tio fariĝis ankaŭ la tagoj, en kiuj viroj kiaj Col konkeris post unu malamika tanko alian, havante nenion krom kelke da ĵetgrenadoj.

Tiusabate Franco anoncis per la radio, ke la sekvontan tagon li trinkos sian kafon en Madrid. Radio-Lisboa jam priskribis, kiel li, sidante sur blanka ĉevalo, triumfe enrajdis la urbon. En Avilla oni jam formis la venĝan estraron, kiu devos transpreni la regadon super la urbo. Al la eksterlandaj ĵurnalistoj oni malpermesis akompani lin, ĉar por plenumi sian venĝon al la loĝantaro de Madrid Franco volis esti sola. Mola kalkulis pri ripetigo de Badajoz, anoncante mortverdikton al ĉiu, kiun oni trovos kun armilo en la mano Jam kvar semajnoj pasis de tiam. Dume la kafo de Franco malvarmiĝis! Ili ĉiuj eraris, ĉar ne konante la proletaron kaj ne sciante, ke, kvankam la proletaro povas fari erarojn, ĝi tamen lernas el siaj eraroj, ke, kvankam bato povas ĝin trafi, ĝi tamen leviĝas post ĉiu bato, ke ĝi povas pormomente ektimi, sed nur por rekomenci la batalon kun tiom pli grandaj kuraĝoj kaj konvinko. Pro tio en sia rapidego la faŝistoj sange puŝiĝas kontraŭ la revigliĝinta heroeco de l'madrída proletaro.

La defendo de nia pozicio parte dependas de kirastrajno, kiu, okaze de forta atako, en kvin minutoj povas alveni el Madrid. Por ĝustatempe venigi tiun trajnon oni aranĝis kun rapido kamptelefono. Kiam la telefono estis pende fiksita kaj la laboristoj revenintaj, evidentiĝis, ke iuloke mankas kontaktilo, pro kio ĝi ne funkciis. Pli ol tri tagojn ni troviĝis tie, ĝis kiam fine venis muntisto, kiu riparigis la kontakton. Dum tiu tuta tempo oni agrable amuzis sin per la telefono . . . ne funkcia. La kapitano, la *alvarez*, la serĝentoj kaj ĉiu

eniranta la komandejon, ludis telefonon. Ili telefone alvokis sian fianĉinon, sian bopatrinon, mendis en la urbo tagmanĝon kun ĉampano aŭ ŝajnigis interparolojn kun Mola kaj Queipo de Llano mem, kiujn ili superŝutis per insultoj. La telefono ŝajnis al mi simbolo same pri ilia plej granda valoro, kiel pri ilia plej granda malforto: bonhumora senzorgeco, pro kiu ili ĉiam estas gajaj kaj bonesperaj, sed pro kiu ili ankaŭ ofte ne faras la plejneceson en momento ankoraŭ utiligebla!

Bonhumora senzorgeco . . . Kiam ni formarsiĝis el la universitaturno al tiu ĉi nova pozicio, dek-kvinjara knabo antaŭiris nian trupon kiel gvidanto. Dum tuta horo ni marŝis tra antaŭurbaj kvartaloj, kies ĉiu domo estis forlasita kaj pli malpli difektita per la bombardado. La fostoj de l'elektra tramo estis rompigitaj, la dratoj pendis malalte sur la strato, grenadoj estis batfosintaj grandajn funelojn en la pavimon kaj ĉie briletis en la hela lunlumo la pecoj de rompigitaj fenestroj. Nia juna gvidanto devenis el la sudo kaj Peppe diris al li: „Antonio, kantu ion por ni, la *teniente* tre deziras aŭskulti unu el viaj *flamengos!*” Kiam en la direkto, en kiu ni iris, la mitraloj boje bruegis kvazaŭ rabiaj hundoj, la knabo komencis kanti. En la kompanio silentiĝis la interparoloj. Lia alta, delikata knaba voĉo estis klara kia la lunlumo. La melodio impresis kiel arabaj kantoj kaj tamen ankaŭ kiel gregoria religia muziko. La teksto, kiun li mem improvizis, estis tre simpla: „niaj bravaj milicianoj certe venkos, ho kiom feliĉaj ni fariĝos, kiam la milicianoj venkos!” Ĝi memorigis min pri birdeto en Getafé, kiu, kiam la batalo estis plej intensa, trankvile malleviĝis sur arbon proksime de ni, neglektante la kuglojn. Ni marŝis laŭ angulo, eniris la mallumon kaj subite la bojbruado de la mitraloj aŭdiĝis pli proksime, pli laŭte kaj pli kruele. „Klinu vin!” komandis la kapitano, „kaj po kvin metroj interspace kure al la tranĉeo!” Ni venis en la frontlinion kaj la kantado

de la knabo abrupte rompiĝis kvazaŭ subite difektita laŭt-parolilo.

Proksimume okcent metrojn distance de ni kuŝas la malamiko en tranĉeo kondukanta de l'militista hospitalo al la ŝoseo al Estremadura. Kontraŭe de ni ĝi okupas malgrandan vilaĝon, kaj bone ni povas vidi la truojn en la domoj, post kiujn ĝi starigis siajn mitralojn. Iom pli poste staras konjekteble la artilerio, kiu ĉiuposttagmeze dum kelke da horoj bombardas niajn poziciojn. Ĝi pafadas malbone kaj la pli multaj grenadoj eksplodas centon da metroj post nia linio sur la tombejo, kie ili evidente ne permesas ripozon al la mortintoj. Ĉu eble la devizo „Hispanio vekigu!” estas destinita ankaŭ por ili?

Tamen, la milito multe difektis ankaŭ la laboristajn domojn, kiuj kun la tranĉeo formas nian linion. Ĉie en la muroj oni estis hakinta truojn, tra kiuj ni pafas okaze de atako; tra la rompitaĵoj de l'tegmento enrigardas la luno, la fenestroj estas rompitaĵoj kaj anstataŭigitaj per tabuloj, ne enlasantaj la lumon. Vespere, kiam meĉeto sur oleo flosanta havigas fum-aĉantan flamon, la malhelaj ombroj de la rompitaĵoj meblas efektas fantome. De sur la muro rigardas al ni fianĉa paro en ora kadro kaŝvolvita en araneaĵo. Rompita gramofono atestas pri modesta klopodo al bonstatiĝo. Du milicanoj dishakas malnovan infanseĝon en brullignon. En iu angulo kuŝas kune balaitaj kelke da ŝiritaj libroj. Ĉio estas malpura, polva, rompita, malzorgita. El la domoj starantaj iom malproksime sonadas nokte la raŭkaj hurloj de postlasitaj malsataj hundoj.

Jam dum dek du tagoj ni vivas en tiuj ĉi ruinaĵoj. Ĉio, kion ni tuŝas, estas malpura; eĉ la akvo en la puto estas kota kaj postlasas grizan feĉon en la pokaloj. Estas tro malvarme, ol ke oni povus sufiĉe lavi sin. La trotuaro antaŭ nia domo, la sola peceto da pavimo ne troviĝanta en la danĝera linio, estas



nesurirebla pro la fekaĵoj de cent kvardek soldatoj. En dek du tagoj ni ne povis formeti la vestojn, trifoje ni rebatis noktan atakon, po ok horoj tage ni postenas, la pli multaj el ni jam ne havas uzeblajn ŝuojn, kaj en tutaj tiuj ĉi du semajnoj ni ne manĝis ion varman, ĉar la kuireja aŭtomobilo ne povas transiri la frontlinion. En tiu tuta tempo mi ne aŭdis eĉ unu plendon. Vespere, sidante kun larmantaj okuloj ĉirkaŭ la fajro, la kamaradoj rakontas historiojn: Tiel Uilenspiegel aŭ Ali Baba kaj la kvardek rabistoj. Oni ankaŭ multe kantas. Pri la venko neniu dubas. Hieraŭ kuglo frakasis la skapolon de nia malgranda Manuelo. Ŝrapnelero trafis la femuron de Thomas. „Qué suerte!” diras la kamaradoj, „kia feliĉo. En tuta ĉi tiu semajno eĉ ne unu mortigito!”

Ofte ili petas al mi: „Rakontu ankoraŭ al ni, *teniente*, kial do fakte vi venis tien ĉi!” Mi levas la ŝultrojn: „Tion vi ja fine scias, kamaradoj, ĉar via batalo estas ankaŭ batalo nia!” „Jes”, ili diras, „ni tion jam scias, sed jen tiu venis el la vilaĝo, al li

vi tion ankoraŭfoje klarigu!" Mi prenas mapon kaj montras, ke, se en Hispanio venkos la faŝistoj, Francio estos ĉiufланke ĉirkaŭita. Havante Hispanion kiel elirpunkton, Germanio povos rompi la kontakton inter Britio kaj ĝiaj kolonioj. Tio estos la momento, en kiu ne povos ne eksplodi la mondmilito sub plejeble favoraj premisoj por la faŝismo. Tiumotive ni defendas ĉi tie ne nur Hispanion, sed ankaŭ la demokration kaj eĉ la limojn de Sovet-Unio!"

Brilokule rigardante min ili diras: „Qué lucha!" „Ha, kia batalo!"

En la lastaj semajnoj ni rigardis ripetfoje aeroplanajn batalojn, en kiuj malamikajn flugmaŝinojn pafe forpelis niaj malgrandaj ĉasaviadiloj. Laŭraporte de la ĵurnaloj la nombro estis ankoraŭ multe pli granda ol tiu, kiun mi vidis. Malgraŭe kaj, esperinde erare, iafoje ŝajnas al mi, ke aviade la laŭnombra fortosupereco de l'malamiko ankoraŭ konstante pligrandiĝas. La aviadilaro, kiu hieraŭ trans niajn poziciojn direktis sin al Madrid, estas la plej granda, kiun mi iam vidis; ĝi nombris tridek naŭ monstre grandegajn bombardilojn, defendatajn de dudek ĉasaviadiloj. Krome ili nun ne klopodas plu bombardi niajn tranĉeojn, sciante, ke estas tre malfacile trafi tian longan mallarĝan linion, kaj ke ankaŭ pro ĝia zigzago la plej granda bombo kaŭzas nur negrandan domaĝon. Ne atentante la trupojn, ili do tuj direktas sin al Madrid, kiu estas por ili multe pli certa trafcelo. Kvankam la urbo ne prezentas multan ĉarmon al tiu, kiu estas en ĝi, ĝi situas, rigardate el niaj pozicioj, blanka kaj pura kvazaŭ fabela urbo sur montetoj. Jen proksimiĝas la aeroplanoj; la tero tremas pro la obtuza bruado de l'eksplodoj kaj kvin minutojn poste la tuta urbo malaperas en malpure brunajn nebulojn el polvo kaj fumo, en kiu kaŝiĝas eĉ la turdomego de la telefona centrejo. Senpovaj niaj viroj kuŝas en la tranĉeo; neniuj parolas; oni demandas al si: „Ĉu

vivus en tiu ĉi momento ankoraŭ mia edzino, mia patrino, mia frato?" Scii tion ili povos nur, kiam nia kompanio estos deŝorinta du tutajn semajnojn ĉe la fronto kaj forpermeso revenos al la ruinaĵoj de Madrid. Malgraŭ tio mi ne ekkonis iun en nia kompanio, kiu pro ĉi tiu teroro komencis ŝanceliĝi. Kontraŭe, ĉiu bombardado pli forte ardigas la malamon kaj la volon por la venko. „Tio rezultas el la fakto”, diras al mi Fermin, „ĉar dekomence ni konsciis, ke ni staras antaŭ la alternativo morti aŭ venki. Ĉiu el ni estas volontulo kaj ĉiu scias, por kio li batalas. Koncerne klerecon ni estas neevoluinta popolo, sed niajn korojn oni ne povas trompi!”

Ke Fermin pravas, pruviĝis antaŭ kelke da tagoj, kiam la malamiko denove disŝutis dekmilojn da flugfolioj en niajn liniojn. Komprenoble al neniu venis en la kapon, malpermesi, ke oni prenu aŭ legu tiujn foliojn. Male, oficiroj kaj soldatoj kuris kvazaŭlepore por kapti unu. Poste ni ridis. Fariĝis eĉ gaja posttagmezo! Mi memoras, ke iu analfabeto, Juan Antonio de la kvara duonroto, trifoje, ĉiufoje al iu alia, petis voĉlegi al li la flugfolion, kvazaŭ ne povante kredi ĝin. Demande li rigardis min: „Qué tonterias! (kiaj malprudentaĵoj!), ĉu do eblas, ke oni estas tiom malprudenta?” Efektive, la miksaĵo da impertinento, ciniko kaj fantazia mensogo, karakterizanta ne nur tiajn flugfoliojn, sed ankaŭ la radiajn alparolojn de Franco aŭ ebria Queipo ce Llano (ofte ni aŭskultas ilin per radio-Burgos aŭ Sevilla), tiom evidente kontrastas kun la faktoj, ke eĉ la plej simpla analfabeto, rezulte de sia vivosperto, tuj eksentas ĝin mensogo.

Pro kio do ilia propagando estas tiom malprudenta?

Pro tio, ke la homoj, redaktantaj tion, mem neniam ekkonis la popolon kaj mem kredas la imagon, kiun timo kaj antaŭjuĝo vekis en ili. Por ili „popolo” efektive sinonimas kun „malprudenta ruĝa kanajlaro” kaj ilia mense malsana fantazio atribuas al ni la kruelaĵojn, kiuj kreiĝas en iliaj sadistaj dezirevoj.

Kiel tiuj, kiuj mem neniam suferis, povus kompreni la senliman delikatecon kaj la profundan el mizero naskitan kompatemon de l'popola animo? Kiel tiuj, kies tutan vivon regas avidado al mono kaj potenco, povus kompreni, ke la popolon instigas al batalo aliaj motivoj ol nura avidemo? Kiel tiuj, kiuj konstruas sian propagandajn ministeriojn per la laŭsistema mensogado de komerca reklamo, povus kompreni la primitivan veramon vivantan eĉ en la simpla kamparano? La propagandaj folioj de Franco sufiĉe bone efikus al nederlanda burĝa publiko; li eraris disĵetante ilin inter hispanajn proletojn.

Kun voĉo tremanta pro indigno la viroj ofte relegis al mi unu frazeton: „Hispanoj, dum kiam vi malsatas, via registaro pagas la ekstreme plej altajn salajrojn al eksterlandaj aventuristoj, kiuj, kun armiloj en la mano, volas fari vian landon kolonio de Rusio”. Aliaj viroj mokis: „He, José, kiam ni venos en Madrid, vi certe regalos nin; nur nun ni scias, ke vi estas milionulo!”

Ankaŭ ĉi ĉio apartenas al la fantazio pri la rusaj rubloj, kiun volonte aŭskultas la burĝaro, ĉar ĝi mem mistifikas tiujn, kiuj agadas ne el monavidemo.

Niaj kamaradoj scias, ke Franco komencis la batalon kun maŭraj dungitoj kaj kun soldatoj de l'fremdula legio, per kies uniformo vestas sin ankaŭ italaj kaj germanaj faŝistoj.

Niaj kamaradoj, ĉar mem partoprenante la batalon, scias, ke nia agado, nia propagando por la partio ne estas pagataj. Niaj kamaradoj scias, ke tiuj, kiuj libervole kaj ofte kun plej granda peno venas al Hispanio, agas tiel sen promeso pri rekompenco kaj ne esperante el tio ian monprofiton.

El tio fontas la amo, admiro kaj aŭfableco, kiujn ili esprimas al ni, fremduloj, kaj kiuj min ofte hontigas. La hispana popolo ŝatas rakonti fabelojn, kaj jam nun, kiam ni vespere sidas ĉirkaŭ nia fumaĉanta lignofajro, teksigās legendoj ĉirkaŭ la Internacia Bataliono. En la rakontoj de la kamaradoj la bata-

lantoj de l'Internacia Bataliono fariĝas duondioj, figuroj kiaj Cid kaj la kavaliraj herooj, kiuj iam forpelis la maŭrojn el Hispanio. Kun tiom respekta admiro oni parolas pri la herooj de l'Internacia Bataliono, ke ŝajnas iafoje, ke la rakontanto forgesas, ke ankaŭ li mem jam kvinmonate batalas ĉe la fronto. Kvankam efektive veras, ke la soldatoj de l'Internacia Bataliono ĉe la plej minacata fronto donis al ĉiuj ekzemplojn pri kuraĝo, sinoferemo kaj disciplino.

Tiuj amo kaj amikeco al la eksterlandanoj ampleksas ankaŭ Domela kaj min. Kiam ni lastfoje havis forpermeson, kelke da kamaradoj en Vallecas invitis nin al la manĝo. Mi hezitis, ĉar sciante, kiom malmultiĝis la nutraĵoj por la civila loĝantaro. La kamaradoj tamen, sekrete elpensis planon. De unu domo ili kondukis min al alia, kaj en ĉiu domo mi ne povis ne denove partopreni la manĝon. „Jen do”, ili diris ride, „se vi estus manĝinta ĉe nur unu el ni, vi forirus malsata, sed kvarope ni ja havas tiom multe, ke via apetito kontentiĝas”.

Antaŭ kelke da tagoj Domela diris al mi: „Ĉu ankaŭ vi rimarkis, ke en la lastaj tagoj ni ricevas pli grandajn manĝoporciojn?” „Jes”, mi diris, „evidente la nutrigado pliboniĝas”. Domela kapneis: „Pli eble la nutrigado malpliboniĝas, sed al ni oni donas pli multe ol al la aliaj”. Efektive ni ricevis tiuvespere duoblan porcion da ŝinko. Ni protestis ĉe la kapitano, kiu mienis mistere: „Ne ĝenu vin pro tio; tio estas en ordo!” Energie ni protestis, opiniante tion nepre ne en ordo. Evidentiĝis, ke, kiam iuvespere ni vizitis la akademion, la milicanoj kunvenis kaj decidis, „ke la du fremduloj ricevu duoblajn porciojn, ĉar nun, kiam ni ne povas ricevi varman manĝaĵon, la ordinaraj porcioj nepre ne sufiĉas.” Ne necesas diri, ke ni, laŭvalore ŝatante ilian bonan intencon, rifuzis ricevi plu duoblajn porciojn koste de l'aliaj.

Ĉiufoje, kiam ni revenis de la fronto al Madrid, la detruoj

estis pli grandaj. Mi sentis larmojn en la okuloj, vidante la abomenindajn vundojn, kiujn la grenadoj kaŭzis en la iam tre gaja urbo: la fumantaj ruinaĵojn de l'nacia biblioteko, de la hospitalo Don Carlos, de la simplaj laboristaj domoj. En la vico apud mi kantis la kamaradoj: „Los esclavos el triunfo alcantarán!” Al ili la plej terura estas ne la timo pri sia propra vivo, sed la necerteco, kiam ili troviĝas en la tranĉeoj, pri la sorto de siaj infanoj, siaj edzinoj, siaj gepatroj . . . Oni klopodas evakue forsendi la neatalantan loĝantaron el Madrid. Jam 300.000 oni transportis al la kamparo. Sed la loĝantaro de la urbo, nombranta pli ol 1.000.000, amase pligrandiĝis pro la multaj rifuĝintoj el la vilaĝoj. Nur du vojoj kondukas al Valencia. Ni disponas pri multe tro malmulte da aŭtomobiloj. Mi vidis, ke oni ŝarĝas virinojn kaj infanojn sur senkovrilajn ŝarĝveturilojn aŭ po dek en aŭtomobilojn. Se Eŭropo sentas ankoraŭ iomete da humaneco, ĝi senprokraste sendu veturilojn. Sed ĉu tio sufiĉas? Eĉ en la vilaĝoj de la postfrontaj provincoj kaj en la ravaj urboj sur la marbordo la rifuĝintoj ne estas ekster danĝero. En Alicante mi vidis la dispafitajn fasadojn de la hoteloj, kiuj estis aranĝitaj kiel infanejoj. En la haveno kuŝis germana krozoŝipo havanta ĉiujn lampojn lumigitaj, por ke la ribelaj ŝipoj povu efektivi la bombardadon. Bergamin rakontis al mi: „Mia fileto kuŝis en sia lito antaŭ fenestro, kiam oni komencis pafi. Li estis tiom spirite konscia, ke li tuj rifuĝis en la kelon. Se li estus restinta kvin minutojn pli longe, li estus frakasita sub la disfalinta plafono. Mian edzinon kaptis angoro, ĉar ŝi ne sukcesis malfermi la pordon al lia ĉambro”. La fileto de Bergamin estas sesjara. Sed la afiŝon „tiel mortas la infanoj en Madrid” oni ĉi tie en Nederlando malpermesis elmontri. Tia afiŝo prezentanta frakasitajn kadavretojn de infanoj, ofendas la sentojn. Sed la sentojn de la aŭtoritatuloj mem ne ofendas la infanaj kadavretoj. Ja temas nur pri infanoj de ruĝuloj!

39a brigado,
bataliono sargento Vazquez,
4a kompanio,
Puente de San Fernando,
la 28an de januaro.

En la tempo, kiam mi forestis, okazis en nia bataliono grandaj ŝanĝoj. Konstante pli serioze oni okupas sin pri la reorganizo de l'armeo, kaj anstataŭ la iamaj neregulaj korpusoj, ni nun havas, kiel en ĉiu alia armeo, brigadojn de difinita grandeco. Nia iama bataliono, ekzemple, nun estas disigita al du brigadoj, kaj mi bedaŭras, ke oni envicigis min ne en mian iaman kompanion, sed en la kvaran kompanion de la bataliono de Manolo. Sed mi kredas, ke la kamaradoj bedaŭras tion ankoraŭ multe pli ol mi. Ĉi matene ili devis formarŝi, kaj ĉiuj insistis, ke mi akompanu ilin. Multaj el ili havis larmojn en la okuloj; senprokraste ili kunvenis kaj sendis komunan petskribon al la komandantoj, por ke mi povu reiri al ili.

Por fari al ili plezuron mi akompanis la trupon al la fronto. Cetere, tia trupo formarŝanta estas impona spektaklo; kantante dum la tuta marŝo, bone vestitaj, kun ruĝaj flagoj sur la fusiloj, la soldatoj impresas kvazaŭ irantaj al festo. Kaj same bonhumora, same gaje ŝercanta kaj kantanta, kotplena kaj pluve malsekiĝinta, sed plenkuraĝa, la anstataŭita kompanio revenas de la fronto. Kortuŝa estas la ĝojo, kun kiu la infanoj, ĉe Puente de Vallecas, kuregas al siaj patroj, la edzinoj akompanas ilin, la tramistoj nin salutas, la homoj antaŭ la fenestroj svingas la manojn.

Post duonjara batalo, post malvarmo, malsato, bombardadoj, ne videblas eĉ signoj de malvigliĝo, nek militsatiĝo, nek laceco. Sur la interkorto de nia kazerno ekzercas sin la novaj volontuloj, kiuj en la lastaj tagoj venis el siaj vilaĝoj. Multaj novaj, gajaspektaj afiŝoj kovras la murojn de la domoj. Ŝajnas, kvazaŭ

la stratoj estas pli ol iam ajn plenaj de homoj kaj transportiloj. Sur pafe difektitaj konstruaĵoj flirtas la standardo de la respubliko, la soldatoj kantas novajn mem ĉpensitajn morkantojn kaj sub la grandaj portretoj de Passionaria flamas la ruĝaj literoj

*No Pasaran!
Pasaremus!*

Inter la pozicioj de la batalionoj Perreira kaj Durutti troviĝas tre onduma tereno sentranĉea. Tie ni dislokas nokte observajn postenantojn laŭlongen de rivereto kaj post la arbojn. La kontraŭuloj scias tion, kaj pro tio ofte forkurintoj el la malamika armeo venas tra la ravino de ĉi tiu rivereto anonci sin al ni. Jen ili venas kvinope en unu nokto, jen triope, unu fojon venis eĉ dudek. Antaŭhieraaŭ ili kuntrenis bonegan kontraŭ-aviadilan kanonon, du tagojn antaŭ tio mitralon. Genue ili rampas ĝis antaŭ nia linio kaj interfrapas la manojn, por ke ni estu certaj, ke ili ne povas ŝeti grenadojn. Ili aspektas terure malzorgitaj, portas longajn barbojn, tut-tute eluzitajn vestĉifonojn sur la korpo kaj malsategas. Avidas ili prenas la panon, kiun ni donas al ili por manĝi kaj ili ĉirkaŭpremas la skatolojn da konservaĵoj, kvazaŭ volante ilin neniam plu ellasi. Miriga estas la momento, kiam oni ekloĝigas ilin ĉe ni. De ĉiuj flankoj alkuregas la milicanoj por ĉirkaŭpreni ilin, oni ridas, oni ploras, cigaredoj alĵetiĝas de ĉiuj flankoj kaj dume kelke da viroj jam cirkuligas la ĉapon por kolekto: „ĉar venante en Madrid ili ja bezonos iom da poŝmono!”

Iom rekonsciiginte la forkurintoj komencas rakonti: ke oni forkondukis ilin el iliaj vilaĝoj kaj devigis ilin soldatiĝi; ke preskaŭ la duono de ilia trupo konsistas el portugaloj, kiujn sendis la registaro Salandra; ke dum tri monatoj oni ne pagis al ili eĉ unu centimon da salajro kaj ke unu soldaton, kiu petis

litkovrilon, oni pune postenigis nuda dum tuta nokto.

Post nia domo ronke bruas la motoro.

Telefone oni estis avertinta la propagandan servon kaj ĵus alvenis la laŭtparolilo de Alta Voz del Frente. La lignan koloson ni antaŭenŝovas kiom eble plej proksime al la malamikaj linioj kaj la kondukan draton ni kuŝigas posten al eksterdangera loko, kie ni starigas la mikrofonon.

Klare sonas tra la nokto la hispana himno: la himno de Riego.

„Atencion! Atencion!”

Iu kamarado komencas sian alparolon. Per furioza fusilado respondas la malamiko en la direkto al nia ligna monstro. Ĝia voĉo estas tamen pli forta ol tiu de la mitraloj. „Laboristoj ĉe la kontraŭa flanko, kial vi batalas kontraŭ viaj kamaradoj?” Kiam la kamarado finis siajn parolojn, alia ripetas liajn parolojn portugale; post tio arabo alparolas la maŭrojn.

Nun la pafado aliflanke preskaŭ tute ĉesas.

„Nun parolos al vi kelke da kamaradoj, kiuj ĉi nokte mem forkuris al ni”. Plena silento regas, kiam unu el la forkurintoj komencas la parolon:

„Oni ne pafmortigis nin, oni donis al ni manĝaĵojn kaj vestojn, oni traktis nin kiel homojn, aŭskultu: kiel homojn, kiel homojn! Kaj tiun nian serĝenton, kiu minacas per sia revolvero, vi pafmurdu kaj vi faru kion faris ni, ĉar tiuj, kiujn vi nomas „ruĝuloj” estas *homoj*, sed niaj oficiroj kaj Franco kaj la tuta hordo estas *hijos de puta*; kaj feliĉe: Madrid ili tamen ne konkeros!”

Niaj soldatoj ĝojkrias, ridas, ploras kaj postkuras la aŭtomobilon, kiu forportas ambaŭ novajn kamaradojn al la urbo.

AL KAMARADO EN BATALO MORTIGITA.

Sur griza kampo floris blanka roz',
de l'morto rozo meze de vunditoj;
vizaĝo juna antaŭ mortripoz'
ombreton trovis de subtila rido.

„Malvarmon sentas mi'' la bluaj lipoj plendis;
al iu kamarad' serĉpalpas lia man';
la vivo flugis for, la sango fortorentas;
pli kara al mi ŝajnis tiu hom-infan'.

Jen nomo pli sur la heroa listo;
ho Dio, kiom naŭzas min la dir';
infano, kiun buĉis la murdisto;
en unu kara buŝo mankas spir'.

Post unu dolĉa verso ĉesis kanto;
subite ĉesis frapi brava kor';
sur kota griza vojo kunmarŝanto
el nia mez' por ĉiam iris for.

Sed ĉi matene juna bird' eksidas
sur branĉon kaj ekkantas, kantas, kant...;
kaj al mi ŝajnas, kvazaŭ trile ridas
en tiu kant' la voĉ' de l'kamarad'.

Fronto de El Pardo, la 16an de
februaro, 1937a.

Los Pozos 51-5-37-E7 Capitán
Centellas
E. Saucedo



Fronto de El Pardo, la 21an de marto, 1937a.

Ya vuelve la primavera
suene la gaita, — ruede la danza;
tiende sobre la pradera
el verde manto — de la esperanza.

(Jam denove printempiĝas;
sonu liuto — danca libero;
sur herbejo etendiĝas
verda mantelo de la espero).

Ĉu hazardas, ke ĝuste hodiaŭ, fine denove enrigardante mian lernolibron, mi trovis tiun ĉi printempan poemon de iu antikva hispana poeto? Mi voĉlegis ĝin al la serĝento, kiu portis al mi sian matenan raporton kaj ni ambaŭ ne povis ne ridi. „Sopla caliente la brisa” (tiom milde blovas la venteto) kantas la poeto, sed ŝajnas, kvazaŭ ĉi tie apud Las Rozas la froste malvarma norda vento ĉesas nur, por ke la froste malvarma pluvo povu fali tiom pli forte. Aliloke la reveno de printempo eble jam efektive rimarkiĝas.

Antaŭ proksimume dek tagoj mi havis kelkhoran forpermeson por almezurigi al mi en Madrid la novan uniformon, kiu nun estas deviga por oficiroj. Ĉe Puente de San Fernando iu mitralo elektis nian aŭtomobilon pafcelo. Furioze rapide ni surglitis la multangulan deklivon. Tra la fenestreto mi povis momenton vidi, ke diversaj arboj jam floras. Mi konjektas, ke migdalarboj. Sed Madrid mem prezentis malgajan aspekton pro la pluvo, kaj el niaj tranĉeoj ni vidas, ĝis la arbara rando de El Pardo, nenion krom la koto de plugitaj kaj poste malzorgitaj kampoj. Ho, la poetoj! „La flor rie en su capullo: suene la gaita — ruede la danza: canta el agua en su murmullo el poder santo de la esperanza!” (Ridas la floro en sia burĝono,

sonu la liuto, lokon por la danco, la akvo en sia murmuro kantas, la sankta forto de l'espero). La akvo, tra la tegmento de mia dometo gutanta sur tiun ĉi paperon kaj saturanta mian matracon, kantas kanteton tute alian. Inspirite de Piforver mi klopodas surpaperigi ĝiajn unuajn versojn:

La fruktoarboj jam printempe floras
kaj inter muskoj kreskas foliet';
kadavro antaŭ ni jam putrodoras,
disiĝas ĝia karno de l'skelet'.

La vent' odoras pro la timiano
kaj hele blua iĝas firmament';
pedikojn penas kapti mia mano,
sed cedas pro malvarmo de la vent'.

En arbustaro gaja bird' esprimas
ravkante sian ĝojon al ĉiel';
mi klinas min subite, ĉar mi timas
rapidan kuglon preter la orel'.

Mi ne sukcesas, mi rezignas; pro la nuna malvarmo mi sentas min kvazaŭ marmoto antaŭ sia vintra dormado. Al nenio ajn mi sentas inklinon, nek al legado, nek eĉ al ŝakludo kun Domela, ĉar ĝi postulas tro da cerbostreĉo. Kvazaŭ besto mi atendas la manĝaĵon, kiu ordinare venas je la sesa horo, nur esperante, ke survoje ĝi ne tro malvarmiĝos.

Siatempe ni elkriis honton pri la teraj domaĉoj sur la erikejo de Drente ¹⁾. Tia domaĉo estas palaco kompare kun la nia. Ĉu la kavernaj homoj eble tiel vivis? Ĉu en filoĝejoj, en kiuj la akvo ŝprucas el la tero? Ĉu surhavante kontraŭgasajn

1) Plej malriĉa nederlanda provinco. Trad.

maskojn, pro kiuj post unu horo ŝajnas, ke la kapo krevos? Mi supozas, ke ili estus abomene rifuzintaj ĉi tian vivon. Kaj krome ilin ĉirkaŭis iliaj edzinoj kaj infanoj, ili manĝis rostitan kapreolaĵon kaj trinkis bieron, kvankam el la kranioj de siaj venkitaj malamikoj. Ni, kontraŭe, manĝas kaj trinkas precipe koton.

Tre malproksime, kvazaŭ fatamorgano, situas Madrid sur montetoj. Pro neatingebleco ĝi povus egale troviĝi aliflanke sur la mondo. Nia tranĉeo estas kvazaŭ insuleto en maro da koto. Kiam mallumiĝas, ni penas plilongigi ĝin al la pozicio de Pignatelli. Tio estas laboro senespera, ĉar ĝi preskaŭ ne progresas. Profunde ni fiksiĝas en la argilon, ĉiuflanke elŝprucas la fundakvo kaj, ne havante sufiĉe da laboriloj, ni disfosas la grasecajn pecojn da tero per la manoj.

La solo, kio ligas nin kun la mondo, estas la ĵurnalo. Kelkfoje ĝi malfruas du, tri tagojn, sed ĝi almenaŭ venas, kaj la komunikoj, kiujn ĝi alportas, estas lastatage konstante favoraj. Kvazaŭmirakle ni sukcesis provizore rebati la kvinan ofensivon al Madrid. La bonege ekipitajn, plej modernajn trupojn de Mussolini venkis areto da simplaj hispanaj laboristoj. Madrid ne estas Addis Abeba. La roma vulturo serĉu siajn viktimojn aliloke! Kaj ankoraŭ foje: en niaj koroj revivas la espero. Denove mi trafolumas la libron kaj trovas, kvankam ne jam estas vera printempo, ke la poeto tamen ne tute malpravas:

Morirá la primavera
suene la gaita — ruede la danza:
mas cada año en la pradera
tornará el manto — de la esperanza.

(La printempo ree mortos;
sonu la liuto — danca libero;
sed herbejon nove kovros
verda mantelo — de la espero).

Kaj per tio mi finu! Pensi pri vi ĉi tage pli facilas al mi ol skribi aŭ poeti.

La 23an de marto, 1937a.

Vi ja komprenas, ke ni senlime ĝojas pri la granda venko en Guadalajara. Tio estas fortega bato al la internacia faŝismo! Sed la tempo por tio urĝis. Vi komprenu, el la homa materialo ne restis la plej bona parto. Kiujn oni nun mobilizas, tiuj ne estas samkvalitaj, kiaj la volontuloj el la unuaj tagoj. Kiel en ĉiu milito, ankaŭ en ĉi tiu la plej bonaj fortoj suferis la plej grandajn perdojn. Al Madrid kiel milionhoma urbo fariĝas pli kaj pli malfacile havigi nutraĵojn al sia armeo. Niaj fusiloj eluziĝas, ĉar ni ne havas rimedojn por purigi ilin. Novajn fusilojn ni tamen ne ricevas, pro la kontrolado. Sukeron ni ne konas plu, salo estas malofta, tabako plurfoje mankas; en Madrid virinoj kaj infanoj vivas proksime al malsatiĝo. Diru al la nederlandaj laboristoj, ke ni bezonas nutraĵojn kaj hejtaĵojn, sed antaŭ ĉio ŝarĝaŭtomobilojn kaj benzinon por transporti ilin!

Madrid, la 28an de marto, 1937a.

Koncerne miajn personajn spertojn mi ne povas rakonti al vi multon interesan kaj ankoraŭ malpli ian heroaĵon.

Dum pli ol tuta monato ni deĵoris ĉe iu fronto, kie ni atendis atakon, sed la atako ne okazis kaj, senkonsidere pri la ĉiutage okazantaj mortigoj per malamikaj kugloj, regis tia neaktivado, pri kia la armeaj komunikoj kutimas diri: ne estas menciinda novaĵo.

Super ni blovis la frosta vento de Sierra, la pluvo gutis tra

la tegmento de nia primitiva tendo, la tranĉeo pleniĝis per koto kaj sub la pajlo, sur kiu ni dormis, la terakvo fontis el la fundo. La bonhumoro kaj la fido de niaj milicanoj pruviĝis neĝeneblaj. Ni sciis, ke la malamiko atakas per eksterordinara materialo apud Jarama kaj Guadalajara; ni sciis, ke ĝi minacas niajn interligajn vojojn kun Valencia, sed neniu maltrankviliĝis, neniu dubis eĉ nur unu momenton, ke ni sukcesos rebati ĝin. La optimistoj praviĝis: kelke da tagoj poste ni ĝuis la neesprimeblan feliĉon, legante kiel en Guadalajara niaj trupoj venkis ne nur la faŝistojn de Franco, sed eĉ tiujn de Mussolini mem. Forte ardiĝis la entuziasmo. Sed la vivo en la tranĉeoj daŭris plu, kvazaŭ nenio estis okazinta, kun siaj malvarmo, enuado, maldureco kaj la preskaŭ ĉiutage notitaj viktimoj.

Fine, en beninda vespero, nin surprizis la komuniko: venos anstataŭo; kvar tagojn forpermese al Madrid!

Kiel mi klarigu al vi tiun nuran vorteton: Madrid? Por vi Madrid estas la urbo kun dumil pafe detruitaj loĝejoj, la urbo, super kiu konstante fantomas la prema ombro de la morto, la urbo, kiun suferado kaj mizero faris la plej nobla martiro en la mondo.

Kaj por ni?

Por tiuj el ni, kiuj naskiĝis en Madrid, ĝi signifas: familion, amikojn, la ĝojon de la revido kaj la kison de patrino.

Por tiuj, kiuj venis el la vilaĝoj, ĝi signifas: glason da vino en bona restoracio, lumon, muzikon, filmon aŭ teatron, dormi nokton en lito kun litotukoj, banon, nokton, kiun oni povas pasigi, demetinte la ŝuojn.

Ĝi signifas eĉ pli: ĝi signifas la urbon, por kiu ni suferis kaj batalis, la simbolon de l'internacia rezisto kontraŭ la faŝismo, la urbon, kiu fariĝis kara al ni kvazaŭ infano kaŭzinta al ni multajn zorgojn.

Kaj mi komprenas la francan volontulon, kiu hieraŭ, kvin minutojn post kiam meze en la urbocentro eksplodis grenado

kaj kiam la kadavroj ankoraŭ kuŝis surstrate, diris al mi: „Ĉi tie en Madrid mi sentas min hejme, kvazaŭ mi estas en Paris”.

La koton kaj poste ankaŭ la arbarojn ni lasas post ni, ni revidas la unuajn tramojn, la unuajn malfermitajn butikojn, la virojn antaŭ la kafeja vendotablo. Kiel akceptos nin la urbo? Mi rememoras iaman senton: kiam ni post nia nokta laboro en minejo lifte supreniĝis, kiam la unua griza lumradio penetris en la ŝakton, ni demandis al ni, ĉu pluvas aŭ ĉu brilas la suno. Ankaŭ post monatoj da marveturado ni staris tiel antaŭe sur la ferdeko, esplore rigardante, ĉu vidiĝas haveno.

Nu, mi diru, ke ĉi foje la urbo reĝe akceptis nin. Ĉi foje la suno brilis en ĉiuj stratoj kaj eĉ sur la pafe detruitaj domoj, kie la infanoj ludis inter la ruinaĵoj. Sed ne estis nur la unua printempa suno karesanta nin per sia varmo, pli forte ol ĝi brilis en multies koroj la suno de feliĉo pro nia granda, brila venko en Guadalajara.

La unua grava demando, kiun sentas la milicano iranta forpermeso, estas: Kiel mi utiligu tiujn ĉi kelke da grandvaloraj horoj donacitaj al mi? Avide li prenas la ĵurnalon, abundo da bonegaj filmoj logas lin, sed ĉu li prefere aŭskultu fine bonan muzikon? Ĉi vespere okazos bonega koncerto; en la teatro Español oni prezentos „Electra”. Sendecida mi migras tra la stratoj. La butikoj logas; en Almacenes, kie oni aranĝis elvendadon, la homoj amase eniras. Mi sentas min kiel maldungita maristo, kiu prefere diselspezus ĉiom da sia mono jam tiun saman posttagmezon. Aŭ ĉu mi legu librojn? Dum kiom da tempo mi ne legis plu ion seriozan, kaj ĉi tie sur centoj da ĉaretoj surstrate libroj estas aĉeteblaj nur per kelke da pesetoj! Aŭ ĉu mi eble vizitu la grandan manifestacion, kiun hodiaŭ aranĝis la social-demokrata partio, por ke mi partoprenu en la entuziasmo de l'vizitantoj?

Sur unu el la lernejoj de la junula movado Alerta pendas,

apud murgazeto, infanmane skribita afiŝo: Granda festo de l'Junularo en Cinema Fuencaral. Mi pagas mian unupesetan enirmonon kaj subite ĉirkaŭas min plej gaja infannaskiĝtaga atmosfero. La salonon plenigas gejunuloj ĉiuaĝaj, el kiuj multajn akompanis la gepatroj. Dum la paŭzoj konfuze bruas voĉoj, kantado, paperaj flugmaŝinoj flirte turniĝas de sur la balkonoj malsupren, kune kun manifestoj invitantaj al la granda kongreso, en kiu la unuiĝo de la tuta madrida junularo fariĝos fakto. Sur la scenejo ludas geknaboj dek-sep- kaj dek-okjaraj en belkoloraj hispanaj kostumoj. Ili ludas teatraĵon, en kiu mi ne konstatas revolucian tendencon, sed kiu estas plena de infanaj spirito kaj humoro.

Tiun saman posttagmezon mi eniras kinematografejon, ĉar logas min la filmo: Etiopio, kiu rememorigas al mi nian devizon de antaŭ kelke da tagoj: Madrid ne estas Addis Abeba. Kiam la imperiestro aperas sur la ekranon, oni salutas lin aplaŭde. Sur la galerio iu elkrias: „Ni volas daŭrigi vian batalon kaj venki”.

Poste ruliĝas la hispana kontraŭmilita filmo: Homoj kontraŭ homoj. Fantaziaspektaj militaj bildoj, kiajn nuntempe en neniuj aliaj landoj toleras la cenzuro. Akra akuzo kontraŭ ĉiuj, kiuj deziras la militon. Kaj la publiko, grandparte konsistanta el milicanoj, kiuj same kiel mi havas forpermeson, aplaŭdas. Ĉi tian teroron ĝi spertis proprakorpe. Morgaŭ ili bonhumore reiros en la inferon. La akuzon tamen, kontraŭ la milito ili aplaŭdas el profundo de siaj koroj. Ĉi tiuj batalantoj, kiuj venkis la italojn, restas pacifistoj. Ili militas, ĉar nur tiel la mondmilito dezirata de l'faŝismo, estas malhelpebla. Ili ofertas siajn vivojn por savi la vivojn de tuta generacio venonta post ili.

Tiuvespere mi manĝas en hotelo Gran Via. Ĉi tie kunvenas la eksterlandanoj: ĵurnalistoj, sciencistoj, aktoroj, aviadistoj, ofte ankaŭ oficiroj kaj soldatoj de l'Internacia Bataliono. Por ni venintaj de la fronto, tio signifas la interkomunikon kun la

cetera mondo, la aktualaj novaĵoj el Usono, Francio, Britio. Tie mi trovas Regler, Hemmingway, Franklin, Ivens kaj fiere mi konscias renove, ke nuntempe la plej bonaj artistoj kaj intelektuloj venas al Madrid por pruvi, endanĝerigante la propran vivon, solidarecon kun nia afero. Ĉu Franco povas diri la samon? Kiu el la verkistoj de l'reakcio soldatiĝis en liajn vicojn? Ĉu Heinz Ewers, Daudet aŭ Maurois?

LOS CHIQUETILLOS.

La kaporalo venis al mi por plendi, ke la danĝeran observan postenon li ne volas okupi kun trupo konsistanta nur el „chicquetillos” (knaboj). Atente mi rigardis la kvar novulojn kaj konvinkiĝis, ke li pravas. Kvankam menciinte, ke ili estas dek-sepjaraj, ili efektive ŝajnis al mi pli dek-kvin- ol dek-sesjaraj. Madrida knabo tiuaĝa estas ĝenerale jam viro, sed ĉi tiuj estis tipaj kampionistaj knaboj kun infanaj vizaĝoj kaj infanaj korpoj, pro kio preskaŭ ŝajnis, ke siajn malgraciajn, sulkiĝintajn kaj malpure krudiĝintajn manojn ili pruntis de siaj patroj samtempe kun la supren falditaj, tro longaj pantalonoj.

„Efektive”, mi ekpensis, „la plej bonaj jam malaperis”, ĉi tiuj jam ne egalas la unuajn volontulojn, kiuj, kun ruĝnigraj koltukoj, en septembro anoncis sin en la kazernoj kaj en kies okuloj kun preskaŭ mistika fanatismo ardis la volo por venki. Kvankam en la poŝo ili portas la ateston pri membreco de la junulara movado kun nur unu kotizmarko, ili reale apartenas al la plej mizeraj el la malriĉuloj, senditaj de siaj gepatroj el iu ajn malsatanta vilaĝo al la fronto por la dek-peseta salajro, kiun ni ricevas.

Mi konjektis, ke ankaŭ la politika konvinko ne radikis profunde en knaboj neniam vidintaj la internon de lernejo kaj ne povantaj distingi inter a kaj b. Kvankam, mi konsideris,

ja ankaŭ la aliaj lernis sian socialismon ne el libroj, sed ekskluzive en la lernejo de malsato, maljusto kaj mizero. Kiel ajn estis, mi apartigis la knabojn al kvar diversaj trupoj, kie ili kunestas kun niaj veteranoj el Sierra kaj krom tio, kiel kapitano de mia kompanio mi havis tro multe da aliaj zorgoj en la kapo, ol ke mi povus pensi speciale pri ili. Tiutempe ni kuŝis en koto kaj malpuraĵo de kelke da neprofundaj tranĉeoj kontraŭ Las Rozas; la terakvo fontis el la fundo, pro kio tramalsekiĝis eĉ la pajlo en niaj tendoj. Froste malvarma vento blovis preskaŭ konstante de sur Guadarama kaj kvankam ne okazis gravaj bataloj, ni tamen devis noti preskaŭ ĉiutage mortigiton aŭ vunditon pro la trafe celitaj kugloj de la malamiko. La deĵoro, pro potrihora postenado nokte, estis ekstreme laciga, ĉar ni disponis ankoraŭ pri tro malmulte da trupoj; sed evidente miaj kvar *chicquillos* plenumis sian devon, ĉar almenaŭ ne atingis min plendoj kaj neniujoje mi bezonis puni. Iufoje kontrolirante, mi rimarkis nur hazarde, ke malgranda Diogracias gardestaras nudpiede en siaj tro grandaj ŝuoj. Ŝajne li kredis, ke tio estas devo aŭ ĉiuokaze mankis al li kuraĝo por peti ŝtrumpojn.

Jen venis printempo. En la eksterdanĝeraj vilakvartaloj de Madrid, kie mi unufoje estis, havante kvardek-okhoran forpermeson por almezurigi al mi uniformon, la migdalarboj jam longe estis kovritaj de purpura floraro, kaj sub la tragike rigidaj kverkoj de El Pardo la tero estis flava kaj violkolora pro floroj, sed nia senherba ebenaĵo estis ankoraŭ la sama kruda dezertaĵo, kie, en neniestereno, nur la nigraj konturoj de kelke da kadavroj vidiĝis sur la bruna koto. Subite tamen, kvazaŭ laŭ kontraŭordono, la vento malaperis kaj, kvazaŭ volante regajni la perditan tempon, rapidege aperis la suno el post la lastaj nuboj. Du tagojn poste la tuta senherba ebenaĵo ŝanĝis sian koloron; jen kaj jen ekaperis flavaj kaj violkoloraj floroj inter la junaj herboj, kaj laŭlonge de la rivereto, malsupre

serpentumanta tra la valo, la maldense-branĉaj salikoj vestis sin preskaŭ provoke per flave verda livreo.

Ankaŭ la homoj vekigis kvazaŭ el vintra dormo. Kun la suno revenis ankaŭ ilia energio, kaj, en militista reorganizo, ni regajnis kelksemajne, kion ni preterlasis dum monatoj. El la konkeraĵo en Guadalajara ni ricevis novajn, italajn maŝin-pafilojn, oni disdonis ŝtalajn kaskojn kaj denove dediĉis zorgon al la instrukcio. La manĝoj fariĝis pli multaj kaj pli bonaj ol ili estis dum monatoj. El Valencia alvenis kiel bongusta variaĵo, la unuaj oranĝoj. El la hospitaloj malrapide revenis al la fronto pokelke la vunditoj kaj resaniĝintoj. Per la novaj, mobilizitaj rekrutaroj la kompanio kelke da tagoj poste rekompletigis. Mi povis disponi pri pli multe da tempo por observi la homojn de mia trupo pli aparte.

Ĉe bela vetero ili kvazaŭ helikoj rampis el siaj konkoj. Vespere sonis denove la *flamengos*. Ni eklaboris kaj dum kelke da noktoj ni fose antaŭenigis nian pozicion ĝis Las Rozas. Tage, tamen, kaj dum la respektataj siestoj, dum kiuj neniu el ambaŭ partioj kutimas pafi, ni sune banis nin en la tranĉeo. La plej aĝaj en la kompanio estis konstruintaj ian foliobranĉan tendon, kies verdaĵo leviĝis super la parapeto, tiel formanta konvenan trafcelon al la malamikaj kugloj. Fajfe ili flugis tra la branĉoj kaj malproksimen al la ebenaĵo post ni, sed sub la salika branĉaro en kavo sidis niaj viroj trankvile sur benketoj, rakontante al si reciproke senfinajn historiojn, same kiel antaŭe sur la vilaĝa placo. Ili parolis pri la prezo de la porkoj kaj pri la jaro 1925a, kiam la greno sur la kampoj kreskis treege alta. La pli junaj, kontraŭe, montris al si reciproke la portretojn de siaj *novias* aŭ skribis, kun la lango eksterbuŝe, leterojn, kies marĝenon ili ornamis per kolora krajono. Plej multe el ĉiuj tamen, ŝanĝigis miaj kvar *chicquetillos*; kvazaŭ junaj ŝafidoj unufoje venantaj en la herbejon kaj apenaŭ sciantaj kiel montri sian petolemon.

Diogracias, kiu havas malgrandan ventreton kaj buŝon ĉiam ridantan, gardestaris portante nenion krom siaj multe tro grandaj ŝuoj, mallonga blanka pantaloneto, ŝtala kasko, zonrimeno kaj kontraŭ-gasa masko sur la nuda korpo.

Agapito tro ĝuis la kastilian sunvarmegon, pro kio lia haŭto diskvamiĝas kvazaŭ platana basto, kaj Pedro Nenni, kiu malkontentas pri la portreto, kiun mi desegnis pri li, ĉar sur ĝi li pli similas malgrandan siemieton, konstante grimacas kun rikano etendiĝanta ĝis liaj pendantaj oreloj. Dekoracie nia nova armeo ne povas rikolti multan honoron per tiaj ĉi rekrutoj!

Se ne estus io pli grava . . . Sed la stimula printempa aero evidente eferveskas kvazaŭ freŝa vino en iliaj pulmoj, ĉar jen mi vidas subite Rubio iranta permane, ĉe kio liaj larĝaj piedoj danĝere leviĝas super nia parapeto, jen ili kapre saltas kaj en sia troa petolemo transkape falas tra tenda tegmento, ĝuste antaŭ la piedojn de nia serioza kaj digna serĝento Florenciano. Tiaokaze decas puno kaj duonhoron poste mi vidas Diogracias pentoplene manipulanta ŝovelilon kaj pioĉon, dum kiam la aliaj ĝuas sian sieston.

Kompreneble, Florenciano pravas: soldatoj estas soldatoj, senkonsidere pri siaj aĝoj; kaj tamen mi ne kontentas pri mi mem; se morgaŭ okazu kuglo trafos la knabon, kiel mi do respondu pri tiu ununura horo, kiun mi forprenis el lia vivoĝojo?

En la lastaj tagoj mi eltrovis ion por konduki ilian troan energion en laŭdisciplina direkto. La unua de majo estas proksima kaj nia komandanto aranĝis konkursojn en rapidkurado kaj distanca saltado, kiujn povas partopreni unu sekcio el ĉiu kompanio. Konforme al tio mi nun ĉiumatene ekzercas min kun deko da volontuloj.

Kaj la tereno? Longan tempon la valo, kiun trafluas la rivereto, dekstre de ni, signifis nur minacon. Tra ĝi la mal-

amiko povus nokte, nevidate, antaŭeniri por ataki nin de poste. Formi tie linion ne eblis, ĉar en Las Rozas staris mitralo direktita rekte al la rivereto. Sed nun estas printempo kaj la abundo da foliaro de la arbustoj malebligis la rigardon laŭlonge de la rivereto. Laŭ kava vojo ni povas nevidate malsupreniri ĝis en la valo, kaj tiom multe da municio la malamiko ne havas, ke ĝi pafus sen videbla trafcelo.

Do, en la arbuste borderita valo mi nun ĉiumatene instruas gimnastikon. Laŭsisteme mi instruas la ekzercojn de Müller kaj tiujn, kiujn mi lernis en la tendaro de Noissy le Grand. La knaboj, ĉiuj nudaj, plejeble bone ekzercas sin, kvazaŭ temas pri militista instrukcio. En la ripozaj paŭzoj ili plaŭdas en la rivereto, disŝutas sin reciproke per koto aŭ ludas la ludetojn, kiujn mi en mia junaĝo lernis inter la skoltoj. Estas rimarkinde, kiom multe ili plifleksebligis kaj plivigliĝis en ĉi tiuj malmulte da tagoj. Ili trovas plezuron en tio; por ili tiu ĉi gimnastika horo estas la kulmino de la tago. La malamikon ili forgesis. Nur mi scias, ke ĉiumomente la mitralo en Las Rozas povas komenci sian bojpaŝadon kaj ke la folioj de l'arbustoj ne prezentas ŝirmon kontraŭ la kugloj. Ĉu mi agas laŭ mia respondec? Estas certe, ke tiuj ĉi bruniĝintaj korpoj okaze de atako pli valoras ol antaŭe, kaj la humoro en la tranĉeo ĉiutage videble pliboniĝas. La knaboj sin sentas feliĉaj kaj hazarda kuglo ja ĉie povas trafi ilin. Sentimentalaj ni ne estas kaj la vortoj: „quiza el camino hay que regar, con sangre de la juventud” (eĉ se nia vojo estus aspergenda per la sango de l'junularo), kiuj ĉie aliloke sonus patose, estas ĉe ni nur vero per si komprenebla. Kaj tamen, kiom mizera mi sentus min, se mi devus reporti al la tranĉeoj unu el tiuj ĉi junaj korpoj sanganta kaj senkonscia, same kiaj mi jam vidis tiom multajn...

Estas absolute necese, ke neniuj divenu miajn pensojn kaj mi ordonas: profunde fleksu la genuojn, spiru etendante!

La rave brila suno de l'kastilia montaro, al kiu ni treege sopiris, havas unu malavantaĝon: ke la kadavroj kuŝantaj inter nia kaj la malamika linioj grave komencas malbonodori. Per varmetaj blovetoj la vento alportas al ni sufokan, naŭze dolĉan odoron, kiu faras la vivon en la tranĉeo preskaŭ neeltenebla. Krom tio komencas minaci danĝero de tifo. Mi petas liber-volulojn por nokta patrolo por enterigi la mortigitojn. Kiel unuaj anoncas sin miaj kvar *chicquetillos* kaj mi decidas, konfidante la kuraĝon de juneco, riski la aferon kun ili. Favore la luno ĉi nokte denove kaŝiĝas kelktempe post la nuboj. Kvazaŭ katoj ni rampas el la tranĉeo kaj poste, per la korpo preskaŭ tuŝante la teron, al la rando de l'monteto. Fine, veninte en la ombro de la valo, ni povas preskaŭ centon da metroj iri rekte. La pliakriĝanta kadavra odoro senerare gvidas nin, sed, ĝuste en la momento, kiam ni atingas la kontraŭan randon de l'monteto, la luno aperas el post la nuboj. Rigardante posten mi vidas la kvar knaboj senmove kuŝantaj sur la kampo. Kvazaŭ per nevideblaj fadenoj mi sentas min ligita kun ili. Mi scias, ke ili havas senliman konfidon al mi, sed ankaŭ, ke ili, ne povante mem iniciati, absolute pereus en la momento, kiam mi perdus la prudenton. La luno rekaŝas sin kaj singarde mi rampas plu. Jen kuŝas la kadavroj. Ili formas malhelan, naŭze malbonodorantan mason jam forte putrantan. Kun plej granda peno mi subpremas subitan bezonon vomi. Feliĉe miaj knaboj havas malpli impreseblajn sentorganojn; ili hakas kaj fosas, pensante pri nenio alia kaj kelke da minutoj post tio la unua kadavro kusas en la tero. Dume mi observas la terenon. Dank' al Dio troviĝas en nia proksimo fosaĵo, en kiun ni povos, en okazo de neceso, kaŝi nin. Apud mi fleksas kaj streĉas sin la korpoj; iliaj pioĉoj trafas obtuzasone la teron kaj kelkfoje vidiĝas malgranda fajrero, kiam la fero puŝiĝas sur ŝtonojn. Nur unu kadavro kuŝas ankoraŭ sur la tero, post kvin minutoj ni povos reiri . . .

Tiumomente iu malbenita strathundo ie en Las Rozas komencas plende hurli. Mia koro kvazaŭ ĉesas frapi. Mi komandas: „En la fosaĵon!” sed miaj paroloj estas cindre sekaj kaj mi ne scias, ĉu iu aŭdis ilin. Preskaŭ sammomente leviĝas raketo, verde lumiganta la teron ĉirkaŭ ni kaj du maŝinpafiloj komencas nerve furioze boji. Premante niajn vizaĝojn en la koton, ni aŭdas tuj super ni la minacan fajfadon de la kugloj. Evidente oni ne vidis nin, dekelke da minutoj poste ĉesas la pafado, niaj knaboj elrampas la fosaĵon kaj la pioĉoj rekomencas la laboron. Poste ni ekreiras. Mia revolvero pezas kvazaŭ plumbo en la mano kaj mi devas regi min mem por ne kuri. Havante la malamikon post la dorso oni sentas sin multe pli minacata ol irante al li renkonte.

Mi ordonis porti la matenan kafon en mian tendon kaj fordormis parton de la mateno. Kiam mi leviĝis, la suno brilis brulige kaj, krom la gardestarantoj ĉiuj estis forlasintaj la tranĉeon. Ĉiuj, kiuj ne deĵoris, serĉis ombbron en la tendoj. Malrapide mi faris la kontroliron kaj haltis momenton ĉe la tendo, kie dormis niaj *chicquettillos*. Interne de ĝi balbute sonis voĉo: a, b, c, be, a-ma, uve. Mi memoris, ke Carlos Suarez, nia ekslibrotenisto, kiu instruas la analfabetojn, diris al mi, ke Pedro Nenni apartenas al liaj plej bonaj lernantoj. Tial mi forpuŝis la sakon pendantan antaŭ la enirejo kaj eniris. Suarez kaŭris kaj la kvar *chicquettillos* havis ĉiuj a-b-c-libron sur la genuoj. La buŝo de Pedro Nenni ŝire malfermiĝis ĝisorele, kiam li vidis min; metante la manon senĝene sur mian brakon li demandis ride: „Ĉu ne vere? La faŝistoj pafas malbone, ĉu? Ili ne lernis, por kio utilas la celilo, pro tio iliaj kugloj ĉiam pafiĝas tro alte kaj ili ne povas trafi nin!”

PAJARO NEGRO.

Mi ne povas diri kun certo, ĉu la birdo, kiun niaj kamaradoj en la komencaj printempotagoj trovis ie inter la arbustoj apud la rivereto, estas pigo aŭ korvo. Certas nur, ke komence ĝi montris neniom da kontento pri sia kaptiteco kaj per sia akra beko haketis sangajn sulketojn en la manoj de la knabo tenanta ĝin.

Ridante kaj alude pri la faŝistaj aviadiloj, kiuj ja estas samnomaj, niaj soldatoj nomis ĝin: „nuestra pajarero negro”. Ili amuzis sin pro ĝiaj ŝanceliĝaj paŝetoj, lasis ĝin por rekapti ĝin per la ĉapo, kiam la besto, tro peza proporcie al siaj ankoraŭ junaj flugiloj, flirte-salte klopodis fuĝi. Post kelke da tagoj tamen, la rilato inter nia *pajarero negro* kaj la soldatoj de la kvara kompanio tute ŝanĝiĝis. La eta birda koro frapis ne plu tiom time kaj malkviete en iliaj kalaj manoj kaj la ruzajn koral-similajn okuletojn forlasis ilia time maltrankvila esprimo. Kvazaŭ konkure niaj kamaradoj serĉis en la tranĉeoj akridojn, kiuj vane klopodis suprengrimpi sur la krutaj vandoj, kaj deŝiris iliajn piedojn, ĉar la birdo evidente timis iliajn jukmovetojn, kaj poste ili puŝis la dikajn verdajn korpojn en ĝian ĉiam malsate malfermitan bekon. Nokte ĝi dormis en la malaltaj kuŝejoj, varme inter la tufoj de iliaj netonditaj haroj. Dum mallonga tempo nia *pajarero negro* fariĝis la feliĉiga dorlotilo de la kompanio, kiun oni fiere montris al ĉiu novulo en nia tranĉeo. Malgraŭ tio estis nepra fakto, ke la birdo apartenas al Juan-Antonio, kiu estis trovinta ĝin. Ĝuste Juan-Antonio instruis al ĝi etapaŝe marŝi laŭ la komando: „izquierda, derecha, up arrow, un dos”, kaj kiam Juan-Antonio gardestaris en la antaŭa tranĉeo, la birdo sidis sur lia ŝultro. Ŝajnis, ke la besto havas ian konscion pri tio, kio okazas, kaj precipe ĝi abomenis mitralan pafadon. Kiam la kontraŭuloj komencis maŝine pafadi, ĝi hirtigis la plumojn, tenis la kapeton oblikva

kaj kvazaŭ kolera bubo grakis „kra kra” kontraŭ la malamiko. Se tiuokaze mi preteriris, Juan-Antonio haltigis min, dirante kun feliĉa rideto: „Ĉu vi aŭdas, *teniente*, „no pasaran, no pasaran”, ĝi diras!”

Tiel la situacio daŭris plurajn semajnojn kaj mi forte suspektas Carlo Suarez, nian maljunan administranton, ke li ĉiutage, kun la grandlibro sur la genuoj, akurate kiel antaŭe, kiam li estis ankoraŭ librotenisto en Madrid, ruĝ- kaj nigrainke registrante la liston de l’kompanio, korekte enskribas nian *pajaro negro* kiel milicanon numero tioma.

En iu mateno, egala al multaj aliaj, mi donis mian ordinaran militistan instrukcion al la sendeĵora gvardio en la dua linio. Tiutage la suno brilis jam senkompate kaj multaj milicanoj, kiuj nokte estis gardestarintaj, rigardis nur kapklinete kaj dormokule al la trajektorioj, kiujn mi desegnis sur la nigran tabulon de la kompanio. La alveno de l’milita poŝtisto estis konvena motivo por fari finon al tio. Pogrupe la kamaradoj reiris antaŭ siajn tendojn. Ĉiun, kiu sciis legi, ĉirkaŭis kelke da kamaradoj transŝulte partoprenantaj la legadon; kaj kiu ne sciis tiun „arton”, petis al pli instruitaj kamaradoj, voĉlegi la leteron vorton post vorto. Mi mem ne ricevis leteron kaj sidis surŝtone, iom malgaje kaj enue rigardante antaŭ min. Subite min rekonsciigis el mia meditado kruda bruo de blasfemoj kaj insultoj, kaj kun miro — ĉar en nia kompanio, deĵoranta jam dek monatojn ĉe la fronto, malpaco inter kamaradoj estis io, kio okazis nur tre malofte — mi vidis, ke antaŭ unu tendo aliflanke de l’tranĉeo evidente okazas interbatado. Rapide mi ekstaris kaj iris al la grupo, sed oni jam vidis min aliranta kaj ekiris al mi renkonte, antaŭe la „ciganeto”, portanta sur la malfermitaj manoj la kadavreton de nia *pajaro negro*. „Assassinau” (mortigita), li diris nur. El la konfuzaj kaj ekscititaj voĉoj, samtempe kriantaj, mi ekkomprenis almenaŭ tiom, ke Juan-Antonio mem strangolis sian birdon.

Mirege mi rigardis lin. Li sidis kun blubatita okulo, distaŭzitaĵaj haroj kaj la vizaĝo plena de koto kontraŭ la parapeto, impresanta kiel stratbubo, ricevinta porcion da batoj, sed malgraŭe ne volanta konfesi malpravon. La nuraj vortoj, kiujn mi sukcesis eltiri el lia buŝo, estis: „Al mia birdo mi faras, kion mi volas kaj se mi volas turni al ĝi la kolon, mi turnas al ĝi la kolon. Se oni volas pafmortigi min pro tio, oni faru laŭvole”.

Post mi antaŭenpuŝiĝis la soldatoj de la kompanio, scivolaj pri tio, kion mi diros. Pli kaj pli mi nekomprenis la aferon; volante ekhavi tempon por pripensi, mi klinis min teren kaj prenis ĉifitan folion de poŝtpapero, kiu pro la vento bloviĝis antaŭ miajn piedojn.

Senpense glatiginte la folion, mi vidis subite sur la komenco, ke la letero estas rekte adresita al Juan-Antonio. Nun mi komencis legi plentente. Ĝi estis tipa kamparana letero, sen majuskloj, komoj kaj punktoj, kun amaso da lingvaj eraroj, inter kiuj la literoj v kaj b kvazaŭlude interŝanĝis sian lokon kaj h sialoke ĉie mankis, sed neatendite aperis aliloke. Mi kredas, ke mi ankoraŭ memoras la enhavon preskaŭ laŭvorte: „kara juan-antonio”, skribis lia patro, „ni ĝojas ekscii ke vi fartas bone kaj ni ĝojas por skribi vin ke mi ankaŭ bone fartas kaj via fratineto pepita ankaŭ bone fartas kaj sarmen ankaŭ kaj via fratetoj juanita kaj carlo kaj felipe kaj quintin fartas ankaŭ bone kaj via amikoj pepe kaj antonio kaj blonda antonio fartas ankaŭ bone kaj via fianĉino rosita fartas ankaŭ bone kaj igas saluti vin”. Ĝis tie la letero estis skribita per firma mano kaj klarlitere, sed poste sekvis kelkaj trastrekitaj linioj, kvazaŭ la skribinto iom hezitis, kion skribi plu. Poste la letero tekstis jene: „kaj ni bedaŭras devi skribi vin ke via patrino fartas ne bone ĉar la antaŭan semajnon la nigraj birdoj venis super nia vilaĝo kaj bombardis ĝin kaj ni ĉiuj forkuris en la kampoj sed via patrino reiris por savi la bovinon el la stalo

kaj kiam ŝi revenis en la kampo pafis la nigraj birdoj per maŝinpafiloj kaj ili trafis vian patrino en la ŝultro kaj via patrino igas demandi se la kapitano aprobas ĉu vi ne povos veni kelke da tagoj forpermeso ĉar ŝi suferas gravan doloron sed se ne povas tiam estas ankaŭ bone ĉar ni ĉiuj ja suferas kaj batalas por la afero (*por la causa*) kaj pepita kaj carmen kaj juanita kaj carlo kaj felipe igas saluti vin kaj via amikoj ankaŭ kaj via fianĉino ankaŭ kaj via patro ankaŭ kaj via patrino ĉirkaŭpremas vin kun *salud* kaj *suerte* de via patro antonio”.

Finleginte la leteron mi vidis, ke Juan-Antonio fortunis sin kaj, kun la vizaĝo kontraŭ la parapeto kuŝas mallaŭte plorsingultante. Al la viroj mi diris: „Lasu lin en trankvilo, lia patrino estas vundita de la *pajaros negros*”. La milicanoj disiris kaj la ciganeto forĵetis la kadavreton de la nigra birdo trans la parapeton en la direkto de l’malamiko.

LA COSECHA ES SAGRADA.

Unu tagon monotone sekvas alia, kvazaŭ kunĉenitaj punlaboruloj en senfine tede griza mallibereja vestaro pretermarŝas de horizonto horizonten. Nur la suno ĉiutage brulige brilas pli forte kaj pro la kreskanta varmego iĝas pli kaj pli naŭza la malbonodoro de la neenterigitaj kadavroj, kiun la vento blovas al ni. La plej granda problemo estas nuntempe la manko pri akvo. La akvo, kiun ni alportas el la *noria* ĉe la komandejo, jam varmiĝis antaŭ ol ĝi atingas la tranĉeon, kaj en la riveretoj troviĝas ankoraŭ nur kelkloke malpuraj neprofundaj flakoj. Apud Casa del Cuartel estas ankoraŭ baseno, en kiu ni povas bani nin, sed la malamiko perpafe baras la alirejon al la baseno,

kaj ni ekzercas nin en ia sporto: per atendita streĉo kaj rapida salto malaperi en ĝin antaŭ ol la malamika maŝinpafilo trovis tempon por pafi. Poste revenante ni devas ventraltere rampi tra la polvo.

En la valo, proksimume kvindek metrojn antaŭ niaj linioj, mi eltrovis ŝirmitan lokon, kie ankoraŭ troviĝas akvo kaj kiu estis speciale alloga, ĉar la tabanoj, flugantaj de kadavroj al vivantoj, tien ne venas.

Kiam mi antaŭ kelkaj tagoj kun serĝento Adolf iris tien por bani, subite atakis nin maŝinpafilo. En la malmultaj kvadratmetroj da bordo la sablo suprenŝprucis kvazaŭ akveroj en flako dum fortega pluvo. Adolf, kuŝanta sur la loko, kie ordinare mi banas min en la suno, estis trafata per kugloj en la gluteo kaj en la ŝultro. Mi mem saviĝis senakcidente. Ne senmotive la soldatoj diras ŝerce, ke kapitano Last sendube havas iun patronon, kiu lin protektas!

Nun ni havas nian „hogar del combatiente” (soldatan hejmon) en la tranĉeo kaj lernejon, kie instruas *miliciano de la cultura* kun bonaj rezultatoj. Oni kortuŝiĝas, vidante, kiel tiuj, kiuj jam scias la literojn, sed ne jam komprenas la ortografion, aŭskultas, kiam pli instruitaj kamaradoj laŭpete voĉlegas al ili literon post litero la leterojn, kiujn ili skribas al siaj familioj. Antaŭ kelke da tagoj venis al mi maljuna Lopez. La kapitano nepre legu la unuan leteron, kiun li skribis.

Mi legis: „Kara edzino. Ĉiutage mi sentas min pli feliĉa pro tio, ke mi venis tien ĉi, ĉar ĉi tie en la tranĉeo mi fine lernis ĉiujn ĉi aferojn, kiujn mi neniam povis lerni en nia vilaĝo”.

Unu el niaj lertaj lernantoj estas nia malgranda Pedro Nenni, sed ofte mankas al li volonto kaj ne deĵorante postene li preferas sekrete foriri por ĉasi lacertojn kaj serpentojn inter la montetoj. Mi ne lasis mildigi min per peceto da rostita lacertaĵo, kiun li proponis al mi, sed punis lin per ses horoj da ekstra postenado

en la tranĉeo. Kelke da tagoj poste dumdumkuglo¹⁾ frakasis la ostetojn de lia dekstra mano. Kiam mi vizitis lin en la hospitalo en Valdelatas, li montris al mi sian bandaĝitan manon, dirante kun malgaja rideto: „Neniel efikis, kapitano. Nun mi ja ne povas plu skribi!”

Unu el la plej malagrablaj aferoj apartenantaj al mia kapitana tasko, estas redakti la liston de la forpermesoj. Neniu scias, kiam nia kompanio fine estos anstataŭata, kaj tiom longe kiom tio daŭras, mi rajtas nur ĉiun trian tagon forpermesi al Madrid du virojn po kvardek ok horoj. Ĉar nia kompanio nombras cent kvardek virojn, oni facile povas kalkuli, kion tio signifas por tiuj, kiuj troviĝas malsupre sur la listo. Kune kun la politika komisaro mi redaktis la liston kiom eble plej juste, ĉe tio konsiderante pruvitajn kuraĝon kaj fervoron kaj familiajn cirkonstancojn, kiom ni almenaŭ scias pri ili. Tamen ĉiufoje montriĝas specialaj okazoj postulantaj modifojn: „Kapitano, mia edzino skribis, ke eble ĉi semajne ŝi akuŝos”. „Kapitano, mia frato kuŝas grave vundita en hospitalo kaj ĉiutage atendas la morton”. „Kapitano, mia patrino estos evakue sendata al Valencia kaj tre deziras vidi min nur unu fojon antaŭ sia foriro”. Preskaŭ ĉiam iliaj deziroj havas pravan motivon; ofte ili estas eĉ kortuŝaj kaj neniam mi spertis, ke iu klopodas eldevigi forpermeson per impertinento aŭ akraj paroloj. Sed la aliaj, kies vico jam proksimiĝis laŭ la listo, jam antaŭĝoĝis pri la forpermeso kaj oftfoje jam anoncis sian alvenon al la familio. Tiuokaze necesas interkonsento kaj la fino de multaj paroloj ĝenerale estas, ke la rajtinto post bedaŭro kaj plendoj tamen libervole cedas sian vicon al kamarado.

Por propra faciligo mi enkondukis, certigante la disciplinon, ian unuecan sistemon de punoj. Por negravaj peketoj mi

¹⁾ Kuglo, kies ŝtala eksteraĵo surpinte estas forigita, pro tio eksplode kaŭzanta teruran vundon. Trad.

elpensis tre simplan punon, kiu tamen forte tuŝas ilin: mi rifuzas desegni la kulpinton. Ilia deziro esti desegnita estas tiom pli rimarkinda, ĉar nur tre malmultaj deziras ankaŭ posedi la desegnaĵon, kiam ĝi estas preta. La pli multaj jam tute kontentas portrete troviĝi en mia skizlibro, kiu pro tio nepre estu montrata al ĉiu, kiu vizite venas en la tranĉeon. Sammotive vilaĝaj infanoj ĉiam petas esti fotografataj, kvankam estante certaj, ke ili neniam vidos la fotografiaĵon. Ĉu eble kaŝiĝas en tio ia nekonsciata deziro al pluezkisto?

Alia kaj pli severa puno, kiun mi aplikas, estas, ke mi trastrekas la nomon de l'kulpulo sur la forpermesa listo por meti ĝin malsupren sur ĝi.

Kiam Magro Vacas, cetere unu el miaj plej bonaj serĝentoj, antaŭ kelke da semajnoj forgesis distribuigi la matenan kafon ankaŭ al la postenantoj en la antaŭa linio, mi ne povis ne pruvi, ke la leĝo, senkonsidere pri la persono, aplikiĝas same al suboficiroj kiel al ordinaraj soldatoj. Vacas, havanta junan edzinon en Madrid, vane petegis min, ŝanĝi tiun ĉi punon en kian ajn alian plejeble severan.

Tiom pli mi ĝojis pri la ordono, ke ĉiuj suboficiroj, senkonsidere pri ilia forpermesa vico, iru por dudek kvar horoj al Madrid por mezurigi al si novan devigitan uniformon. Hazarde ni veturis kune. Apenaŭ mi estis en „Alianza” surmetinta puran tolaĵon, kiam Vacas telefonis al mi: „Kapitano, ankaŭ mia frato alvenis forpermeso; por la festa okazo ni buĉis kuniklon kaj ni ĝojos, se vi bonvolos portopreni la manĝon”.

Estas ja kompreneble, ke mi akceptis la inviton. Sur ia verando, ombrata de florantaj fruktarboj, staris pretigita manĝotablo. Nur la obtuzaj tondroj de l'kanonoj en malproksimo memorigis pri la milito. Ĉirkaŭ la granda plata plado, el kiu ni komune manĝis, sidis Vacas, liaj gepatroj, edzino, frato kaj tuta aro da malgrandaj gebuboj, evidente rigardantaj tiun ĉi manĝon tiom serioza afero, ke ili forgesis sian denaskiĝan

petolemon. Jen kaj jen oni metis kuleron meze en la pladon, anonce ke cirkulos la vino. Kiu kuraĝis manĝi plu, antaŭ ol oni forprenis la kuleron, al tiu oni donis frapeton sur la fingroj.

Subite, kiam la humoro estis plej festa, Vacas turnis sin al sia edzino kaj diris, indikante al mi: „Ĉu vi vidas, Maria, jen estas la kruela kapitano, kiu ne volis forpermesi min al vi por kvardek ok horoj!”

Ĉiuj rigardis min, pro kio mi kompreneble ruĝiĝis konfuzite. Embarasite mi diris: „Vi ja mem scias, ke vi meritis vian punon!” Kaj Vacas, ekstarante por ĉirkaŭpreni min, respondis: „Kion do vi pensas, kapitano, se mi ne scius, ke vi estas justa, mi ja certe ne invitus vin por kunmanĝi mian kuniklon!”

Iam, en novembro, kiam ni troviĝis ankoraŭ ĉe Carretera de Estremadura, mi ekkomprenis, ke ni nepre bezonas interligan tranĉeon inter la du domaroj, kiujn ni okupis. Tiu foslaboro estis farebla nur dum la malmultaj horoj inter sunsubiro kaj lunleviĝo. Sed kiam mi venis por ordoni la virojn antaŭe indikitajn, unu ĝuste purigis sian fusilon, alia revarmigis manĝrestaĵon aŭ sidis en ĉemizo, serĉante pedikojn; kaj certe forpasis pli ol dek minutoj, ĝis kiam mi sukcesis kolekti laborpretan grupon.

„Nu, ni iru”, ili diris finfine, „se la leŭtenanto tiom forte deziras tion . . . !”

„Ne pro tio, ke mi forte deziras tion, sed ĉar dependos de tio via propra vivo!”

Ili miris pri mia rapidemo; iliaopinie ĉio ja povos okazi same bone „mañana” (morgaŭ).

Mi ekscitiĝis kaj diris: „Vi kantas: ni volas morti aŭ venki, sed se oni demandas al vi, ĉu vi preferas morti aŭ labori, ĉu ankaŭ tiuokaze vi preferas morti?”

Pri tio ili ridis, sed kiam ili fine estis laborantaj, mi

nefacile sukcesis ĉesigi la laboron, kiam aperis la luno.

De tiam mi ekkomprenis, ke tio, kion mi tiutempe konsideris la tradicia „hispana maldiligento”, pli ĝuste rezultas el nekompreneo pri militista neceso. Kiom da metrocentoj da tranĉeo ni ja fosis en la lasta monato! Tamen mi estas konvinkita, ke la hispano ne faras idolon el la laboro; li rigardas ĝin kiel neceson, sed malgraŭe ĉiam preferas sian sieston en la suno. Sed fine miaj soldatoj neatendite mem petis laboron, kaj mi konstatis, ke ardas en ili sankta laboremo kvazaŭ religia oferfajro.

Hispanio estas lando de kamparanoj kaj eĉ tiuj soldatoj, kiuj loĝas jam dum pluraj jaroj en urbo, ĝenerale devenas origine el vilaĝoj. Sur la kampoj, kiujn trazigzagis niaj tranĉeoj maturiĝis *algarroba* (karoboj). Ofte mi vidis, ke niaj viroj deŝiras jam flaviĝantajn branĉetojn por atente pezi la malgrandajn silikvojn en siaj malmolaj manoj. Kelkfoje, kiam mi preteriris, oni transdonis al mi manplenon da silikvoj, dirante: „Gustumu ilin! Ili jam malmoliĝas. Antaŭ kiam forpasos unu semajno oni devos rikolti ilin, se ne, la silikvoj dehiskos!” Nia komisaro, komprenante, pri kio oni havas zorgon, diris al mi: „La viroj postulas, ke la rikolto neniukaze perdiĝu!”

Mi supozis, ke estas bona ideo promesi premion de cent pesetoj al tiu sekcio, kiu laboros plej bone, sed jam baldaŭ mi komprenis, ke tute neblas distingi unu sekcion de alia. Ĉiu laboris, sur kiu ajn loko, ĉiun momenton, kiam li estis libera. En longa vico da rikoltantoj ĉiuj trovis kvazaŭaŭtomate sian lokon, kvankam neniuj serĝento aŭ kaporalo bezonis komandi iun. Dumtage ili laboris en la valoj kaj aliaj ŝirmitaj lokoj, nokte sur la montetoj. Eĉ dum la sanktaj horoj de l'siesto ili daŭrigis la laboron, dum kiam la ŝvito flue gutadis sur iliaj senĉemizaj korpoj. Kun fanatika fervoro kelke da grupetoj nokte eĉ riskis rikolti en neniestereno antaŭ niaj linioj. Mi venis apenaŭ ĝustatempe por malhelpi, ke oni rikoltu la karobojn ankaŭ

antaŭ niaj mitralaj lokoj, al kiuj ili havigis konvenan, naturan ŝirmkaŝon.

Du el miaj soldatoj estis rikoltante vundataj kaj unu el miaj plej bravaj viroj morte estis trafata, sed la laboro daŭris plu. Sendube la malamiko ne komprenis, pri kia afero ni okupas nin, ĉar dum kelke da tagnoktoj la kantado ne ĉesis. Fine Fraigo Villarejo venis al mi kaj anoncis: „La rikolto estas finita”. Kaj unuspire li aldonis: „Kaj la kamaradoj opinias, ke estas preferinde donaci tiun centpesetan premion al la analfabeta lernejo por aĉeti librojn”.

Jes, la rikolto estis finita kaj ĉie sur la kampo kuŝis la flavaj stakoj. Mi estis vidinta, ke kontraŭ unu el tiuj stakoj Montesino falpuŝiĝas, kun la brakoj antaŭen etenditaj, dum kiam el malgranda vundo gutis la sango sur la karobojn, rikoltitajn de li. Dank' al Dio almenaŭ, ke pro pafo en la koro li estis tuj morta. Nia Montesino estis la plej silentema el la tuta kompanio, sed ankaŭ la plej forta, la plej brava kaj la plej fidela. Ĉar li ne devenis el Madrid, ni enterigis lin en la kampo mem, kie li estis batalinta kaj rikoltinta, kaj ĉe lia tombo mi voĉlegis la jenan poemon de Miguel Hernandez:

Kovras la kampojn en Hispanio
ostoj de brila generacio;
el viaj agoj fam' restas nure,
kvazaŭ river' ĝi fluas murmure.

Verŝu la sangon sur la kamparo,
brila hispana, vi, junularo;
kiel oliva suk' ĝi revenu,
kaj viaj ostoj kverkojn subtenu!

Sed junular' nepreta oferi,
sang' sen kuraĝo verŝon suferi
nomon honoran jam ne meritias,
brili ne povas, gloron eĉ spiras.

Kiu venkita vivon konscias,
tiu maljunas, mortagonias;
antaŭ naskiĝo premas lin aĝo;
por la pluvivo mankas kuraĝo.

Vi, junularo, gloron aliros,
ĉiam triumfos, venkon akiros;
se Hispanion premos minaco,
vi ĝin elsavos; venos jam paco.

La rikolto estis finita, sed la rikoltaĵo ne jam kolektita. Ĉe la horizonto, post Sierra, kolektiĝis plumbe grizaj nuboj, la stakoj sur la kampo pli kaj pli flaviĝis kaj la soldatoj diris: „Se nun ekpluvos, la silikvoj dehiskos kaj la tuta laboro estos vana!” Pli ol dekfoje ĉiutage mi telefonis al la komandantejo, sed ĉiufoje ricevis la saman respondon: „Ŝarĝveturiloj ne povas atingi tien, ĉarojn ni ne havas kaj la azenoj, kiujn oni promesis al ni, ankoraŭ ne venis”. Vane mi sendis dufoje nian komisaron al El Pardo. La mienoj de miaj soldatoj iĝis pli kaj pli malserenaj kaj, por plenigi la malfeliĉon, tiuvespere komencis faletadi subtilaĉa pluveto. Mi sidis en mia tendo, senpove malbenante la „azenojn” en El Pardo, kiuj ne volis sendi azenojn. Felipe atentigis min, ke venis delegitoj el la soldatoj por paroli kun mi. Kun sia malrapida voĉo maljuna Lopez diris al mi:

„Se la karoboj malsekiĝos kaj se tiam aperos la suno, la silikvoj dehiskos kaj la rikoltaĵo estos perdita. Sed se ĉiuj kune laboros, ni povos en unu nokto forporti ĝin en niaj litkovriloj

ĝis tie, kien venas la aŭtomobiloj. La soldatoj komisiis al mi demandi vin, ĉu vi aprobas tion”.

Mi portis gravan respondecon, ĉar la loko, kien venis la aŭtomobiloj, troviĝis pli ol unu kilometron post nia linio. Mi forsendis kelke da patroloj, per kiuj mi certiĝis, ke flanke de la malamiko regas kvieto. Se tiunokte la malamiko estus farinta atakon, ĝi trovus en la tranĉeo nur dek virojn; ĉiuj aliaj okupiĝis sur la kampo, po kvar trene forportante litkovri-lojn plenajn de karoboj. Sed la rikoltaĵo saviĝis.



el jefe de la 4ta compañía
Manuel Purificación
Jof Loit

Madrid, la 2an de majo, 1937a.

UNUA MAJTAGO ĈE LA FRONTO.

Hieraŭ ĉe la fronto kaj en la tranĉeoj ni festis la unuan majtagon. Mi povas eĉ diri, ke ĉe ni la festo komenciĝis treege frue: la duan horon nokte, kiam la luno kaŝiĝis post la nubojn.

Nia serĝento Vicco Barruecci naskiĝis en vilaĝeto en la provinco Jaen; jam dum jaroj li estas ano de l'komunista partio kaj apartenas al la plej bravaj. Preskaŭ ĉiunokte li patrolas en neniestereno, inter ni kaj la malamiko, pli ofte sola, ĉu por enterigi la viktimojn aŭ por serĉi forĵetitajn armilojn.

Tio estas tre danĝera tasko, ĉar tiu tereno estas tute senŝirma ebenaĵo, sur kiu la malamiko tenas direktitaj sep mitralojn. Sed preskaŭ ne pasas unu nokto, en kiu Vicco ne revenas kun kelke da fusiloj, ĵetgrenadoj aŭ rimenzono kun revolvero. Hieraŭnokte Vicco kaj mi eliris, ne por serĉi armilojn, sed por planti majstandardon kiom eble plej proksime de la malamikaj linioj. Perventre tien kaj rerampante, ni bezonis proksimume du horojn por vojo naŭcent metrojn longa, distancanta inter ni kaj la aliaj tranĉeoj. Amuzo tio ne estis, sed kiam tagiĝis, ni havis la plezuron vidi flirtanta la ruĝan standardon apenaŭ cent kvindek metrojn distance de la malamikoj, sur loko, de kie ili dum la tuta tago ne povis forpreni ĝin, ne venante en la pafadon de niaj maŝinpafiloj.

La kafo venis kiel ĉiumatene: sen lakto kaj preskaŭ sen sukero. Trempane nian malmolan panon en la surogatan kafon, ni refreŝigis memorojn pri la pasintjara unua majtago:

La madridanoj rememoras la plej grandiozan manifestacion, kiu iam okazis en Hispanio. „Ĝi estis la malvolviĝo de nia forto”, ili diris, „kaj precipe la volo por unuiĝo de l'tuta proletaro en ununuran popolan fronton, kiu instigis la faŝistojn komenci sian tro fruan ribelon”.

Niaj kamparanoj el Jaen tamen, jam tiam devis per postenoj ŝirmi sian feston kontraŭ atakoj de faŝistaj hordoj. La festo mem okazis ie sur montara herbejo, proksimume egaldistanca de tri, kvar vilaĝoj. Viroj, virinoj kaj infanoj ekskursis, kaj la kunportitajn manĝaĵojn oni dividis sur komuna tablo. En la mezo staris granda barelo da vino, el kiu ĉiu laŭplaĉe povis trinki. Kiom sonis la kantoj kaj kiom klakis la kastanjetoj akompanantaj la dancantajn parojn! Iliaj okuloj brilis ĉe la memoro, kaj *el viejo* (la maljunulo) kun sia reŭmatisme kurbiĝinta korpo eldiras, kion ĉiuj demandas al si: „Ĉu sekvontjare ni denove festos en nia vilaĝo la feston de l'unua majtago?”

Tiutage la malamiko kontentigis sin per kvazaŭ freneza pafado al nia flago, tamen ne trafante la stangon.

Nenio antaŭdiris atakon.

Antaŭ la deka ni duobligis la postenojn, kaj ĉiujn, kiuj ne gardestaris, ni revokis en la valon, proksimume kvincent metrojn post la tranĉeo, iom ŝirmitan kontraŭ la malamikaj kugloj. La fusilojn ni metis stake, dum kiam la dek-unuoj de la tria kaj kvina kompanioj pretigis sin por piedpilkado.

En malproksimo muĝegis kanonbruoj kaj la obtuzaj sonoj de eksplodantaj jetgrenadoj. Evidente oni batalis en la Universitata Urbo, sed ne ekzistis antaŭsigno, ke la batalo pluvastiĝos en la direkto al El Plantillo.

La kvina kompanio grandparte konsistanta el urbanoj, konstante gvidis la atakojn. Preskaŭ certe ĝi gajnis la konkurson, se oni ne devus tro frue ĉesigi ĝin. El la direkto al El Pardo surveturis la terenon tri per flagoj kaj ruĝaj tukoĵ ornamentaj ŝarĝaŭtomobiloj, kaj subite de sur la deklivoj kaj la tereno ĉiuj kuregis al ili renkonte: „Niaj edzinoj”. Sendube la ĝojkrioj kaj huraoj estis tiumomente aŭdeblaj ĝis malproksime en la malamikaj linioj.

Sed nia trumpetisto blovis akran signalon: „Kolektiĝu!”

kaj tri minutojn poste niaj kompanioj staris envice kolektitaj, ĉiuj soldatoj kun ŝtalaj kaskoj sur la kapoj, surmetitaj gasmaskoj kaj la fusiloj ĉe la piedoj.

Antaŭ kvar monatoj certe ĉiun, kiu intencus marŝigi niajn virojn ... el flanko dekstren ... laŭvice maldekstren! ... turnu vin! ... oni ridmokus kiel kontraŭrevoluciulon, insultus aŭ eble eĉ pafmortigus.

Antaŭ kvar monatoj ni estis nur pitoreska amaso da malbone armitaj, sendisciplinaj laboristaj knaboj. Dum tiuj kvar monatoj ni fariĝis armeo. Sed, ĉu niaj knaboj ŝanĝiĝis?

Ĉu ili pro tio estas malpli individualistaj, malpli anarĥiistaj en la koro ol antaŭe? Ne!

Sed la volo por la venko superregis en ili ĉiun alian konsideron; kaj post la batalo ĉe Guadalajara ni ĉiuj scias: la sola vojo al la venko estas la disciplino.

Dum du semajnoj ni severe ekzercis nin, ĉiun posttagmezon, kiun ni antaŭe destinis por la siesto, en la ofte brule varmega suno, kun la pezaj ŝtalaj kaskoj sur la kapoj: maldekstre — dekstre kaj dekstren turnu — ĝis kiam la ŝvito perlis sur la fruntoj. Knabojn ni ekzercis, kiuj kvazaŭ laŭnature havas pezan paŝmanieron pro irado post virbovoplugilo, pro kio estis preskaŭ neeble instrui ilin marŝi ritme.

Tio efektiviĝis kun senfina pacienco, sen insultoj aŭ riproĉoj, sed kun nur multege da agrabla bonhumoro, per kiu niaj milicianoj scias venki ĉiujn malfacilojn.

„Ankoraŭ unu fojon denove, knaboj, zorgu, ke en la unua majtago ĉio okazu perfekte! Ni faros paradon”.

Certe, ne ĉio estas jam senriproĉa; kelkfoje iu ankoraŭ turnas sin maldekstren ĉe la komando „elvice dekstren!” La fusiloj metiĝas surteren ne ĉiam kun unu samtempa frapo. Prusa leŭtenanto certe povus fari ankoraŭ multege da riproĉoj. Sed ĝenerale nia komandanto povas esti kontenta, kaj efektive kontentas, ĉar neniu alia armeo post nur duse-

majna instruado tiel imitus nin. Sed por kiuj ni faros paradon?

Ne troviĝas en nia mezo leŭtenant-kolonelo, nek generalo, nek delegito de l'registararo. Por siaj propraj edzinoj, por siaj fratinoj kaj siaj patrinoj paradas niaj knaboj.

Jen, sur la ŝarĝaŭtomobiloj ili staras: knabinoj, kiuj en la unuaj tagoj de Somosierra kun la fusilo sur la ŝultro batalis en la antaŭa linio kaj kiuj nun laboras en la oficejo de nia bataliono, en la lavejo aŭ en la kuirejo; infanoj ornamitaj per ruĝaj rubandoj, kiujn ili ankoraŭ ofte devos porti; virinoj kun sulkiĝintaj vizaĝoj, kies maljunaj labordifektitaj manoj pene brodis la oraĵon sur la ruĝan standardon, kiun ili prezentas al ni.

Kaj nun ili staras envice aranĝitaj por aŭskulti la alparolojn.

Parolas unu soldato, rememorigante al ni la kamaradojn mortigitajn en la tempo, kiam ni ne jam havis kanonojn, nek tankojn, sed nur apenaŭ fusilojn.

Kamarado el la fronto de Guadarama rakontas, kiel oni tie triumfis super la italoj. Iu maŝinskribistino alvokas nin, nome de l'junularo, al unueco. Maljuna virino parolas pri la vivado en Madrid: „Ĉiutage oni pafas al ni kaj tio estas eĉ pli terura ol kiam la aviadiloj bombardis nin. Alvenon de aviadiloj oni ja povas vidi kaj aŭdi. Se ni lasas la infanojn por kvin minutoj iri surstraten, ni ne certas, iam revidi ilin. Sed oni tamen ne subpremos nin tiom longe kiam vi staras ĉe la fronto. Antaŭe ni strikis la unuan majtagon por akiri pli altan salajron kaj malpli longan labortagon. Hodiaŭ ni deponis 10% de niaj salajroj en la kason de la partio, kaj en ĉiuj fabrikoj la laboristoj promesis produkti duoble tiom kiom alitage.

En ilia nomo ni venis por promesi al vi, ke ankaŭ la postgvar-dio faros sian devon ĝis la venko!”

Niaj viroj kantas la Internacion.

Oni petas al mi, ke mi parolu kelke da vortoj en la nomo de la laboristoj alilandaj.

Poste, ĉe longa kaj seninterrompa ĝojkriado, nia komandanto

surgrimpas la veturilon: „Post ĉio jam dirita mi ne bezonas diri multe. Sed komunisto ĉiam volas diri ion. Unu el niaj virinoj diris: Ni faros nian devon ĝis la venko! Ay, sed post la venko — ĉu vi supozas, ke tiam ĉio estos finita? Nur tiam venos la vera laboro; tiam ni devos ne nur rekonstrui kion oni detruis, sed tiam ni devos krei el la malriĉo bonstaton kaj propraforte konstrui novan mondon.

Nia tranĉeo estu samtempe lernejo; nia batalo samtempe batalo kontraŭ nescio kaj analfabeteco. Ĉu malfacile? Certe mi diru, ke tio estas malfacila! Jam estante dudek-unujara mi ne sciis legi, nek skribi. Sed diversajn aferojn mi lernis, kaj kion povas mi, tion ankaŭ vi povas. Tial ni promesu al ni reciproke en tiu ĉi unua majtago, venki ne nur la malamikon, sed ankaŭ la inerton kaj malprogresemon en niaj propraj vicoj. Ĉu vi konsentas, kamaradoj?”

Responde niaj soldatoj kantas la mem faritan kanton:

La komandanto en nia batalo, nia Manolo,
kies barbo flirtas en la vento,
aspektas kvazaŭ birdtimigilo,
sed tio efikas bone, ĉar, kien venas li,
de tie fuĝas la faŝistoj!

Poste oni distribuas la donacojn de „Ruĝa Helpo”: sepdek pantalonojn, tridek razilojn, okdek pecojn da sapo, cent parojn da ŝuoj, kvindek botelojn da konjako ...

La leŭtenantoj distribuas la mangaĵojn. La aŭtomobiloj pretiĝas por la foriro, la virinoj kantas, niaj viroj akompane kuras sur la kampo.

La trumpetisto prenas sian trumpeteton: ... kolektiĝu, revene al la tranĉeo!

Tiel la madrida proletaro festis la unuan majtagon!

ANSTATAŬITAJ.

En unu el miaj paroladoj antaŭ Radio-Madrid mi diris: „Ĉio fariĝas kutimo. La loĝantaro de tiu ĉi urbo kutimiĝis vivi kun heroo kuraĝo, kiel aliaj popoloj — bedaŭrinde — kutimiĝas perei kun malkuraĝo”.

La lastaj okazintaĵoj efektive firmigis en mi la konvinkon, ke ĝenerale kuraĝo ne estas denaskiĝa eco, sed pli ĝuste rezulto de certaj koincidantaj cirkonstancoj, aŭ eĉ de kutimoj.

Ekzistas ia blinda kuraĝo de tiuj, al kiuj mankas sufiĉe da fantazio por image prezenti al si la danĝeron, la kuraĝo de l'junularo, kiu estas tiom plenplena de vivoforto, ke ĝi nepre ne povas kredi pri sia propra morto.

Ekzistas la kuraĝo de l'taŭrobatalistoj, kiuj rekte iras en la morton, sed nur, sciante, ke la okuloj de la kamaradoj estas direktitaj al ili, sed kiuj, nokte starante solaj sur antaŭen lokita posteno, subite estas kaptitaj de paniko kaj timtremante revenas, kvankam en plejmalproksimo ne videblas malamiko.

Ekzistas la kuraĝo de l'intelektuloj, konsistanta en tio, ke sian internan, tra ĉio penetrantan angoron ili scias subpremi per sia konscia volo.

Ekzistas la kuraĝo de kutimiĝo, pro kiu la ministro iĝas indifera al la danĝera loko ĉe la fronto kaj pro kiu la soldato jam ne klinas sin malgraŭ la preterfajfantaj kugloj.

Ekzistas antaŭ ĉio grandega diferenco inter morala kaj fizika kuraĝoj; kaj ofte mi vidis, ke tiuj, kiuj en batalo montris sin plej bravaj, post la fronto infane timtremas pro riproĉo de superulo. Ofte montriĝis, ke ĝis tiam fidindaj revoluciuloj kapablas fari ĉian moralan krimon kaj perfidi malnovajn amikojn, pro timo, ke trafos ilin malfavoro de la altaj partiinstancoj.

Mi mem neniam apartenis al la aventuruloj, amantaj la

danĝeron pro la danĝero mem. Certe mi neniam evitis la danĝeron, kie mi konsideris ĝin la konsekvenco de mia tuta vivagado, sed jam kiel knabo mi forte malŝatis interbatadon same kiel maldikan glacieron.

La 20an de septembro Harry Domela kaj mi alvenis en Madrid; la postan vesperon naŭahore ni enviciĝis en la kvinan regimenton; kaj je la dek-unua horo ni eksciis, ke nia kompanio formariĝos tiunokte je la dua. En la senmebla ĉambro de iama monaĥejo iu afabla kaj multjara sampartiano, partopreninta la batalon de Schutzbund ¹⁾ en Wien, babile forpasigis la tempon. Mi memoras ankoraŭ, ke kaŝe mi malbenis lin, esperante, ke momenton li silentos por havigi al mi okazon por, koncentrigante la pensojn, venki la konstante plifortiĝantan en mi angoron.

Kiam ni (kelke da tagoj poste, ĉar dume venis kontraŭordono) efektive iris fronten, kaptis min timo pro la timo, timo, ke en batalo mi faros min ridiga en la okuloj de miaj kamaradoj. Fine jam aktive partoprenante la batalojn, mi tute perdis tiun senton pro la streĉeco kaj intereseco de la tuta situacio. Cetere, ankaŭ en mia junaĝo en momentoj de efektiva danĝero mia scivolo pri la finiĝo kaj mia intelekta agemo tiom superregis, ke nur horojn poste, en momentoj de plena trankvilo, naskiĝis en mi timo. Ĉi tie sur la batakkampo mi povas sincere diri, ke mi neniam spertis ĝin. Ĉe Getafé kaj Villaverde mi akiris la famon pri speciala heroeco, kvankam dum tiu unua batalo inspiris min pli ĝuste ia sento de ĉion superanta indigno, kaj dum la dua la devosento miksitita kun preskaŭa malespero. Ĉi tie en la tranĉeo oni nomas min nesingarda. Sed vero estas, ke plej ofte mi havas tiom multe da zorgoj en la kapo, ke en

1) Laborista korpuso de volontuloj fondita por defendi la laboristojn kontraŭ armitaj korpusoj de faŝistoj kaj duon-faŝistoj. Trad.

la danĝeraj lokoj mi forgesas klini min. Felipe ludas gardanĝelon. Li alportas mian ŝtalan kaskon, kiun mi mem en momentoj de danĝero kutimas forgesi; kaj patrolante li ne permesas al mi iri plu, antaŭ ol li mem ekzakte traesploris la proksiman centon da metroj. En la nokto de l'unua majtago mi metis kun Felipe kaj serĝento Vicco Barruecci flagon distance de malpli ol cent metroj antaŭ la malamika linio, sentante ĉe tio nenion krom ekscitiĝo kaj kontentiĝo.

Sed jen neatendite venis, nun en la tagmezo, la komandanto, akompanate de kelke da nekonataj oficiroj, en la tranĉeon kaj diris preterpase, kvazaŭ temis pri io sensignifa: „Ĉi nokte la kompanio preparu sin por esti anstataŭata”.

Ĉies nervoj estis ĝisekstreme streĉitaj. Vole nevole ni jam kontentiĝis pri la perspektivo, ke ĝis la fino de l'milito ni kuŝos ĉi tie en la koto. Pro tio la promeso, ke ni iros por dek tagoj al Madrid, ŝajnis tro bela, ol ke ĝi povus realiĝi. La unuan fojon en dek monatoj mi konstatis du okazojn de ebrieco en la tranĉeo. La duan horon venis efektive la *quintas* (mobilizitoj), por anstataŭi nin.

La unua, poste la dua kaj fine la tria sekcio transdonis siajn armilojn kaj formarŝis kun siaj oficiroj. Kun la nova komandanto mi laŭiris lastfoje la pozicion. Mi subskribis la protokolon kaj subite mi ekhavis ian senton de malpleneco, ĉar ne portante plu la respondecon de tiom multe da semajnoj.

„Nu”, mi diris al Felipe, „ni iru al la komandantejo, tie atendas nin la aliaj”. Ni ekiris sur vojon, kie mi kutime iris po du-, trifoje en tago; krom tio nun estis nokto kaj la malamiko tenis sin kvieta.

Elrampante la tranĉeon mi aŭdis proksime la fajfon de kuglo. Sammomente kaptis min preskaŭ panika angoro, kian mi ne spertis en ĉiuj ĵus pasintaj monatoj. „Ne nun”, trafulmis mian kapon, „ne nun, en ĉi tiu lasta kvincento da metroj, antaŭ ol mi iros forpermeso!” Nur Felipe iris ĉe mia flanko. Mi estas

certa, ke, se li ne kunestus, mi estus laŭirinta tiun vojon en unu longa, senĉese plirapidigita kurado. La sola faktoro, kiu tiumomente bremsis min, estis la deziro, ke la kamarado ne rimarku mian timegon. Kiam fine mi estis en la komandantejo, forpasis pluraj minutoj, ĝis kiam mi reĝis kapabla, trankvile kaj sinrege komandi.

Gajaj, sed lacaj kaj malsataj pro la marŝado ni alvenis en Madrid. Neniu rajtis iri hejmen antaŭ ol ni ĉiuj estis ŝanĝintaj tolaĵon, senpedikigitaj kaj vakcinitaj. Kvazaŭ en anesteziio ni rigardis la preterveturantajn tramojn kaj la trafikon en la stratoj. Mi demandis al mi, kie en ĉi tiu nekutima horo mi povos manĝi ion. Magro Vacas metis la brakon sur min dirante: „Iru kun mi, mi estas certa, ke mia edzino havas ion en provizo!” Mi ne volis konsenti, konvinkite, ke tian unuan horon lia edzino preferas esti sola kun li. Vacas tamen insistis, kaj mi sciis, ke hispanon oni facile ofendas, se en tia okazo oni malakceptas spontanee proponitan gastigon. En unu el la laboristaj stratoj de la urbocentro ni surgrimpis sentapiŝan ŝtuparon, kie ŝvebis malbonodoro de katoj. „Si estos senparole mirigita kaj ne scios regi sian ĝojon, vidante min”, flustris Vacas en la interkoridoreto.

Tirege li malfermis la pordon. „Jen ni estas!”

La efiko ne respondis lian esperon.

Lia edzino, kudrante ĉe la fenestro, klinis sin ankoraŭ pli malalte super sia fliklaboro. „Fine”, ŝi diris nur. Vacas kvazaŭknabe embarasiĝis pro ŝia neafableco. Li proponis al mi seĝon, samtempe komencante rakonti, por rompi la silenton.

„Mi imagis, ke vi ĝojos iom pli, revidante min, precipe tial ke la sorto apenaŭ ebligis al mi reveni! Kiam mi kondukis la novajn *quintas*, kiuj devis anstataŭi nin, al Las Rozas, la komandanto ordonis, por gajni tempon, iri laŭ la malsupra vojo laŭlonge de Playa. Ĉe Cuesta de la Reina la maŭroj

ekvidis nin. Komenciĝis maŝinpafado, poste venis ŝrapneloj. Ĉiufranken diskuris miaj viroj por ŝirmi sin. Kvazaŭ kokino inter siaj idoj mi devis kuri zigzage por rekolekti ilin. Iliahonore mi konfesu, ke neniu rifuĝis al Madrid. Sed estas kvazaŭ-mirakle, ke mi sukcesis konduki ilin en la arbaron, kun nur du vunditoj. La kugloj fajfis tra la branĉoj . . .”

Subite lia edzino salte ekstaris, kvazaŭ li estis batinta ŝin: „Kaj tion vi kuraĝas rakonti al mi! Pri tio vi fieras? Jen viaj heroaĵoj, via milito! Kaj ni sidas solaj tie ĉi, dum monatoj . . . sen letero, sen eĉ nur poŝtkarto . . . Kiom koncernas nin via milito, ni, virinoj deziras pacon!”

Kun malagrabla sento mi movis min sur la seĝo: „Ŝajnas al mi pli bone, Vacas, ke mi foriru”.

Li jam surmetis la ĉapon: „Ni iru kune!”

Antaŭ ol ni povis atingi la pordon, Maria forĵetis sian fliklaboron kaj, kun la brakoj ĉirkaŭpremante Vacas, retenis lin: „Vi pardonu min, *companero* kapitano! Mi ja scias tre bone, ke ĉio estas malsaĝo, kion mi diris . . . Ke ne ni deziris la militon . . . ke komencis la faŝistoj . . . ke la paco ne povas veni antaŭ ol ni estos venkintaj. Mi ja mem konsilis, ke li fariĝu soldato . . .” kaj al Vacas: „Mi bone scias, ke tio estas malnobla, kion mi diris, sed, vi ne iru for . . . daŭris tro longe, kaj mi preskaŭ freneziĝis, estante sola kaj . . . ĉio ja kaŭziĝis el tio, ke mi nedireble multe amas vin, knabo!”

Vacas karesis kaj kisis ŝin por ŝin trankviligi. Tuta lia kolero malaperis; fiere li rigardis min, dirante: „Jen do, tia ŝi estas, tia ŝi estas, se oni tuŝas ŝian koron! La kaŭzo de ĉio estas, ke ŝi jam estas trimonate . . .”

Maria minacis lin per la fingro: „Fi! ĉu decas al vi malkaŝi tion?!” Forviŝinte siajn larmojn ŝi kuris al la kuirejo. „Kaj nun vi rigardu ĉion, kion mi rezervis por vi ĝis via reveno. Jen, kaj jen, . . . ĉion mi konservis el la distribuajoj . . . kaj tiun ĉi fromaĝon, de onklo Angel, kiam li venis el la vilaĝo . . .”

En momento la tablo kovriĝis per la plej fantaziaj objektoj: rusaj konservaĵoj, marmelado, kuketoj, panoj kaj eĉ pladeto da margarino.

Ĉirkaŭpreme Vacas haltigis sian edzinon: „Maria, vi estas efektive admirinda!”

Ŝi klopodis eviti lin: „Atendu iom! Se mi povas esti certa, ke vi ne forkuros, mi tuj iros surstraten; al Juan kaj Pedro mi diru, ke vi revenis; samokaze mi aĉetos vinon kaj . . . (ĉi lastan kun misterŝajna mieno): „mi scias, kie ili estas ankoraŭ aĉetebblaj: *puros* (cigaroj)!”

Antaŭ forpaso de duona horo ŝajnis kvazaŭ la tuta loĝantaro de la strato kolektiĝis en la ĉambron de Vacas. La pli multaj kunportis ion ajn; kaj en la kuirejo kelke da virinoj helpis Maria, baki fiŝajkuketojn. Oni funkciigis la gramofonon, kiu komencis ludi „hijos del pueblo”, sed jam baldaŭ la bonhumoro postulis amerikan „fox-trot”.

Pedro, kun okuletoj kunpremiĝintaj pro la vino, frapis Vacas sur la ŝultron: „Vi nepre estu fiera pri via edzino”, li diris, „en nia tuta kvartalo ŝi kuraĝigas la homojn. Ankaŭ la koooperativa lavado por la bataliono rezultis el ŝia agado; kaj krome ŝi estas nia kvartala kasistino de „Ruĝa Helpo”.

Dume mi klopodis fari desegnaĵon pri Vacas, kiu konsentis, ke oni honoru lin kaj mem kun evidenta ĝuo fumis sian cigaron. Veninte el la kuirejo, Maria rigardis kritike trans mia ŝultro: „Ĝi sufiĉe similas”, ŝi diris, „sed vi desegnis lin tro bela. Tia *guapo* (bela knabo) li estis en sia junaĝo”.

Vacas protestis: „Nu, poste vi vidos, kiam mi estos razinta min, ke mi ankoraŭ estas la plej bela viro en la kvartalo!”

Pedro prenis mian brakon: „Fariĝas tempo, mi opinias, ke ni lasu ilin solaj; kaj dume ni ĉi malsupre en la *bodega* trinku ion je la venko!”

La venkon Vacas ne ĝisvivis. Tri tagojn post nia reveno de la forpermeso li trovis la morton ĉe la konkero de vinberejo . . .

Ankoraŭ alian okazaĵon mi spertis en tiuj ĉi tagoj. Okaze de semajnfina distro, gastante ĉe la dek-kvina Internacia Brigado, mi koniĝis kun juna kroata poeto. Ni revenis de festo de infanoj, kiu estis organizita en la vilaĝeto de la soldatoj de la bataliono Ĉapajef. La prema varmo de la tago restis kvazaŭ ŝvebanta sub la arbofoliaroj; kaj el la direkto de la vilaĝo aŭdiĝis la malforta muziko de harmoniko. Sendube tie dancis, ĉar la infanfestoj jam finiĝis, niaj soldatoj kun la vilaĝaj knabinoj.

La poeto rakontis al mi pri libro, kiun li estis verkanta: „La infano, kiun maltrafis la morto”.

Ni eksidis sur la bordon de rivereto kaj li rakontis al mi, kiel la ideon pri tiu libro inspiris al li la milito.

En la batalo apud Guadalajara eksplodo de peza aviadila bombo subite entombige kovris lin per disjetita sablo. La unuaj momentoj tute plenigis lin per angoro kaj la terura premsento de sufokiĝo. „Subite”, li diris, „forglitis kun la angoro ankaŭ la doloro. Kun preskaŭ fotografa klareco mi image vidis la vizaĝojn de miaj kamaradoj, de mia patrino kaj mia patro. Mi vidis nian vilaĝon, la vojon kondukantan al la lernejo, la maron apud Valencia kaj ĉe Madrid, tre malgranda kaj tre blanka, kvazaŭ rigardante ĝin el aviadilo. Eĉ en tiu ĉi momento mi prezentas al mi ĉion pli klara kaj pli reala ol la realo ĉirkaŭ ni. Ĉion superŝutis tre speciala lumo; ĉio havis intensan kaj tamen ankaŭ pacan aspekton, preskaŭ mi dirus: feliĉan, kiun mi post tiam jam nenie retrovis. Poste mi evidente senkonsciigis. Sed jen, kio por mi multege gravas: de tiu tago la vivo jam ne prezentas al mi seriozon; ĝi iĝis por mi, se vi povas kompreni tion, *gratuito*. Mi partoprenas la vivon, mi atakas, mi parolas, mi verkas, sed strangege estas, ke mi mem eĉ ne unu momenton kredas pri ĝi. Ĝi ne estas religio aŭ mistiko, sed nur la sento, kvazaŭ mi travivas ĉion en kino-teatro. Sed en kinoteatro kiaj estas la madridaj: elirinte ĝin oni staras en strato senluma. Tiu grenado suprenlevis min,

kaj neniam mi revenis sur la teron. La ĉion superreganta problemo por mi estas: ĉu infano, kiun maltrafis la morto, povas iam rekutimiĝi al la vivo? Kelkfoje min premas la sento, ke oni faris al mi grandan maljuston, kiam mi, cetere kun doloro kaj malpurigita, duafoje venis en la mondon ..”

Ne, kia li priskribis tiun senton, mi ne konas ĝin. Mi memoras du okazaĵojn en tiu ĉi milito, en kiuj mi konscie kredis mian vivon jam finiĝanta: iam ĉe Vallecas kaj antaŭ nelonge, kiam, tuj post mi en la tranĉeo, du viroj tute disŝiriĝis per grenado. Certe, post tio la vivo ankaŭ al mi ŝajnis *gratuito*, kvazaŭ donaco, pri kiu mi fakte ne havas ian rajton. Certe ĝi per tio perdis multon el la seriozo, kiun ĝi sendube havas por bona librotenisto aŭ stacidomestro, kies zorgo estas, ke ĉiu trajno ĝustatempe alvenu. La vivo komencis simili ludon; sed, ĉu ne, ankaŭ ludo prezentas krom libervola seriozo ian liberan gracion! Por mi la seriozo de l'vivo ĝustadire ne perdiĝis; pli eble ĝi ŝanĝiĝis; ŝajnas al mi, kvazaŭ mi eltrovis sub la ŝajnaj gravaĵoj de la vivo aliajn, pli realajn vivofundamentojn. Ŝajnas al mi, ke Stenko eble pro tio povis perdi la sencon de l'vivo, ke li estis ankoraŭ tro juna, ol ke li povus koni ĝin. Ĉu li eble apartenas al tiuj multaj, kiuj hezitas inter fantazioj kaj teorioj, ne konantaj la varman spiron de buŝo, nek la fortan korfrapadon en homa brusto? Ĉu la infano, kiun la morto maltrafis, eble retrovos la vivon en la momento, kiam ĝi, per la amo, fariĝos viro?

Mi vivas; mi vivas en tiuj ĉi tagoj per ĉiuj poroj de mia korpo; mi vivas, kvazaŭ neniam antaŭe mi vivis.

Seĝo ne estas nur seĝo, sed tre aparta donaco, tre, tre belega eltrovo de l'homaro. Dentpasto gustas ebrilige kvazaŭ ĉampano. Elverŝanta akvokrano rememorigas al mi la eternajn fontojn en la ĝardenoj de Semiramis. Nokte mi baraktas kontraŭ le

dormo por tiom pli bone ĝui la ĝuon de la malvarmetaj litotukoj kaj mian libron, sur kiun falas la varma lumo de leglampo. Post la fermitaj fenestroj mi aŭdas obtuzan eksplodon kaj poste tremetadon de la vitroj.

Rosita frapas sur mian pordon: „Ĉu vi volas eniri la kelon? Oni bombardas”. Mokride mi diras al ŝi: „Kion vi pensas! Ĉu mi eniru la kelon, kiam mi fine povas ree dormi en lito?” Tirinte la kovrilojn super mian kapon, mi sentas min agrable eksterdanĝera, kiel iam surmare, kiam mi estis anstataŭita surpostene kaj la ondoj superverŝantaj la ferdekon ne povis plu ĝeni min.

Mi vivas kaj mi pasie deziregas vivi, kvankam eĉ ne momenton timante la morton, ĉar mi konscias, ke pro la intenseco de tiuj ĉi tagoj la vivo havas valoron.

Malsuprenirante laŭ la imponstila spiralŝtuparo, mi aŭdas en la iama vintra ĝardeno de l' markizo konfuzebruon de voĉoj. Tio estas la teatra klubo de Alerta, kiu dufoje semajne kunvenas tien ĉi sub gvido de Maria Teresa. Unuafoje en Hispanio en la junulara movado kune ĉeestas knaboj kaj knabinoj en maturiĝanta aĝo, ne nur la diskutajn vesperojn, sed ankaŭ sportajn, gimnastikajn kaj militistajn ekzercojn.

En unu el la unuaj kunvenoj de la grupo, en kiu oni pri-traktis malgrandan dramon de Quevedo, la knabinoj unuanime rifuzis voĉlegi la vorton „brusto”. Unuflanke de la tablo sidis la knaboj, aliflanke la knabinoj. Ili estis „dekonduataj” knabinoj edukitaj laŭ la tradicio, laŭ kiu, post sunsubiro, al la *novio* estas permesite fari serenadon al sia *novia* almenaŭ postkrade. Neniu scivolis pri tio, kien la *novio*, post la serenado iras. La dekondata virino en Hispanio estis la plej ĉasta virino de l' mondo, sed nenie en la mondo oni disvendis tiom malĉaste ilustritajn pornografiaĵojn kiom en Hispanio. Ankoraŭ en la komencaj tagoj de l' interna milito okazis, ke la *novia* atendas malsupre,

dum kiam la *novio* en iu bordelo serĉis kontentiĝon por sia tro pasia volupto, eble eĉ kun la imago de l'malsupre atendanta *novia* antaŭokule. De tiam rapide progresis seksa revolucio, preskaŭ senekscese. La knabino fariĝis la vivkunulino de la knabo, sed jam ne lia ideala volupta revo.

En tiu ĉi rondo regas la sama natura kamaradeco, sen flir-tado, koketado aŭ kaŝridado, kiu ankoraŭ en 1932a karakterizis la junularon rusan. Malaperis la seksa obsedo kaj kun ĝi la unuflanka devigita miselkresko en sport-, rapideco-, danc- aŭ motociklo-maniulojn, en fruaĝe kadukan dogmulon, religian fanatikulon aŭ faŝiste sadistan torturiston, kiuj pli kaj pli fariĝas karakterizaj pri la junularo en kapitalismaj landoj. La liberigita interesiĝo ne bezonas la iaman distriĝon de unusola magneta altira forto; resaniĝinte, ĝi fariĝis, kun la avido de maturiĝanta forto, egalgrade malimuna al ĉiaj interesoj de l'fizika kaj spirita vivoj.

Pere de fotografiaj Maria Teresa klopodas klarigi al siaj geknaboj la belegan, sed iom ekspresionisman parisan enscenigon de „Numancia” de Cervantes:

„La plej realisma bildigo ne ĉiam estas ankaŭ la plej taŭga por komprenebliĝi al ni la profundajn signifon kaj sencon de iu dramo. En la epoko de „Numancia” la romianoj kompreneble ne portis nigrajn uniformojn kun faŝismaj emblemoj. Sed por ni gravas: el tio, kio okazis tiuepoke, ĉerpi instruojn por la tempo hodiaŭa. Kiel nun la trupoj el Etiopio venas tien ĉi, tiel ankaŭ tiutempe la romianoj sendis sian Scipio Africano. Kiel ili nun avidas niajn ercojn, tiel ili ankaŭ tiam deziris militakiri niajn stanminejojn. Kaj same kiel nun Madrid, tiutempe en Numancia krom viroj, ankaŭ virinoj kaj eĉ infanoj prenis la armilojn por defendi sian liberecon”.

„Kaj kiel ĝi finiĝis?” demandas unu el la knaboj, havanta, kiel kutime, pli da interesiĝo pri la enhavo ol pri la formo.

„Kiam evidentiĝis superpotenco de l'malamiko”, daŭrigas Maria Teresa, „viroj kaj virinoj decidis prefere mortigi sin reciproke kaj siajn infanojn ol vivaj fariĝi viktimoj de l'malamiko. De tiam la interpretoj diferencas. Laŭ la romia historio postrestis nur dek-kvarjara knabo, kiun Scipio povis post sia triumfĉaro forkonduki al Roma. Laŭ Cervantes ankaŭ tiu lasta knabo sin ĵetis el domo sur la lancojn de la romianoj”.

„Kaj ĉu tion ni ludos?” demandas unu el la knabinoj kun forte ruĝa koloro sur la vangoj.

„Ne, ne tion”, diras Maria Teresa pedagogie, „tion scias fari nur tre lertaj profesiaj aktoroj. Provizore ni ludu nur simplan, sed belan komedion de Quevedo”.

Klare rimarkeblas ĉe la gejunuloj apenaŭ subpremata indigno. Kial Maria Teresa supozas, ke ili ne povas ludi sian propran vivosencon?! Kaj tamen neniom da sopiro al la morto venas en la kapojn de ĉi tiuj gejunuloj; kaj ili eĉ ne povus kompreni la faŝistan penson de malespero, kia en „Die Kadetten”, laŭ kiu nur la morto por la patrio povas doni valoron al la vivo. Ili volas vivi, sed intuicie sentas, ke plena malvolviĝo de l'vivo estas ne senriske akirebla, ke oni akceptu la riskon de la morto, por ke la vivo ne perdu siajn signifon kaj sencon.

Knaboj en aĝ' ankoraŭ infanaj,
bravaj junuloj, filoj hispanaj:
„Viro mi iĝos, vokas min fronto;
al la danĝer' mi iros renkonte;
kaj se min antaŭ viraĝa forto
en la batalo trafos la morto,
do en la tombo viro mi estu,
kun la dezir', ke min nur postrestu
lumo de l'suno min ĝojiganta,
mia kuraĝ' en fratoj flamanta”.

(Miguel Hernandez).

Julio, 1937a.

ADIAŬO EL LA KVARA KOMPANIO.

Volonte mi diras, ke mi fieris pri mia kompanio tiumatene, kiam ĝi denove formarĝis al El Pardo. La naŭan horon ĉiuj devis anonci sin, kaj kiam je duono antaŭ la deka alvenis la ŝarĝaŭtomobiloj, la kompanio estis, escepte de du viroj, kompleta. (En oktobro, kiam nia bataliono devis formarĝi, la trumpetistoj iris sur la straton kaj trumpetis „enviciĝu” antaŭ ĉiu kafejeto. Se la naŭa matene estis la difinita tempo, oni jam kontentiĝis, se je la dek-unua vespere eblis formarĝi kun proksimume du trionoj de la bataliono. La ceteraj kvazaŭgute alfluis iom post iom. Tiu stato jam antaŭ longe pasis, sed ankoraŭ regas kutimo, ke post iom longa forpermeso po dudek ĝis tridek viroj en kompanio kun ĉiaj pretekstoj mankas.)

La scio, ke ĉiuj ĉeestas, plibonigas la atmosferon.

„He, Domingo, he, Nicasio, kie vi troviĝis?”

Regas ĝojego, kiel en la unuaj tagoj de l'milito; oni preskaŭ diras, ke la kompanio iras al ia festo. Sur la tuta vojo oni kantadas. Alterne inter „Internacio” kaj „La Ruĝa Standardo” la „kanton pri kapitano Last”, kiu tekstas jene:

Los Holandeses preguntan
donde se encuentra Jef Last
metido en una chabola
sin poder ni respirar.

Y los molinos de Holanda
giran, giran sin parar
preguntando con el viento
donde se encuentra Jef Last.

Y nosotros le decimos
gañando la guerra esta
en el frente de Las Rozas
que le han hecho capitán.

Hollandanoj jam tre miras,
kien nun Jef Last foriras;
en dometo li sin trovas,
kie spiri li ne povas.

(Tiun ĉi verson oni povas senfine ripeti, anstataŭigante la vorton *hollandanoj* per *angloj*, *francoj*, *germanoj* aŭ eĉ per *etiopianoj*).

La hollanda muelilo
mueladas sen similo;
al la ventoj ĝi demandas,
kie nun Jef Last komandas.

Kaj responde ni jam diras:
li por ni militakiras;
ĉe la fronto de Las Rozas
li nun kapitano estas.

Sur la aliaj ŝarĝveturiloj oni trinkas je mia sano, el boteloj da Malaga-vino, kunportitaj el Madrid. Felipe, trapaŝinte sin tra la aliaj, nun staras apud mi. Li serĉas kelke da paroloj por esprimi al mi sian sindonemon: „Kapitano, mia patrino donis al mi botelon da olivoleo; kiam ni estos en la tranĉeo, mi antaŭ ĉio purigos kaj lubrikos vian revolveron”.

Jes, mi estas fiera pri mia kompanio tiun ĉi matenon, fiera kaj feliĉa. Ĝi estas mia laboro; ĝi valoras al mi pli multe ol kiu ajn el la libroj, kiujn mi verkis. Ĝi estas ne nur inda mi-

litista unuo, ĝi estas komuno da amikoj, jam nun realigita ero de l'socialismo, por kiu mi ĝis nun vivis.

Harry Domela, kiu nun kiel topografo kaj gvidanto de la operacioj faras bonegan laboron en la stabo, atendas min por montri al ni nian novan pozicion. Kion li rakontas al mi, tio ne agordas min gaja. De kiam Manolo Fernandez promociiĝis de batalionestro al brigadestro, li neniel ŝanĝiĝis en favora senco. Pri liaj sindediĉo, kuraĝo kaj laborforto kompreneble ne ekzistas dubo. Li posedas rimarkindan psikologian komprenon kaj vastan, naturan taktike militistan talenton. Lia memoro similas kvazaŭ feran konservujon kaj ampleksas ĉiajn sciindaĵojn pri soldatoj, armiloj kaj municio, kiuj, bedaŭrinde, ne estas troveblaj en kiu ajn alia dokumento ĉe la brigada stabo. Ĉar super ĉio Manolo estas malfidema. Ne nur malfidema koncerne eventualan perfidon, kiu ĉie povas kaŝiĝi, sed ankaŭ pro sia grava sento de malplivaloro rezultinta el lia tre nesufiĉa kaj tute aŭtodidakta edukado. Volonte — la intendantoj ja povus ŝteli! — li mem maŝinskribus eĉ la listojn de ŝuoj; kaj efektive li kelkfoje okupas sin pri tio dum horoj, tre malrapide kaj palpe serĉante post unu klavo alian. Li ne povas toleri, ke tian maŝinon li ne scias manipuli. Sed kontraŭe, nenie en lia oficejo troviĝas iu militista aŭ teoria kompendio. Li komprenas, ke li bezonas intelektajn helpantojn, sed sentas al ili same multe da malfido, kiom da malestimo. Kie estis la intelektuloj en la tempo, kiam li mem devis plenigi siajn ŝetgrenadojn per dinamito? Ĉu ili ne scias jam tro multe pri la aferoj? Ĉu ili ne klopodas kaŝtrompe preterstrebi lin? Multrilate li memorigas min pri persono konata de mi, kiu same avidas tiri al si bonajn intelektajn fortojn, kaj same pretas tuj poste forpuŝi ilin, timante, ke ili forŝovos lin de lia loko. Tiel okazis al Diego kaj al la bofrato de Cavada; sama sorto nun minacas al Harry.

„Ne ekzistas plano”, plendas Harry, „en kiun li last-momente ne faras ian ŝanĝon. Preskaŭ ĉiufoje tio estas ia malbonigo, sed li volas montri, ke li ne povas akcepti ion senkonsidere”. Post la kapitulaco de Malaga, kaj precipe post la okazaĵoj en Barcelona, la malfidemo de Manolo kreskis en spirite malsana senco. Pri la partia gvidado li scias ne multe pli ol kiom li legis en kelkaj broŝuroj kaj en la lasta numero de „Mundo Obrero”, kaj ĝuste pro tio li nun vidas ĉie sabotistojn kaj perfidulojn.

De kiam en Madrid oni disflustris en la partio la babilon, ke mi estas trotzkiisto, la malfido de Manolo direktas sin precipe kontraŭ mi kaj kontraŭ Domela, ĉar tiu multe rilatas kun mi. Diego jam konsilis al mi, ke mi forlasu la tranĉeon neniam sen mia adjutanto, kaj nun ankaŭ Domela parolas pri minacoj, kiujn Manolo esprimis pri mi.

Post foriro de Harry mi restas ankoraŭ longtempe sidanta en la mallumo por pripensi. Fariĝis klare al mi, ke ankaŭ en la rifuzo forpermesi min al la kongreso de verkistoj io ne estas en ordo. Ĉiam premas la malbenita suspekto pri trotzkiismo. Kaj malgraŭ ĉio mi opinias, ke en Barcelona la trotzkiismo, almenaŭ de oktobro, progresis sur erara vojo. Ĝi volis daŭrigi la revolucion direktan, post kiam (pro kies ajn kulpo) por tio jam antaŭ longe estis malaperinta ĉiu reala eblo. Esence mi samopinias kun niaj viroj, kiam ili diras: „Eble oni provokis ĝin; sed ne decas permesi provokadon ĝis tia grado!”

Manolo efektive konas la homojn, sed min li tamen ne konas sufiĉe. Kvankam pri Sovetio mi parolis neniam alie krom bone, li sentas instinkte, ke mia entuziasmo estas nur malforta. Kaj tamen, se li konjektas, ke mi iam aludas pri tio inter miaj soldatoj, li nepre eraras. Post mia vizito en 1936a kaj post la procesoj mi komprenas, ke de tiu flanko ni ne povos plu esperi ion por la socialismo. Sed mi scias ankaŭ, kion Rusio signifas por niaj soldatoj ĉi tie ĉe la fronto. La tiel nomitaj demokratioj

perfidis la hispanan demokration. La „Dua Internacio” okupas sin pri filantropio, sendante varmajn subvestojn kaj aranĝante hospitalojn. Eĉ ne por unutaga striko la gvidantoj de l’internacia sindikataro trovis la kuraĝon. En la senespera forlasiteco restas nur du lumpunktoj: Meksiko kaj Rusio. Meksiko povas sendi fusilojn, sed ne tankojn, nek kanonojn. Rusio helpis efektive. Ĉu tiu helpo venis ĝustatempe, ĉu ĝi efikis sufiĉamezure kaj ĉu koncerne kuraĝecon ĝi estas komparebla kun la helpo de la faŝistaj landoj al Franco, estas aliaj demandoj. Provizore Rusio estas nia sola espero, nia sola helpanto. Sen Rusio ni estus jam antaŭ longe pereintaj. Kiu, meze en la batalo, atakas sian solan helpanton, embuske perfidas la proprajn trupojn. Se Manolo rigardus nur iomete pli profunde en mian koron, li eksciis, ke mi deziras nenion krom, ne politikumante, plubatali kun tiu ĉi, mia propra kompanio, ĝis la morto aŭ ĝis la venko.

La ordonon konkeri la vinberejon troviĝantan en neniestereno niaj trupoj aplaudis kun ĝenerala aprobo. Jam longe ĝenis ilian bonhumoron la fakto, ke la vinberoj, kiuj jam videbliĝis kiel malgrandaj grapoloj, ĉi aŭtune eble velkos aŭ fariĝos akiraĵo de la faŝistoj. Krom tio multan danĝeron ne kaŭzos tiu operacio. La afero konsistis en tio, ke ni rapide kaj neatendite okupu la proksiman montetan kreston kaj enfosu nin antaŭ tagiĝo. Entute ĝi kostis al ni unu mortigiton kaj unu vunditon, do ne pli ol ni povus esti perdintaj en ordinara tago. La kompanio esperatendis rekompencan. Sed anstataŭe venis reorganizo, kiu en unu semajno disrompis la fundamentojn de la tuta trupo. Ĉiujn miajn ses serĝentojn anstataŭis aliaj, kaj mi perdis miajn plej fidindajn soldatojn al aliaj kompanioj.

Kiam mi plendis pri tio, oni pretekstis, ke tiuj ĉi soldatoj devas kontribui al plialtigo de l’disciplino en la kompanioj

nove formitaj el mobilizitoj. Tio eble veras koncerne homon kun la spertoj de Vicco Barruecci, sed kial do, pro Dio, ekzemple la *chiquetillos*? Francisco Fraijo elparolas, kion pensas la pli multaj: „Manolo koleras al vi kaj volas izoli vin”.

Krom tio kelkaj el la novuloj, kiujn mi ricevis, estas evidentaj kanajloj. La netaŭgulon Machado mi devis jam la unuan tagon arestigi pro ebrieco. En la tendo de Lopez oni forŝtelis ties paperujon, kaj malgraŭ la plej severa esploro ni ne sukcesis trovi la monon, kiun ĝi enhavis. Nun devas foriri eĉ Faustino kaj Felipe, kiujn mi rekomendis por la oficirkurso.

En kaprico de ĉagreniĝo mi petas translokigon al alia brigado. La efekto estas miriga. Ankoraŭ samnokte mi ricevas ordonon veni en la komandantejon, kie oni informas min, ke mia translokigo estas jam decidita. Laŭ nova ministeria dekreto ĉiuj eksterlandanoj enviciĝu en la Internacian Brigadon. „Mi petas, don José, jen via pasporto por Albacete”.

Apenaŭ restas al mi tempo por preni miajn pakaĵojn el la tranĉeo kaj rapide adiaŭi kelkajn kamaradojn. La lasta vorto de Manolo malkaŝas al mi la motivon: tie oni povas pli bone kontroli vin. Poste mi prezentas min ĉe la divizia stabo en El Pardo, kie oni akceptas min plej afable. Cavada, kiu dume fariĝis kolonelo, bedaŭras mian foriron; propramane li preparas por mi rekomendan leteron kaj ian ateston, ke li estas tre kontenta kaj pri mia kuraĝo, kaj pri mia takto de kapitano. Staba aŭtomobilo transportas min al Madrid.

Antaŭ ol anonci min al la stabo de l'Internacia Brigado mi preterpase vizitas „Alianza” por preni kelkajn aferojn. En mia ĉambro kuŝas letero de Maria Teresa, kun la informo, ke oni konsentis pri mia forpermeso al la kongreso de verkistoj, kaj ke mi povas ricevi pasporton ĉe Miaja. Tiu letero datiĝis antaŭ tri tagoj; la informon do evidente retenis Manolo. Mi demandas al mi: laŭ kies ordono?

VERKISTOJ KONTRAŬ LA FAŜISMO.

Ĉar la aŭtomobilo kun la aliaj verkistoj-oficiroj (Renn, Bodo Uhse, Kantoroviĉ, Bates) jam forveturis antaŭ kelke da tagoj, mi decidis iri per la aŭtobus-trajna linio preter Tembleque kaj Albacete. Nenio impresas pli malgaje ol turista aŭtobuso plena de forsenditoj. Malgajigas la prozorge malgrasiĝintaj vizaĝoj de l'virinoj, iliaj mizeraj pakaĵoj, la pro laco kaj malsato grimace plorantaj etuloj kaj la stoika silentemo de la pli aĝaj fratetoj. Tio klarigas, kial tre multaj preferas resti en Madrid, malgraŭ la bombardadoj, ol fari tiun ĉi vojaĝon en nekonatan regionon, sen ia certo, ĉu morgaŭ eble ankaŭ ilia rifuĝejo ne estos bombardata.

La trajno, kiu en Tembleque malfruis jam tri horojn, prokrastiĝis ĉiustacie. Ĝi bezonis proksimume dudek sep horojn por apenaŭ kvarcent kilometroj, kiuj distancis inter ni kaj Valencia. Tre rimarkindis la bonega stato, en kiu troviĝis la materialo. Eĉ ne unu fenestro mankis en la pordetoj, nek leda kuseno sur la benkoj; eĉ ne videbliĝis nomo pormemore gratita sur la vandoj. Senŝanĝe tiuj ĉi veturiloj povus morgaŭ funkcii en la internacia turista trafiko.

Al la trajno apartenis eĉ restoracia vagono, en kiu bedaŭrinde estis aĉetebla nenio krom nematuraj fruktoj, Malaga-vino kaj kafo sen lakto kaj sen sukero.

En la trajno mi sidis en kupeo kun kelke da junaj, tre simpataj hispanaj oficiroj partoprenintaj ĝis la maldolĉa fino la batalon apud Malaga.

„Se tie efektive oni preparis perfidon”, diris unu el ili, „tamen certe ne la soldatoj. Ili persistis ĝis la lasta momento. Sed ni apenaŭ havis maŝinpafilojn . . .”

„Kaj neniom da kanonoj” aldonis alia.

„Nek tankojn”, diris tria, „kaj la italoj venis en kolonoj komplete ekipitaj per motorarmiloj . . .”

Ĉiuj silentis. Post kelke da momentoj daŭrigis la leŭtenanto:

„Kiam ĉio estis perdita, ni faris seninterrompan marŝadon sepdek-okhoran tra la montoj. La kamparanojn ni neniom povis fidi, ĉar multaj estis kolere incititaj per la deviga kolektivismo de la anarĥiistoj en tiu provinco. Seninterrompa fluado de centmiloj da rifuĝantoj penis atingi Almeria. Ĉar la ponto apud Motril estis detruita, niaj soldatoj staris dum horoj en la akvo por helpi la virinojn kaj infanojn transi la riveron . . . Tie mi vidis, ke laboristoj pro malespero per revolvero mortigis siajn proprajn edzinojn kaj infanojn . . .”

Mi memoras la danteskajn rakontojn de doktoro Bethume (Canadian Blood Transfusion) pri tiu ĉi rifuĝado, la plej tragika plebiscito iam deklarinta sin kontraŭ Franco. „El la aero oni bombardis la homojn, el inter la montoj pafis al ili la artilerio kaj el la maro la krozoŝipoj de l'neintervencio. Sur la tuta vojo pli ol ducent kilometrojn longa ne troviĝis veturilo, nek akvo, nek nutraĵoj . . .”

„Ĉu estis multe da kaptitoj?” mi demandas.

„Miloj”, diras la leŭtenanto.

„Kion oni faris al ili?”

La *alvarez* klinas sin al mi: „Aŭskultu!”

Kiam ni en tiu ĉi monato troviĝis apud Jarama, atingis nin iunokte tri forkurintoj, viroj el Malaga. Ili rakontis, ke oni starigis la kaptitajn batalionojn en vicojn po unu viro. Ĉiun kvinan viron oni ordonis elpaŝi por pafmortigo.

„Tio estis la plej terura”, ili diris, „stari tiel, devante ne rigardi dekstren aŭ maldekstren kaj ne sciante, ĉu oni estas numero dua, tria aŭ kvina. Kaj tiu numerado daŭris horojn . . .”

Vidinte la pafmortigadon al kvinono de iliaj kamaradoj, ili estis metataj antaŭ la alternativon: „ĉu ankaŭ esti mortigataj aŭ kunbatali en la fremdula legio flanke de Franco”.

La pli multaj elektis la lastan, dume pensante: jam estante ĉe la fronto mi ja forkuros.

Kaj jen venis do tiuj ĉi du, kiuj diris, ke proksiman vesperon verŝajne venos ankoraŭ multe pli multaj.

Sed neniu venis tiuvespere, nek sekvontvespere, kaj forpasis pli ol tuta semajno, ĝis kiam ree venis dek unu forkurintoj.

Ni demandis al ili, pro kio venis ne pli multaj kaj kial ili venis ne pli frue. Jen ilia respondo:

„En la mateno, post kiam forkuris la tri unuaj, la oficiroj pafe mortigis ĉiujn soldatojn tiunokte postenintajn, dirante: „Se forkuros ankoraŭ pli multaj, neniu malagano en tiu ĉi bataliono restos vivanta”.

Pro tio ni hezitis; sed hieraŭvespere aŭskultante vian laŭt-parolilon kaj eksciante, ke ankaŭ tie ĉi estas malaganoj, ni ne povis reteni nin pli longe kaj forkuris, kvankam sciante, ke tio signifas por niaj kamaradoj mortigon”.

En la bombe difektita salono de l'komunumestraro de Valencia, kie ministeria prezidanto Negrin malfermas la kunsidon por tuj poste transdoni la prezidantecon al maljuna Andersen-Nexö, staras orlitere sur marmoro honora listo de niaj mortintoj: Garcia Lorca, Valle Inclan, Ralph Fox, generalo Luc-kasz . . .

En la hospitalo kuŝas grave vunditaj niaj kamaradoj Prados kaj Regler. Multaj el la ĉeestantoj (Malraux, Renn, Bates, Uhse, Kantoroviĉ, Alberti, Paraguas, Duran) estas front-soldatoj. Cordoba Uturburi vojaĝis defront' alfronte por kuraĝigi la soldatojn.

Josephine Herbst kaj John dos Passos vizitis meze de l'milito minacatan Madrid, Koestler estis kaptita en Malaga.

Kaj nun, kvankam ĉi matene la alarmmuĝiloj ankoraŭ anoncis elaeran bombardadon, ĉeestas: d-ro Brouwer, Jean Richard Bloch, Leon Felipe, Champson, Ehrenburg, Kisch, Nordahl Grieg, Anna Seghers, Huidobro . . . verkistoj el Hispanio, Ĉinio, Ĉilo, Islando, Francio, Germanio, Anglio, Nederlando.

Kaj funde mi vidas, apud la rigida mieno de Marchwitza, la ĉiam ridantajn vizaĝojn de Karl Bredel kaj Erich Weinert, kiuj venis por post la kongreso enviciĝi en la internaciajn brigadojn.

Vidante tian ĉi liston de nomoj oni komprenas, ke neniu burĝa ĵurnalisto mencias en sia ĵurnalo ĉi tiun kongreson. Ho, se ili povus mencii, ke nur unu scienciston kia Hodan, nur unu humaniston kia Bergamin, staras ĉe la flanko de Franco, kiom brue ili krius!

Sed tiuflanke oni ja malprudente pafmortigis eĉ sentoplanan homon kia Garcia Lorca. Tiuflanke oni jam streĉas la revolveron, aŭdante la vorton „kulturo”. Literaturo ne kreeblas per mensogoj, kaj kiu faŝista verkisto kuraĝas skribi la veron pri la kaptitoj de Malaga aŭ pri la libervolemo de l'italiaj trupoj? Ne estas hazardo, ke la kongreso de verkistoj por defendo de l'kulturo ĉi jare okazos en Madrid! Kaj ne estas hazardo ankaŭ, ke ĝuste Feuchtwanger ankoraŭ lastmomente sciis trovi dubindan pretekston por rompi sian promeson, tiu Flavius Josephus en servo de cezaro Tiberias skribinta sian apologion de l'procesoj en Moskva kaj sian „Mi akuzas” kontraŭ André Gide. Ne senmotive eĉ Kisch eldiris al mi la maldolĉajn vortojn: „Per tiu moderna Felix Dahn oni verdire ne devus pravigi sin kontraŭ la majstro!”

Tamen, antaŭ ol pritrakti la kongreson mem, ni tuj tuŝu malagrablan demandon:

La verkistoj ĉi tie ĉeestantaj estas ĉiuj senescepte kuraĝaj homoj. Ilin naŭzas la hipokritado distinganta inter paroloj kaj faroj; ili forlasis siajn netuŝeblajn poziciojn por, se necese riskante la propran vivon, defendi la kulturon. La faŝismo ne povas fieri pri tia listo de nomoj.

Kaj tamen ...

Estas bone, ke la kongreso akuzis la mortigon de Mühsam

kaj la malliberigon de Ossietzky kaj defendis la multajn bonajn verkistojn elpuŝitajn el la faŝistaj landoj. Sed kial oni eĉ ne menciis la nomojn de Ottwald, Günther, Tarasov, Rodianov, Rom, Mandelstam, Tretjakov, Bezumienski, Jassiensky, Gromski, Kljujef?

Kio kaŭzis tiun silenton pri la kultura reakcio en Rusio, pri kiu ĉiuj ĉe persona renkonto ja konsentas?

Ĉu efektive estas decidiga la argumento de Kisch, kiam ni en Madrid eksciis, ke denove oni bombardis lernejon:

„Aŭdante ion tian kaj konsciante, kiuj estas niaj malamikoj, oni reakiras kuraĝon kaj deziron por defendi ĉion, kion faras niaj partianoj, eĉ la procesojn!“?

Oni povus kontraŭdiri, ke ĉi tie ne temas pri la situacioj en Rusio, sed pri la defendo de Hispanio, kaj ke ĉio, kio povus malutili al tiu defendo, estu flankelasata. Tio estis la starpunkto de Bergamin. Tiuokaze oni tamen komencu konstati, ke jam en Valencia la rusa delegacio (al kiu denove apartenis la malbonaŭgurulo Bola) incitis eĉ la hispanojn per sia nepre ekstertema akre politika atako al la trotzkiistoj. Kaj de tiu momento la klara ĉion alian superanta celo de l'delegacio estis enkonduko de iu ajn malaproba deziresprimo kontraŭ Gide. Estas facile kompreneble, ke pro tio mi fariĝis la centro de l'intrigoj. El ĉiuj flankoj, escepte de hispana, oni puŝe, skue kaj taŭze atakis min. En tiuj cirkonstancoj mi povis tamen malfacile esprimi mian sinceran opinion, kiel mi jam esprimis ĝin en artikolo por „De Kroniek voor Kunst en Cultuur“, en kiu ĝi, kvankam sen mia deziro, tamen favore al mi, ne aperis.

Anstataŭe mi faris paroladon por homo prudenta sufiĉe klaran, kiu pro tio ne aperis en la kongresraporto en „Das Wort“, kaj aperis nur kriplice fuŝita en „Commune“. Nur en „La Hora de España“, numero 8a, troviĝas la plena teksto.

Poste la rusoj klopodis persvadi la argentinan delegacion, ke ĝi proponu la deziresprimon.

Kun helpo de du tre eminentaj francaj verkistoj mi kontraŭis tion, simple argumentante, ke tiutempe la verkoj de Gide ne jam estis tradukitaj en la hispana lingvo kaj do nenie en Madrid estis aĉeteblaj. Ŝajnis al mi malsaĝe postuli, ke la kongreso juĝu pri verkoj, kies enhavon ne konas la pli multaj kongresanoj.

Ankaŭ la kongresestraro komprenis tion, kaj la rusoj devis kontentiĝi per persona klarigo de Bergamin, kiun oni ne pridiskutis.

Ĉu mi ĉi loke akcente ripetu, ke mia defendo de l'morale kuraĝa kaj objektive necesa kritiko de Gide per si mem ne signifas, ke mi ĉiurilate konsentas pri lia verko? Ŝajnas al mi, ke nur tiuj, kiuj kutimiĝis al senfina unuopinieco en ĉiu kongreso, povas kredi tion. Kiel ajn estas, ne malutilas denove akcenti, ke mi opinias la tiutempan publikigon de „Retour de l'U.S.S.R.” nefavora. „Het Volksdagblad”¹⁾, publikigante mian respondon, prisilentis tion, same kiel mian kritikon pri la organizo de l'vojaĝo, (kiu estis ne tre agrabla por Koltzov). Same ankaŭ la fakton, ke mi letere kaj telegrame klopodis malhelpi aŭ almenaŭ prokrasti tiun verkon, kaj ke ĝia enhavo, miaopinie, kriplas pro tre danĝera unuflankeco. Kiu ignoras la pozitivajn rezultatojn de l'rusa revolucio, kiujn eĉ Stalin jam neniam povos tute malkonstrui, aŭ klopodas prezenti ilin malpli valoraj, tiu per tio kun la malbonherbo la grenon eltiras kaj provokas la danĝeron vekti en la laborista klaso la tendencon de sinjorino Angot: „Ça ne valait pas la peine vraiment, de changer de gouvernement”²⁾.

Unu el tiuj rezultatoj estas, ke unufoje en la historio en tuta

1) Nederlanda komunista gazeto. Trad.

2) Tio vere ne valoras la penon ŝanĝi registaron. Trad.

popolo ĝis en ĝiaj plej malaltaj tavoloj, vekigis interesiĝo pri arto kaj literaturo. Malofte mi sentis tion tiom forte, kiom okaze de l'kongreso de sovetaj verkistoj en Moskva (1934a), kie la alparoloj de kolĥozaninoj, ruĝarmeaj soldatoj, laboristoj de l'subtera fervojo kaj reprezentantoj de l'junulara movado, el humanisma vidpunkto, estis ofte preskaŭ tiom gravaj kiom la ekzakte ellaboritaj, profunde revoluciaj referatoj de Bucharin kaj Radek. Al tiu kongreso la burĝa gazetaro dediĉis malpli da atento ol al kiu ajn festeno de l'P.E.N.-klubo, kie sinjorino Ammers Küller en sensignifa ĉemanĝa parolo alte tenas la honoron de la nederlanda beletristiko.

Kaj tamen okazis tie kongreso, kie unuafoje verkistoj kaj legantaro interrenkontis kun preskaŭ pasia interesiĝo.

Kio tiutempe okazis en Rusio, nunmomente ripetigās en Hispanio. Ankaŭ ĉi tie montriĝas la sama subita legavido, kiu kaŭzis, ke nuntempe la vendado de jam uzitaj libroj estas en Madrid unu el la plej profitigaj stratnegocoj. Ankaŭ ĉi tie fondiĝas libropruntejoj en ĉiu urbo, en ĉiu vilaĝo, kie troviĝas garnizono, en ĉiu tranĉeo. Ankaŭ ĉi tie la interesiĝo pri la kongreso provizore en la gazetaro eĉ malgrandigas la interesiĝon pri la militoperacioj ĉe la frontoj. Ankaŭ ĉi tie la verkistoj ne estas „inter si”, sed partoprenas la diskutojn laboristinoj el la industrioj, junuloj el Alerta, universitataj studentoj kaj frontsoldatoj. Soldatoj montris al ni standardojn konkeritajn en Brunette, kune kun rabitaj virinaj ornamaĵoj, kiujn oni trovis ĉe faŝista oficiro. La esprimo de ilia gvidanto: „Per ĉi tiuj bajonetoj ni verkas historion”, ne estis sensenca frazo.

La kongreso de verkistoj estis, ankaŭ tehniko, la plej bone organizita, kiun mi iam partoprenis. Stabo da junaj, entuziasmaj artistoj faris tie admirindaĵojn, kies plenan signifon povas kompreni nur tiuj, kiuj en tempo de milito vivis en Hispanio. La sindikato de kelneroj kaj la komunumestraro de Madrid

konsideris kiel honoron aranĝi la kongreson tiel, ke neniu el la alilandaj partoprenantoj rimarku la diferencon inter la vivnormoj de Paris kaj Madrid. La tradukoj estis nesupereble korektaj; kaj kiam mi esprimis mian miron pri tio, ke jam sekvintmatene la faritaj referatoj estas, en kvar lingvoj ciklostilitaj, je nia dispono, unu el la junaj studentoj de l'oficejo diris nur: „Pro tio, ke ni plulaboris dum la tuta nokto!” Sed ankaŭ alirilate niaj gastigantoj sciis, meze inter la bombardadoj, krei sferon de vera kulturo. Pro tio moderiĝis la iom reklamaspekta aranĝo de la rusaj kongresoj en guston dumjarcente fiksitajn. Ĉe tio mi memoras ekzemple pri la ĝis ekstremo detale prizorgita salonornamo per preskaŭ nenio alia krom floroj. Kaj certe neniu el ni iam forgesos la belegan, belstile lirikan prezentadon de Maria Pineda de Garcia Lorca, nek la koncerton, en kiu junaj komponistoj direktis sian propran verkon, nek la rimarkinde maloftan prezentadon de la frontmarioneta teatro en „Alianza”. Efektive, ne nur la *alegria*, sed ankaŭ la *dignidad no nos quita nunca*. (La digno neniam forlasos nin).

Parolado farita en la internacia kongreso de verkistoj, por defendi la kulturon kontraŭ milito kaj faŝismo en Madrid.

Kamaradoj.

Iam estis tempo, en kiu mi, laŭ facila esprimo, intelektu malamis la faŝismon. Ĉio, kion mi sciis pri ĝiaj doktrino kaj agoj, ĉio, kion mi legis pri ĝi en libroj aŭ aŭdis de kamaradoj, ŝajnis al mi ne nur abomeninda, sed eĉ la kontraŭo mem de niaj ideoj kulturo kaj vivo. Prefere morti ol esti devigita vivi sub tia reĝimo, prefere forlasi edzinon kaj infanojn por batali en Hispanio ol senage rigardi kiel la animo kaj spirito de miaj infanoj veneniĝas, se en Eŭropo triumfus la faŝismo.

Tiu malamo, kamaradoj, estante la malamo de artisto kontraŭ la malbela, la malamo de intelektulo kontraŭ malsaĝo kaj mensogo, la malamo de homo kontraŭ bestiala kruelo, tiu malamo estis do jam tre forta; sed mi konfesu, ke nun, post naŭmonata batalado en Hispanio, ĝi plene ŝanĝis karakteron.

Ĝi ne estas plu intelekta, ĝi eniĝis en mian sangon, ĝi iĝis integra parto de mia animo, same kiel ĝi funde radikis en la koroj de tiuj noblaj kamaradoj, kun kiuj mi havis la feliĉon batali flankon ĉe flanko en la sama tranĉeo.

Estas unu aspekto aŭskulti kion rakontas aliaj, legi ĵurnalojn kaj rigardi fotografaĵojn; sed alia aspekto estas propramane tuŝi la korpon de virino, kiun oni admiris, elfosi disŝiritajn pecojn kripligitajn de infanoj, kiuj iam ludis ĉe onia flanko aŭ retrovi ruinigita la mizeran domon, kie oni iam gastis.

La ĉion ampleksanta milito furiozanta kontraŭ ni, superas en krueleco, malrespekto kaj malkuraĝeco ne nur ĉion, kion la mondo iam vidis; ĝi same superas la plej perversan kaj plej kruelan imagon. Post ĉio, kion ni rigardis, Octave Mirbeau kaj Edgar A. Poe ŝajnas al ni aŭtoroj kun nur mezgrada fantazio. Proverbo mialanda diras, ke al ĉio oni povas kutimiĝi, eĉ al pendado. Certe estas, ke la hispana popolo, speciale la madrida, kutimiĝis al vivado en heroeco, kiel aliaj popoloj, bedaŭrinde, pli kaj pli kutimiĝas al vivado en malkuraĝeco. Via veno tien ĉi estis ago simbola, pruvo pri kuraĝo, kredkonfeso pri nia venko, interligo kun la proletaro armita. Ŝajnas al mi, tamen, ke tiu ĉi veno estas signifoplena ankaŭ el alia vidpunkto.

Se nia batalo estus nur batalo *kontraŭ* io, se ĝi ne estus samtempe, kia komprenas ĝin niaj soldatoj, batalo por akiri konstante pli da amo, por konstante pli da justo, pli da libero kaj pli da kulturo, ĉi tiu batalo estus jam anticipe malgajnita.

La batalo por la kulturo, jen kio kunigas nin.

La iama analfabeto de mia kompanio, kiu en sia unua letero

al sia edzino skribis: „Ĉiutage mi sentas min pli feliĉa pro tio, ke mi venis tien ĉi, ĉar ĉi tie en la tranĉeo mi fine lernis ĉiujn ĉi aferojn, kiujn mi neniam povis lerni en nia vilaĝo”; — la soldatoj en la konstruaĵoj de l'Universitata Urbo, kiuj pendigis afiŝojn plenajn de lingvaj eraroj kun la vortoj: „Kamaradoj, ne tuŝu la instrumentojn; ili servas al la scienco”, — aŭ la milicianoj, kiuj kun danĝero por la propra vivo savis la artotrezorojn el la pafe bruligita palaco de l'duko de Alva; — ili ĉiuj defendas la saman kulturon, kiun defendas ni, kulturon, kiun ili respektas, neniam gustuminte ĝiajn fruktojn.

En sia verko pri don Quijotte kaj Sancho diras Miguel de Unamuno, ke el tiuj du figuroj Sancho Panza estas la vera idealisto, ĉar kredanta pri don Quijotte.

Kaj efektive, la majstroverkon de Cervantes oni ne povas legi, ne trovante ĉiupaĝe la admiron, kiun tiu ĉi simpla homo el la popolo sentas al sia superulo spirita, admiron, kiu kelkfoje tentas lin sekvi la intelektulon eĉ tien, kie lia naiva kamparana prudento komprenigas al li la malsaĝecon de ties paroloj.

Mi certe ne deziras kompari la admirindan, konscian kaj heroan hispanan popolon niatempan kun Sancho Panza, kiu, ne defendante sin, akceptis ĉiujn batojn kun la nura espero meriti per tio sian faman insulon. Tio pli ĝuste estas la katolika kamparano iama, kiun oni konsolis per la vivo postmorta.

Sed kion mi kuraĝas aserti, tio estas, ke en la honesta, brava kaj justa gubernisto Sancho jam ekzistis ĉiuj esencaj karakteraj trajtoj de niaj bravaj soldatoj. Cervantes sciis, ke la proletaro, prenante la respondecon sur la proprajn ŝultrojn, per tio tuj evoluas kaj kapablas regi pli bone ol iu duko.

Aliaj aŭtoroj, kontraŭe, komparis don Quijotte kun la intelektulo niaepoka. Komparo tia metas sur niajn ŝultrojn grandegan respondecon. Se veras, ke ni, verkistoj, laŭ la famaj vortoj de Stalin, estas la inĝenieroj de l'animo, oni rajtas postuli de ni la saman matematikan precizecon.

Refoje mi citu el nia granda gvidanto Stalin: „Gardemo, gardemo kaj ankoraŭfoje gardemo!” Ŝajnas al mi, ke la medicinisto batalanta kontraŭ epidemio estas unua infektata de la baciloj de tiu malsano. Ni gardu nin kontraŭ ĉia infekto. Jam troas perfido de servistoj. Jam troas meĥanikaj procedoj kaj jam troas etiketoj tro oportunaj! Nia tasko ne povas esti senpense sekvi ĵurnalistojn kaj oratorojn. Ni havas nian propran klare konturitan taskon: pliprofundigi la sencon de l'homera batalo, kiun ni havas la honoron kaj la feliĉon, partopreni. Oni ne diru pri ni, ke pli malfacilas akiri moralan kuraĝon ol la korpan kuraĝon de l'soldatoj en la tranĉeol

Neniam ni forgesu, ke la bazo de ĉia kulturo estas la kritiko, la sinkritiko, kiun konstante rekomendis al ni Lenin. Kie mankas kritiko, kreskas malpuro kaj maljustoj, same kiel kovritaj vundoj komencas pusi. Por povi kuraci ilin oni devas ilin malkovri. Kiu silentas, timante, ke niaj malamikoj povos utiligi al si nian kritikon, tiu iutage devos kun maldolĉo konfesi al si, ke pro ties silento la eraroj povis regule kaj senĝene disvastiĝi ĝis kiam fine ili mem esprimiĝos pli klare ol la parolo de l'kritikanto iam povis. La vivon de paciento minacas la malsano, sed ne la diagnozo de l'kuracisto.

Mi parolis pri pliprofundigo.

El mia tuta koro mi aklamas la popolfronton, kiu unuigas nin en la batalo por la demokratio. En tiu popolfronto mi vidas ne nur premison de la venko, sed la realiĝon de unu el precipaj deziroj de l'proletaro, la unuan paŝon sur la vojo kondukanta al la realiĝo de l'devizo de Marx: „Kuniĝu, proletoj ĉiulandaj!”

Sed ŝajnas al mi, ke tiu ĉi popolfronto iarilate havas ankoraŭ tro oportunisman karakteron. Ni ne kontentiĝu pri tio!

Pli intimaj ligiloj ol tiuj de nur surteraj interesoj kunigas nin kun amikoj, kia estas nia prezidanto José Bergamin kaj kun la heroaj defendantoj de Baskio. La eldiro de Marx, ke

la religio estas opio por la popolo, ne sufiĉas por klarigi la ververan simpatian, kun kiu aliĝas al ni konstante kreskanta parto de l'katolika junularo. Estas la tasko de l'intelektuloj esplori tion, kio unuigas nin, ne en kongresaj rezolucioj, sed ĉe Francisko de Assizi, ĉe la patriarkoj kaj ĉe la religiaj socialistoj de l'mezepokoj, kiujn oni persekutis en la nomo de la sama doktrino, kontraŭ kiu nuntempe militiras Hitler.

Krom tio ni komprenu, ke la batalo de l'proletaro estas batalo por pli feliĉa vivo de l'venontaj generacioj. La batalo de l'intelektuloj direktu sin al la sama celo kaj senindulge deklaru militon al ĉiuj restaĵoj de burĝa, kapitalisma aŭ asketa moralo barantaj la vojon al tiu feliĉo. La proletaro rajtas postuli de ni la fundamentojn de moralo nova kaj de arto nova akordiĝantaj al ĝiaj bezonoj. La iam liberigita aglo neniam revenas al sia kaĝo. Moderna don Quijote ne kontentiĝu per la ekspluatado de Sancho Panza por nur persona gloro; li agordu sin al la animo mem de la popolo por kontentigi la dezirojn sanktigitajn de tiom multege da homa sango.

La batalo de l'popolo hispana, mi ripetas, estas la batalo de l'avangardo de la tutmonda proletaro por libero, justo kaj kulturo. Iam estis momentoj, en kiuj tiu ĉi batalo ŝajnis al ni senespera.

En tiaj momentoj mi rememorigis al mi alian batalon, batalon, kiun mia popolo iam batalis kontraŭ la plej potenca monarkio de l'mondo ligita kun la ĉion superreganta eklezio. Mi rememoras la jaron 1572an, kiam la ŝarĝon de l'batalo portis nur du el la sep provincoj, kiam la regula armeo estis perece venkita kaj kiam ekskluzive la ĉarma popolo defendis la malmultajn ankoraŭ liberajn urbojn. Vi ĉiuj scias, kiel finiĝis tiu batalo. Kelke da jaroj poste en la liberigitaj Nederlandoj artoj kaj sciencoj atingis tian malvolviĝon, kian neniu el la aŭtokrate regataj landoj egalas. Tiu ĉi batalo de niaj geŭzoj, la franca revolucio, la triumfa revolucio en Rusio estas nur

epizodoj en la evoluo de l'homaro. Neniu fluo iam ajn revenas al sia fonto. La fluado de l'homara evoluo originas en la sangaj mallumoj, kiujn la nunepokaj faŝistoj volas restarigi. Ĝi fluas al la libera maro, en kiu „la homa gento estos la internacia”. Honoron al la hispana popolo, kiu unua rompis la digojn, per kiuj oni klopodis reteni tiun fluon, rekreante Eŭropon en marĉon, en kiu ĉia ĝermo de homa kulturo estus kondamnita sufokiĝi.

Honoron kaj venkon al miaj kamaradoj en la tranĉeoj, kiuj per sia sango skribas en la libro de l'historio pli belajn paĝojn ol kiu ajn el ni iam kapablos skribi.

Aŭguston, 1937a.

NI FANDE KREAS ARMEON.

„De frente, mar!” (Antaŭen, marŝ’!)

„Izquierda, derecha, un dos, up arrow!” (Male-dekstre, unu-du!)

De matene la kvinan ĝis vespere la dekan, la vespersignalon, komandoj sonas tra la vilaĝo.

En la fervojaj stacidomoj la anarĥiistoj pendigis afiŝojn: „Ne donacu al viaj infanoj militludilojn!” sed ĉiu infano en Madrigueras jam povanta iri, imitas la trupojn kaj ludas soldaton.

„De frente, mar!” (Antaŭen, marŝ’!)

„Media volta!” (Laŭdekstre turnul)

„Paso ligero!” (Kurpaŝ’!)

Kiu en la novembrotagoj pasintjare povus imagi, ke la hispana popolo tiom venkos sin mem por akcepti tiun ĉi pli ol prusan ekzercadon, ĉe kiu oni rigardas malfruon de tri

minutoj jam grava krimo? Kiu konjektus, ke tia disciplino eblos kun katalunoj, kiuj ankoraŭ en junio rifuzis ekzerciĝi en kazernoj?

Kaj tamen ne ekzistas dubo pri tio, ke la supera plimulto da niaj soldatoj, komprenante la absolutan neceson de ĉi tiu disciplino, partoprenas la instrukciojn kun plejeble granda fervoro. Ĉiufoje mi ĝojas denove pri la senĝeneco kaj la interesiĝo, kun kiuj ili paŝas antaŭen, por ke oni povu denove klarigi al ili ion, kion ili ne jam tute komprenas. Ne unu horo, eĉ ne kvarona, laŭfakte eĉ ne unu minuto el la instrukcia tempo perdiĝas. Vespere veninte en la kazernoj, mi vidas ofte kiel ili inter si ripetas la manipulojn, kiujn mi tiutage instruis. Kaj tamen la deĵoro estas ekstreme peza, sub la bruliga kastilia suno, en senakva monteta tereno, kie la polvo penetras en ĉiun porion de la haŭto ĝis kiam oni sentas sin kvazaŭ la tuta korpo ŝanĝiĝis en amerikan polvosuĉilon. Malgraŭ tio niaj soldatoj senlace rampas plu de vit' al vito; neniuj plendas; deĵorevito estas vorto tute forgesita. Memorante mian propran soldatan tempon en Nederlando, mi konstatas kun kontento, ke dum trisemajna instrukciado ni atingis pli multe ol tie en sesmonata.

Por tiu ĉi spontanea fervoro oni povas nomi diversajn kaŭzojn.

Unue, tiuj ĉi katalunaj mobilizitoj ne estas tiom malbonaj, kiom oni kredigis al ni. La supera plimulto da ili ne estas junuloj kaŝintaj sin, sed batalintoj, kiuj jam en la juliaj tagoj aŭ poste ĉe la unua ofensivo en Aragono aŭdis la fajfadon de la kugloj. Ĉi tie estas ankoraŭ milicanoj, kiuj eniris la militon kun la unua kolono Thälmann, kiam oni disponis por dek kvin viroj po unu revolvero kaj unu fusilo, devante ankoraŭ militakiri la ceterajn bezonatajn armilojn de la faŝistoj en Pina.

Krom tio ĉiu scias, ke la oficiroj formitaj el la trupo ne

estas *signoritos*, sed ke ili devas labori multe pli longe kaj malfacile ol la soldatoj.

Nur kiam pasis la ekzercoj en la kampo, dum kiuj ni devas mem ekzempli ĉiun manipulon, komencas por ni la efektiva deĵoro. Poste sekvas oficiraj kunvenoj, teoria instrukcio, preparoj por la proksima tago, kaj okazas nur tre malofte, ke mi enlitiĝas antaŭ la dek-dua.

Plej grava tamen estas la admiro, kiun ni sentas al nia komandanto Heinz, neniam ripozanta bravulo, kiu ĉe Jarama dum du horoj trairis la malamikan pafadon, trenante vunditan kamaradon sur la dorso, por savi lin el danĝero.

Per tio mi neniel volas malkonfesi, ke ekzistas, precipe ĉe kelkaj junaj germanaj oficiroj, ia danĝero koncerne troigon de l'disciplino. La forta malkontento, kiu ofte okazas ĉi tie inter el nederlandaj volontuloj kaj iliaj instrukciantoj, kaŭziĝas ne nur el nederlanda sendisciplineco, sed efektive ankaŭ el grava manko pri bonhumoro kaj psikologia kompreno ĉe la germanoj.

Ĉio ĉi povas fariĝi danĝero, ĉar kompreneble neniu armeo en la mondo konsistas ekskluzive el anĝeloj. La supera plimulto de nia brigado konsistas el libervoluloj venintaj tie ĉi ekskluzive serve al sia idealo. Sed jam tio ne garantias, ke ilia idealismo kaj la eltenkapablo de iliaj nervoj ĉiuokaze povas rezisti la provon de efektiva eniro en la batalon. Ekzistas individuoj, kvankam nombre malmultaj, kiuj post kelkmonata frontvivo fariĝas nedisciplineblaj. Aliflanke oni kompreneble ne povis tute eviti, malgraŭ severa ekzameno, enŝteliĝon de malgranda nombro da aventuruloj kaj aliaj nedezirindaj individuoj.

Tiurilate estas karakteriza la letero, kiun ricevis nia politika komisaro de unu el la novaj milicanoj en Pozo Rubio:

„Al tre estimata sinjora moŝto Z.,

politika komisaro por ĉiuj nederlandanoj.

Tre estimata sinjora moŝto. Ĉar vi deziris ricevi de ni, no-
vuloj, biografion, informas vin kun ŝuldata respekto la subskri-
binto, ke en sia plej frua junaĝo li okupis sin per elpoŝstelado.
En tiu profesio mi jam estis akirinta certan fingrorapidemon,
kiam la polico faris finon al mia kariero, kondukante subskri-
binton en ŝtatan edukejon. En tiuj tagoj mia idealo estis:
fariĝi trompŝtelisto, sed per maldolĉaj spertoj mi devis ekkom-
preni, ke Nederlando estas landeto tro malgranda kaj tro
malvastanima, ol ke ĝi povus prezenti tiurilate efektivan per-
spektivon. Ĉar rompŝtelado ŝajnis al mi tro danĝera, mi okupis
min dum kelka tempo per monfalsado, ĝis kiam ankaŭ en tio,
pro malplivaloriĝo, la profito ne valoris la penon. Ĉar mi estas
katoliko kaj ĉar ĉe mia patro hejme oni legas nur katolikajn
gazetojn, mi ekhavis impreson, ke ruĝa Hispanio nun estas
ideala lando por rabado kaj ŝtelado. Pro tio mi ne hezitis eĉ
momenton anonci min kiel volontulon, sed kun mirego mi
trafiĝis sur erikejan ekzercterenon, kie ne troviĝas io ŝteblela
aŭ rabebla kaj kie ni, *au contrarie*¹⁾, devas dum horoj treni
nin tra la polvo. Mi petas vin, tre estimata sinjora moŝto,
bonvolu kredi, ke neniam tio estis mia intenco kaj pro tio
rigardu mian soldatiĝon eraro kaj resendu min al Nederlando,
ĉar aliokaze mi devos helpi al mi alimaniere.

Skribinte tion, restas kun plej humila estimo
al via moŝto, via subskribinta servanto

P. C.”

Kompreneble oni tuj plenumis lian peton, kaj eble li apartenas
al tiuj, kiuj poste havigis al „De Telegraaf”²⁾ la volonte akcepta-
tajn kontribuaĵojn por laŭdegi la nederlandan militforkurinton.

1) Kontraŭe. Trad.

2) Nederlanda gazeto favora al Franco. Trad.

Postrestas tamen ĉiam, eĉ sur la fundo de la plej pura vino, ia feĉo. Kaj ĝuste inter tiaj individuoj klopodas agiti germanaj provokistoj, senditaj de „Gestapo”¹⁾. Karakteriza tiurilate estas malgranda komploto, kiun ni malkovris en Madrigueras, kie oni sisteme klopodis veki malkontenton kaj organizi forkuron de militosataj individuoj.

La malgranda disvastiĝo, kiun tiu ĉi lerte organizita komploto atingis, kaj la fakto, ke la soldatoj mem malkovris ĝin, plene pruvis kiom morale disciplinita estas la trupo. Ne en tia provokado kaŝiĝas ia danĝero, sed ĝuste en tio, ke oni facile tentiĝas ne ekstermi kelke da efektive justaj plendmotivoj. Ankaŭ ĉi tien enpenetras malrapide, eĉ en oficiraj kunvenoj, la kvazaŭmoda kutimo toleri kritikon nur tiuokaze, se ĝi esprimiĝas kiel sinkritiko. Al efektive domokrata evoluo tio havas finfine, kiel ĝenerale en la politiko, nepre senfortigan efikon.

Mi opinias, ke la tia nomata militsatiĝo, esprimanta sin per ĉiaj malgravaj plendoj, en vero grandparte baziĝas sur ekscese granda seksa bezono.

Nenio estas pli ridiga ol prezenti la batalantojn en Hispanio kiel bandon da seksvoluptuloj, kiel tio okazis en la burĝa gazetaro, sendube por kontentigi subpremitajn seksajn instinktojn de siaj legantoj. La tranĉeoj efektive ne prezentas malkonvenajn lokojn por seksaj intimaĵoj, sed mi ne memoras esti aŭdinta nur unufoje rakonton pri perforto al virinoj aŭ knabinoj. Ĝuste kontraŭe estas mirige, kiom malmulte oni ambaŭflanke agis perforte al virinoj, malgraŭ la volupte naŭzaj incitegoj de Quiapo de Llano. Laŭ mia scio agis tiurilate ekscese nur la maŭroj, al kiuj oni ja estis promesinta belajn virinojn por logi ilin.

En sia junulara gazeto „La Revolucion” la anarĥiistoj komencis militiron kontraŭ onanismo kaj jam en la unuaj

1) Germana sekreta ŝtatpolico. Trad.

tagoj de l'milito ili kovris ĉiujn murojn en Madrid per afiŝoj helkolore vokantaj al batalo kontraŭ la prostituado, kvankam ne ekzistis jam la ekonomia bazo por forigi tiun ĉi malbonon. Poste la komunistoj komencis batali per la, miaopinie danĝera devizo: „Ĉiu seksmalsanulo egalas forkurinton”. Por pruvi kiom malmoralaj estas la faŝistoj, la komunistaj gazetoj kriis unuvoĉe honton pri la fondo de frontbordeloj por diversnacionoj en Toledo.

Sur tiu ĉi vojo de l'virto la internaciaj brigadoj kompreneble iris ankoraŭ unu paŝon plu. En ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, kie ili estis garnizone, ili malfondis la jam ekzistantajn bordelojn. Se post tio montriĝis seksmalsanoj inter la civila loĝantaro, oni plimultigis la postenojn, kiel en Madrigueras, malpermesante al la soldatoj viziti la domojn de la loĝantoj.

Iu tro nesingarda onanulo el kazerno kvara devis mediti pri siaj pekoj en la arestitejo.

Tuŝante tiun temon la centra politika komisaro deklaris: „Ni, komunistoj, kontraŭas la prostituon, kaj bona komunisto povu regi siajn seksajn instinktojn”. Bonega deklaro, sinjoro! Sed la problemoj konsistas en tio, ke certe ne ĉiuj niaj soldatoj estas komunistoj, ke en Hispanio ekzistas ia seksviva tradicio, kaj precipe, ke, laŭ franca proverbo, la naturo, de kie oni forpelas ĝin, tien ĉiam galope revenas.

Alia misstato, pri kiu mi ĉi loke necese devas denove atenti, estas la absoluta manko pri militistaj kompendioj por oficiroj. Kvankam eĉ antaŭ nelonge aperis superbelega dekvoluma hispana mondhistorio, oni ne povas, per kiom ajn da mono, havigi al si la bonegan, sed tute elĉerpitan hispanan militistan regularon. El tio rezultas, ke, malutile al la unuformeco, oni ekzercas intermikse laŭ hispana, germana, franca, rusa aŭ ĉeĥoslovaka metodo.

Manko pri papero ne estas taŭga argumento kontraŭ tio.

Ĉar ĉiutage la partio disvastigas po centmiloj da ekzempleroj biografion de Stalin, Vorosilov kaj Kaganoviĉ kaj ĉiajn broŝurojn pri Dnjeprostroj kaj la organizo de infangardejoj, certe ekzistas papero ankaŭ por presi militistajn regularojn.

Alia plendmotivo de niaj milicanoj en Madrigueras estas la nepra manko pri hispanaj kaj katalunaj ĵurnaloj, el kio kaŭziĝis cirkulado de ĉiaj onidiroj. Jen la kontraŭargumento de nia politika komisaro kun sia plena valoro: „Se ni decidus disdoni ĉi tie ĵurnalojn, ni, laŭ la leĝo, ne povus malhelpi, ke proporcie al la nombro da anarĥiistoj, tio estas laŭ la plimulto, oni disdonu ankaŭ anarĥiistajn ĵurnalojn”.

Unuafoje kun forpermeso forlasinte Madrid, mi demandis al Fermin, kion mi rakontu al la laboristoj en okcidento, kaj li respondis ridete: „Sed, kamarado, tio ja estas tre simpla. Rakontu al ili la veron, nenion krom la vero, ĉar tio estas nia plej bona propagando”. Simplulo kia Fermin konklude venis al la sama devizo, kiun iam kompendie por la tuta laborista klaso proklamis Lasalle en sia fama parolado „Aussprechen was ist”¹⁾. Longan tempon mi dubis pri la ĝusteco de ĉi tiu devizo. Longan tempon mi parolis la veron, sed ne la plenan veron, timante, ke ĝian malagrablan flankon povus misuzi niaj malamikoj.

Ĉar maldolĉe estas, kiel diras ankaŭ Bergamin, imagi la kontentiĝon, kun kiu oni aliflanke de l'tranĉeo citos kelkajn niajn eldirojn. Sed mi lernis kompreni, ke, kiam silentas la partianoj, parolas la faktoj, kaj ke ni havas des pli multe da motivoj por paroli, ju pli ni timas la veron. Al ni, kiuj pro bonvolo silentis, oni povas riproĉi ne lastvice, ke la misstatoj en Rusio povis kreski ĝis la nunaj jam ne kaŝebaj proporcioj.

1) Diru tion, kio estas. Trad.

Ĝis nun neniu sukcesis kun maskita vizaĝo longan tempon trompi la historion. Jam la aliancaj regnoj ne povis ne sperti, ke ankaŭ venkita milito povas finiĝi per malvenko, se la venko estas bazita sur mensogo. La batalon por la socialismo ni ne povos venki, nur pereigante la malamikon, se ni samtempe pereigas la socialismon en ni mem. La batalo de la socialistoj estas batalo por la renaskiĝo de la homo, kaj la vojo al la socialista homo kondukas nur laŭ la vero. Ĉi ni eble havas ian motivon por timi la veron? Tiuokaze certe ne en Hispanio!

La malgrandaj kritikaj rimarkoj, kiujn mi faris, neniurilate povas makuli la belecon de la tuta bildo. Nenie, kun nura escepto en Sovet-unio, ekzistis iam armeo, kiu, kia la armeo hispana, estis samtempe vivkomuno kaj kultura universitato de tuta popolo.

Mi pensas pri niaj novaj bibliotekoj en ĉiu vilaĝeto, kie vespere la vilaĝaj junuloj sidas legante aŭ kun pro streĉo sulkigita frunto ŝakludante kun niaj soldatoj.

Mi pensas pri la miloj da libervoluloj, kiuj festis la unuan majtagon, komencante fosi la irigacian kanalon, kiu finfine kondukos akvon al la malriĉaj kampistoj.

Mi memoras pri la ruĝa dimanĉo, kiam tutaj batalionoj eniris la vinberejojn por helpi al la nova vilaĝa kolektivo kolekti la vinberan rikoltaĵon.

Mi memoras pri la vunditoj en Cuevas de la Petita, kiuj ŝparis por traktoro, kaj pri la flegatoj en Villa Nueva de la Jara, kiuj konstruis gimnastikejon kaj kulturpreparis lernejĝardenojn por la vilaĝaj infanoj.

Mi memoras kun delikata sento pri la lasta infanofesto, kiun ni organizis en Madrigueras. Ni estis invitintaj la tutan lernejan infanaron, sed ne kalkulante, ke ĉiun knabon ankaŭ akompanos tiom da liaj pli junaj gefratetoj, kiom povis nur iri aŭ stari. La organizo de la procesio fariĝis preskaŭ katastrofo:

etuloj faletis, komencis plori aŭ perdis la ŝuetojn, kaj baldaŭ la duono de niaj soldatoj marŝis flanke de la procesio kun infanoj sur la brakoj. Komprenoble ankaŭ nia provizo da donacetoj ne sufiĉis por tia amaso da infanoj. Senprokraste niaj soldatoj eniris la vilaĝon, kie ili foraĉetis ĉiom da kajeroj, ĉiom da kraĵoj kaj ĉiom da pecetoj da viŝgumo, troviĝantaj en la butikoj. Eĉ ne unu infano iris sen donaceto hejmen. La danko de l'vilaĝa infanaro estis senlima. Kiam ni marŝis sur la vojo aŭ ekzercis nin sur la kampoj, estis severe malpermesite al niaj soldatoj preni la tie maturiĝantajn vinberojn, kiom ajn ili eble soifis. Sed feliĉe ni ne rajtis malpermesi ion al la vilaĝa junularo. La knaboj kure akompanis la trupon, kaj tiom rapidis de arbust' al arbusto, ke la lango pendis el la buŝo, nur por alporti vinberojn al niaj soldatoj.

Madrigueras, la 8an de oktobro.

RETAGUARDIA.

Pro la multa marŝado la vundetoj sur miaj piedoj remalfermiĝis, pro kio mi dum pluraj tagoj devis ne deĵori. Nenio pli enuigas ol tia devigita senlaboreco, kaj dume en Albacete oni ŝajne forĝis min. La lastaj tagoj tamen havis ian ĉarmon. Estis permesite al mi iom promeneti, per kio mi pli kaj pli kutimiĝis al la vilaĝa vivado, dum kiam la trupoj sin ekzercis sur la kampoj.

Malgaŭ la milito la vilaĝa vivado malmulte ŝanĝiĝis. Frumaltene la azenoj kaj muloj venas al la fontano por trinki. Estas vere agrabla spektaklo vidi la knabojn sidantaj poste sur la dorsoj, pelantaj la bestojn per la klakado de siaj nudaj kruoj. Longaj vicoj da kareoj ŝarĝitaj per longkolaj argilaj kruĉoj jam atendas tiam, kaj la virinoj sinsekve plenigantaj ilin for-

babilas sian tempon per la vilaĝaj novaĵoj. Dume la tendoĉaroj ĝenerale tirataj per du, tri muloj balance veturas kun vinberrikoltistoj al la kampoj. Pli kaj pli silentiĝas en la stratoj. La ĉielo funde bluiĝis; la blankaj fasadoj ekhavas profundajn nuancojn de oranĝa aŭ violblua ombro; post la mallevitaj verdaj ĵaluzioj dormetas la domoj, kaj se oni puŝe malfermas la putre difektitan pezan pordon de iu *patio*, oni vidas sub tegmento de vitaj grimpobranĉoj nur la kokinojn serĉe grate-tantajn sur sterkamaso.

Tom antaŭ la tagmezo tamen ĉiuj revenas, kaj post la horoj de siesto staras la ĉaroj alte ŝarĝitaj per flavaj junkaj korboj laŭvice antaŭ la domoj. Interne de ili, en la preskaŭ blua ombro de gigantaj amforoj, laboras viroj kun nudaj, pro vinbera suko purpuriĝintaj kruroj, kaj per ŝoveliloj ĵetas la belegajn, pezajn grapolojn en la premilojn. Kelkloke la premiloj estas jam movataj per elektro, aliloke ankoraŭ viroj, kvazaŭ maristoj ĉe kapstano, turnas la radradiojn de fantazie pezaj, kverklignaj maŝinoj, kvazaŭ instrumentoj de l'inkvizicio, el sub kiuj oni vidas forfluanta la ruĝan sangon de l'martiroj.

Kiam mi eksidas sur la sojlon por fari skizon, la virinoj tuj ĉirkaŭas min. „*Pero, propio, igual, igual!*” ili diras kaj alportas al mi tranĉaĵojn da melono, vinberarojn, panon aŭ nuksojn, nepre dezirante, ke mi formangŭ ĉion. Kiam mi foriras, la infanoj akompanas min, rigardante al mi per siaj grandaj, malhelaj okuloj kaj flatas: „Onklĉjo kapitano, ĉu vi morgaŭ desegnos ankaŭ min?”

La iama kazino de la grandterposedantoj estas nun Casa del Pueblo (popoldomo). La lampoj estas parte difektitaj aŭ, pro nesufiĉa kurento, lumas nur malmulte; pro tio la anguloj de l'salono preskaŭ ĉiam troviĝas en mallumo. Sur la plafono vilaĝa pentristo pentris krudajn kopiojn de Murillo kaj Velazques, jam nigriĝintajn pro tabakfumado. Vulcanus

kaj liaj forĝistoj malsupren rigardas al la kamparanoj sidantaj en ĉemizoj kaj kun ankoraŭ supren levitaj pantalonaj tuboj, ĉe la tabletoj. Ĉar tabako jam ne estas aĉetebla, ili fumas sekigitajn vitajn foliojn, kiuj kaŭzas incitan, naŭze dolĉan malbonodoron. Sub unu tableto, ĉe kiu sidis milicanoj, kelke da knaboj serĉas cigarrestaĵojn.

Mi mendas glason da muskat- aŭ malaga-vinon kaj preskaŭ tuj ĉirkaŭas min rondeto da dekkelkaj viroj. Se ili akceptas de mi regalon, kio malofte okazas, ili mendas la plej malmultekoste aĉeteblan: *refresco*. Tamen, ĉiufoje kiam mi volas egaligi mian ŝuldon, evidentiĝas, ke iu ajn mistera gasto jam pagis mian kalkulon. Kompense mi desegnas iliajn portretojn sur la marmora tabloplataĵo, kian spritaĵon ili ĉiam tre ŝatas.

Poste en la vespero ili komencas rakonti. La temo estas preskaŭ ĉiam la malsato, mizero kaj malriĉo iamaj kaj la fifiereco de la riĉuloj. „Antaŭe ne povis okazi”, diras kamparaneto, el kies vangoj restis nur du profundaj ombraj kavoj sub la okuloj, „ke ni, kamparanoj, kun kapitano sidas parolante ĉirkaŭ tableto!”

Granda kampara junulo kun kalvetondita kapo metas sian pro laboro malpuran manon sur mian brakon: „Nuntempe ni laboras en la *bodega* ok horojn, antaŭe de sunleviĝo ĝis mallumiĝo”.

La kamparaneto ne lasas lin pluparoli:

„Ni gajnis po du, tri pesetoj tage”, li diras, „tio apenaŭ sufiĉis por aĉeti panon. La terposedantoj veturis per siaj aŭtomobiloj al Albacete aŭ Valencia, sidis tutnokte en la kafejoj kaj fordiboĉis nian monon kun publikulinoj. Dum la rikolta sezono ni forlasis la domon je la dua matene kaj revenis en la vilaĝon ne antaŭ la deka vespere. Multaj el ni restis sur la kampo, dormante volvitaj en kovriloj, por ke ili ne bezonu al- kaj reiri. Ilin akompanis al la kampo iliaj infanoj kvar- kaj kvinjaraj, kiujn ili en la tago sendis al la vilaĝo por alporti

panon kaj akvon. La pastro predikis submetiĝon, kaj la riĉuloj certis pri la *guardia civil* por teni nin sub ilia potenco. En la kazerno loĝis kvin ĝendarmoj, kiuj montris sin neniam sen fusilo en la vilaĝo. Kiam la laboristoj en Parasona komencis striki, la *guardia civil* kruce fiksis kvin el ili, per najloj tra la manoj, sur rezervejan vandon. Virinojn ili ĵetis surteren kaj tra funeloj verŝe plenigis ilin per akvo, ĝis kiam ŝvelis iliaj ventroj. Post tio ili turnis la virinojn kaj batis aŭ piedfrapis ilin tiom longe, ĝis kiam ili ĉiom reelvomis. *Ay, los ricos de aqui, mucho malo!*"

Ĉe tableto apud la per paliĝinta trikoloro ornamita podio sidas la vilaĝaj magistratoj: la vilaĝestro-tajloro, la skabeno, kiu estas la prezidanto, kaj la kasisto elektita el la organizita junularo. (La komunumestraro konsistas el tri maldekstraj respublikanoj, unu nedependulo, kvar social-demokratoj kaj unu komunisto.) Ĉiu, kiu eniras, antaŭe paŝas al tiu tableto por interŝanĝi kelke da vortoj. Kiam venis grava novaĵo, la vilaĝestro suriras la podion por fari mallongan alparolon. Sen-spire ĉiuj silentas, kiam li voĉlegas la nomojn de la nove mobilizitaj rekrutoj, kiuj sekvontatage devos foriri. Post finiĝo de tiu listo la silento preskaŭ tuj ŝanĝiĝas en ĝeneralan voĉhaoson kaj iom troigitan ĝojon. La nomitoj gestas al si reciproke kaj kolektiĝas ĉirkaŭ tablo; la aliaj ĉirkaŭas ilin, amike frapas ilin sur la ŝultrojn, ĉirkaŭprenas ilin. Subite oni ĉiuflanke elpoŝigas monon por mendi vinon kaj anizon por la tuta societo.

Brue ili kantas „*A ya ya*” aŭ „*La kvar generaloj*”, ĝis kiam la entuziasmo de l'unua momento malfortiĝas kaj oni ripetas saman frazeton pli kaj pli insiste: „*Eulogio, flamenco! Que Eulogio canta!*”

Eulogio apogas sin kun duone fermitaj okuloj en la seĝo, lasante al li petegi. Malrapide, ritme li balancas la torson, kvazaŭ medio entranciĝonta. Subite eksplodas lia voĉo,

neatendite alta, kvazaŭ flamsage, ŝvebas nekompreneble longe en sama alto por poste forgliti en bizaran belon de ruĝaj, bluj kaj flavaj arabeskoj.

„Ollé!” oni admiras de buŝ’ albuŝe kaj la rondo jam komencas akompani interklakante la manojn. Kaj nun eĉ Eulogio jam ne scias ĉesi; unu kanton sekvas alia, kaj kiam pormomente li interrompas, dekoj da manoj prezentas al li sian pokalon kvazaŭ por faciligi al li la voĉon. Kontraŭ li sidas lia dek-sesjara frato kun grandaj, pro admiro fiksjaj okuloj. Li havas mallarĝan, palan proletan vizaĝon kun buŝo larĝa kvazaŭ mula. Subite tiu buŝo malfermiĝas. El inter la malbonaj, karie difektitaj dentoj eksteren fluas kanto jam ne retenebla. Lia voĉo havas malpli da volumeno ol tiu de lia frato; iafoje lia kanto estas malforta kaj delikata kvazaŭ fadeneto, kvazaŭ unu sola aŭtuna araneaĵo, sur kiun ludas la subiranta suno. Kaj nun kantas ambaŭ knaboj laŭvice, ekvilibrigas sin reciproke, forgesante la homojn ĉirkaŭ si en pli kaj pli intimiĝanta kunesto de lasta interparolo antaŭ la adiaŭo, *flamengos*, tangojn, amkantojn, ĉion, kio ĉi momente tuŝas ilian koron. „Se mi falos kiel viktimo, mia sango retrovos kvazaŭ rivereto la vojon al la vilaĝo, kie mi naskiĝis; la bestoj venos al ĝi por trinki, la birdoj kantos ĉe ĝi, miaj fratetoj gargaros per la akvo siajn fingrojn kaj la larmoj de mia patrino ŝveligos la rivereton”.

Sekvintmatene mi vidis Eulogio staranta inter aliaj rekrutoj sur la ŝarĝveturilo. Ili ridis kaj kantis, kiam la aŭtomobilo puŝe moviĝis kaj skue disjetis ilin. La viroj, virinoj kaj infanoj sur la vilaĝa placo kriis *salud*, levante la pugnigitajn manojn. Ankaŭ la knabon kun la mula buŝo mi revidis kaj maljunan virinon sin apogantan sur li. Tio estis evidente la patrino de Eulogio. Ŝi tenis sin brava, sed restis ankoraŭ longe kaj kvazaŭ ensorĉita staranta, post kiam la aŭtomobilo jam estis malaperinta preter la angulo. Preterpase mi salutis la knabon. Subite

la patrino iris al mi renkonte kun la intima spontaneo iafaje propra al virinoj el la popolo. „Kapitano”, ŝi diris, kaj ŝia voĉo ĵus antaŭe brave kriinta „no pasaran”, subite komencis tremeti, „kapitano, tio estas mia tria, kiu foriras, sed ne tio gravas, . . . nur, ke tio ne estu senutila! Kapitano, diru al mi, ja ne estos senutile? . . .”

OAZO.

„Ne”, diris la instruisto mallaŭte, „kontraŭe, ĉion eblan ni faras por forgesi al la infanoj la militon, en kiu ili vivas”.

Mi bone konis tiun ĉi kvartalon; antaŭ du tagoj la faŝistaj baterioj elektis ĝin pafcelo; trans la muro ĉirkaŭanta la ĝardenon videblis la difektegita kaj disŝirita fasado de iu etaĝa loĝejo.

Sed estis vere, ke inter tiuj ĉi muroj kaj sub la miraklofara printempa suno de Madrid eblas forgesi la militon.

Apud ni maljuna laboristo kaj grupeto da infanoj per pioĉoj kaj ŝpatoj fosis grandan kavon. „Tio fariĝas naĝejo”, diris la instruisto, „la infanoj laboras super ĝi, kiam ili volas, kaj kiu sentas sin laca, ĉesas senpete”.

Kvazaŭ por konfirmi liajn parolojn gaja bubeto kuretis al ni: „Sinjoro, mi forportis dek kvar kareplenojn; nun mi foriros por legi”.

Tiun ĉi lernejon oni malfermis en la por Madrid plej malfavoraj tagoj, en septembro, kiam la malamiko staris antaŭ la urbo. Komence oni celis eble nenion krom kolekti la infanojn for el la stratoj, sed la instruistoj tuj kaptis la okazon por realigi tie ĉi etan parton de siaj pedagogiaj idealoj. Kvankam la iniciato venis el C.N.T., kiu ankaŭ portas la kostojn de la instituto (la instruado por tiuj ĉi proksimume 160 lernantoj estas tute senpaga), la instruistaro konsistas kune el membroj de U.G.T. kaj de l'komunista partio en Hispanio. Pligrandparte

la infanoj estas eĉ el familioj de U.G.T.-anoj. Sed ĉie en la lernejo regas la spirito de l'granda hispana pedagogia pioniro kaj martiro Ferrer!

„Nia fundamenta principo”, diras la instruisto, „estas plena libereco. Ni volas instrui al la infanoj ne submeti sin sub diktatorecon, sed ĉiam en la vivo regi sin mem”.

„Do, ĉu ne ekzistas devigo por regule frekventi la lernejon?”

„Ne”, li respondas, „por kio tio necesus? La naturo ja kreis en ĉiun homon la impulson al lernado kaj sinklerigado!”

„Kaj ĉu ili regule venadas?”

„Lastatempe, pro la vicado antaŭ la butikoj, la patrinoj ofte bezonas ilin en la hejmoj por gardi la etulojn, sed alitempe . . ., se la lernejo malfermiĝas je la dua horo, ili jam unuahore malpacienas antaŭ la pordego”.

Mi rigardas ĉirkaŭe. Estas vere, ĉiuj trankvile gajas kaj tamen serioze okupas sin. El la laborejo sonas la bruado de segiloj kaj marteloj, kelke da knaboj legas, knabineto kun la lango elbuŝe fervore okupas sin pri la multiplikaj tabeloj, rondo da etuloj dancas sur la herbokampo.

La instruisto geste montras al mi kelke da knaboj en la ĝardeno fose preparantaj florbedojn.

„Ĉio baziĝas sur konstanta alterno de spirita kaj fizika laboroj. Ni aspiras eduki ilin homoj harmoniaj, kiaj estu nek laborbestoj, nek ĉambretaj pensuloj. Samokaze la infanoj per sia laboro lernas kompreni la naturon. Ili studas la vegetaĵojn, kiujn ili mem semis kaj kolektis. Farante tion ili lerne akiras moralan principon, ke ĉiaj nutraĵoj, per kiuj ili vivas, ne sen penoj aperas, sed akiriĝas per laboro”.

Ni eniras la lernejon, konfiskitan vilaon kiom eble adaptitan al sia nova destino. En la ĉambroj staras samspecaj malaltaj tabletoj kaj komfortetaj seĝetoj, kiajn ni vidis jam en la ĝardeno; ĉiu infano havas sian propran, kiun ĝi laŭdezire povas translokigi, sed la seĝetoj estas tiaformaj, ke ili estas laŭvice aran-

ĝeblaj por komuna leciono aŭ prelego.

La instruisto senkulpigas sin pro la malordo: „Vi komprenu, somere ni preskaŭ ne uzas la domon; ĉiuloke ni ĉarpentas kaj rekonstruas”.

Malgraŭe mi vizitu la muzeon, kvankam la vitrinoj ne estas jam pretaj. La plej riĉa trezoro konsistas el objektoj, kiujn la infanoj mem alportis: skaraboj, papilioj, ŝtonetoj, vegetaĵoj.

„Se ili alportas ion tian, tio servas al ni kiel komenca temo por la matena instruado. Antaŭe ni rakontas pri ĝi; poste oni desegnas, analizas, pesas, mezuras . . .”

En la ŝrankoj staras tamen ankaŭ pli kostaj objektoj: elektrozaparato, kinematografo, vapormaŝino funkciiganta malgrandan dinamon, modeloj de la homa korpo.

„Jen ankoraŭ unu el la fundamentoj de nia instruado: mem fari kaj tuŝi. Per ĉiuj ĉi objektoj la infanoj mem laboru. Per tio ili el si mem faras milon da demandoj. Ke neniu demando restu senresponda — estas la ĉefa devo de l'instruisto”.

„Sed, ĉu tiuj demandoj, precipe kiam la infanoj pliaĝiĝas, iafaje ne estas iom embarasaj?”

Tuj komprenante min, la instruisto ekridas: „Ni ne timas”, diras li. Lia mano kline tiras al ni branĉon de migdalarbo. „Rigardu tiujn ĉi fruktojn! Surbaze de ilia diskresko ni klarigas al niaj infanoj ankaŭ la seksan vivon. Mi kredas, ke ĝi ne havas sekretojn por la etuloj sep- kaj okjaraj en la plej malaltaj klasoj. Sed ĝuste pro tio, ke kontentiĝis ilia sciemo, malaperis la stimulo de l'mistero. Duŝon knaboj kaj knabinoj intermikse partoprenas, kaj eĉ ne ekzistas apartaj necesejoj. Sed el ĉiaj teruraj rezultoj, kiajn oni antaŭdiris al ni, ĝis nun eĉ ne unu veriĝis”.

En la parketo grupo da infanoj komencas kanti. Iliaj subtilaj, delikataj voĉetoj enhavas la mirigan kortuŝon, kiu jam ofte aperigis larmojn en miaj okuloj, kiam mi pasis sub malfermita fenestro de vilaĝa lernejo. Malrapide ni prok-

simiĝas. La instruistino ludas malnovan pianon; ĉirkaŭ ŝi sidas la infanoj kantantaj kun atentaj mienetoj „*hijos del pueblo*”. La instruisto montre gestas al etulino kun la kapeto ripozanta sur la sino de sia instruistino: „... ĉu ne estas, kvazaŭ ili troviĝas hejme?”

Ĉe la pordego de l'ĝardeno ni interadiaŭas. „Vi komprenu”, diras la instruisto, kvazaŭ senkulpigante sin, „ke la cirkonstancoj malhelpas al ni aranĝi ĉion tia, kia ni tre dezirus tion. En tiuj ejoj supre nestas kolomboj, kunikloj kaj aliaj bestoj, sed ni ne havas ion por nutri ilin... Vere, la infanoj devus resti ĉi tie la tutan tagon, sed manĝejon ni havas sen manĝaĵo... Ĉio ĉi realiĝos, post kiam la milito estos pasinta. Dume ni instruas al niaj infanoj unuavice: ŝati la pacon super ĉio cetera...”

La pacon!

En tiu ĉi eta oazo ĝi regas. Ekster la muro staras la difektitaj fasadoj de domoj, en la pavimo kavas la funeloj pro grenadeksplodoj, bruas la kanonmuĝegado de l'malamiko staranta distance de apenaŭ du kilometroj de la urbo. Kaj kiu scias, ĉu eble morgaŭ falos aviadila bombo mezen en tiu ĉi ĝardeno kaj la ambulanco povos forporti nur la kriplitajn infanajn kadavretojn? ..

Maarten van Gilse, kiu akompanas min, rompas la silenton: „Ĉie, kie mi estis, en Valencia, en Murcia kaj nun en Madrid, la infanlaboro estas la plej interesa, kion mi vidis; ĉie novaj ideoj, ĉie la sama amo al la junularo”.

„En Rusio”, mi diras, „estis same, eĉ en la plej malfavoraj jaroj. Tio estas niaj fiero kaj espero, la pruvo, ke ni vivas kaj batalas por la estontaro”.

Ĉeangule alvenas ĵurnalvendisto: „Ahora, La Voz, El Liberal, Mundo Obrero!”

Mi aĉetas ĵurnalon kaj rigardas en ĝi: „Baskio. Krimulaj aviadiloj de la malamiko denove bombardis niajn vilaĝojn. Ĉe eliro de iu lernejo en ... bombo disŝiris dudek infanojn.

FELIZ.

Certe ne por Feliz mem, sed pli ĝuste por lia patrino kaj por la tuta nesto da junaj infanoj kiel ĉiam kvazaŭkokide moviĝanta ĉirkaŭ ŝiaj jupoj, mi vizitadis lian hejmon.

Mi renkontis ŝin unuafoje en la septembrotagoj, kiam Madrid parte aspektis revolucia kaj ŝajne regis pli da fratiĝo ol da milito. En longa vico da ĵus akceptitaj libervoluloj ni marŝis de unu kafejo al alia, sur larĝa Avenido de la Republica. Rigidmiena, jam maturaĝa, sed ankoraŭ freŝe sana virino venis al ni renkonte. Sur la azeneto, kiun ŝi bride kondukis kaj kiu estis supersarĝita per verdaj melonoj, klakbruis la nudaj kruroj de tri bubetoj. Kiam ni proksimis ŝin, ŝi komencis kvazaŭ prudentoperde dividi siajn melonojn inter la milicanoj. La pli multaj, iom konsternitaj, malakceptis. Eble ili eĉ ne tre deziris kun melono subbrake iri de kafej' kafejon. Sed pala junulo, kiun mi ĝis tiam ne estis rimarkinta, insistis preskaŭ petege: „Do prenu ilin, prenu ĉiujn; tio estas mia patrino!”

Inter la ĝenerale rimarkendaj kaj iom brukondutaj tipoj de la bataliono Feliz estis iu tiom malmulte okulfrapa, ke oni inklinis forgesi, ke li ekzistas. Li estis nek kuraĝa, nek malbrava, ne havis propran opinion, almenaŭ ne esprimis tian en kia ajn diskuto, neniam iniciatis ion, sed estis treege obeema kaj krome ankaŭ ĝisridige mallerta. Kiam en Naval Perral atakis la maŭroj, li kuŝis duonan horon flanke de mi post ŝtonego, sed ne pafante. „Kial vi ne pafas, idioto?” mi demandis. Embarasite li respondis: „Mi ne scias kiel streĉi la ĉanon”. Pro tio neniu ekintencis sendi Feliz al danĝera posteno, sed li estis la viro, kiun oni elektis por alporti akvon aŭ fari purigan laboron.

Ĉar li ne kantis *flamengos*, nek iam partoprenis konversaciojn, ni apenaŭ konus lian voĉon, se li ne iafaje, ĉe la manĝo, estus rimarkiginta: „Neniu kuiras tiom bonan *podja* kiel mia

patrino; do foje venu al ni por manĝi, kiam ni reestos hejme” aŭ: „Tiun vian pantalonon flikos mia patrino en Madrid!” El tio sekvis, ke multaj junuloj el kamparo, havante forpermeson, senpage deponis sian tolaĵon por lavo ĉe la patrino de Feliz, kaj tiel do ankaŭ mi restis babilanta tie, kiam mi venis por rricevi mian lavitaĵon.

Ĝi estis malgranda, ĉe *patio* situanta loĝejo duĉambra, sed ĉiam regis en ĝi pleno kaj bruo kvazaŭ en *posada*. La patrino de Feliz okupis sin samtempe pri la lavado, la aranĝado de siaj fruktoj, verŝante vinon al la kamaradoj, purigante infanajn nazojn kaj respondante tri, kvar najbarinojn kutime starantajn sur la *patio*. Ludis la radio kaj kelke da milicanoj sidis ĉetable kartludante. El ĉiuj anguloj rampe aperis infanoj, kaj Feliz sidis modeste sur kesto kun iu ajn palnaza fratineteto surgenu. Ne li estis la heroo en ĉi tiu domo, sed lia pli aĝa frato Enrique Martinez, kiu, starante en kavobendo, estis sendanĝeriginta tankon kaj nun kun sia frakasita brako en bandaĝo ĉiufoje denove rakontis sian aventuron al kiu ajn.

La belegaj, senzorgaj aŭtunaj tagoj malaperis en estintecon. Madrid fariĝis sieĝata, malsatanta fortikaĵo; froste malvarmaj ventoj blovis el Sierra kaj en la nehejtataj domoj la nesufiĉe nutrita loĝantaro froste tremis preskaŭ same kiel ni en la tranĉeoj. De kiam mi promociiĝis serĝento, poste oficiro kaj fine kapitano, miaj rilatoj al la soldatoj en la bataliono certe ne fariĝis malpli koraj, sed iasence tamen malpli personaj. Pro mia respondeco pri 140 viroj mi ne povis plu permesi al mi personajn simpatiojn aŭ antipatiojn okaze de forpermesoj, promocioj aŭ ĉe elekto de viroj por danĝeraj patroloj. Serĝento Atanasio Pastor kaŝe ludis kartojn en la tranĉeaj kuŝejoj, kvankam tio estis laŭ armeordono malpermesita; kaj konstante li sciis, eble ne tre honestamaniere eltiri monon el la poŝoj de la kamaradoj. Sed serĝento Pastor estis troriske

kuraĝa kaj mia plej bona maŝinpafilisto; pro tio mi indulgis lin. Jezus Buldiviesi, la ambulanca portisto, longtempe naŭzis min per siaj maldelikataj paroloj, sia indiferenta konduto kaj sia ŝajna malmildecio. Post tiam mi vidis lin, transverse tra la mitrala pafado, transkuranta senŝirman kampon por savi vunditon, kaj poste, kiam la malamiko jam atakis, li revenis la lasta al nia linio kun mortanto sur la dorso. Mi lernis, ke ne la morala konduto taŭgas kiel normo por taksi homojn kaj okazaĵojn, sed unuavice iliaj militistaj utilo kaj signifo.

Estis kutimo, ke vespere niaj soldatoj kaj tiuj de la malamiko, en la kvietaj periodoj inter ofensivo kaj kontraŭofensivo, kantas. Tiam oni vokis: „*No tirad! Vamos á cantar!*” kaj kvazaŭ laŭ interkonsento ambaŭ partioj tiam ĉesigis la pafadon. Kiom ofte en klaraj lunlumaj noktoj mi mem, kvazaŭ ensorĉita, aŭskultis la frivolan pasiecon de l'improvizitaj *flamengos*. Ĉi foje mi kontrolis kiel respondeca pozicia komandanto mian plej antaŭan linion. Plengorĝa, alta voĉo vibre sonis aliflanke en Las Rozas. Nian malgrandan Chato mi vidis staranta en preskaŭ preĝa teniĝo klinita super la parapeto. Lian ĝenerale tipe stratbuban vizaĝon kovris hipnotita, preskaŭ bronza rigido. Fine rimarkante, ke mi staras post li, li flustras: „Tio ne povas ne esti knabo el mia *pueblo*; li kantas la kantojn de Granada!” Lia fusilo kuŝis netuŝata ĉe lia flanko. La unua ajn kaŝe alrampanta maŭro povus ĝin, prenante la tubon, fortiri tra la pafaperturo. Senprokraste mi ordonis pafi en direkto al la kantado. Ne eblas batali, se la viroj tro konscias, ke aliflanke staras ne nur malamikoj, sed ankaŭ homoj.

En ĉi tiu periodo la ekzisto de Feliz ankoraŭ pli ol antaŭe perdiĝis el mia konscio. Mi estis tro okupita, ol ke mi povus rilati kun unuopaj homoj, kaj, kun 48-hora forpermeso en Madrid, mi dormis nun kutime en la kazerno aŭ en „*Alianza*”. Ne restis al mi tempo por viziti la patrinon de Feliz en la

antaŭurbo Puente de Vallecas. Pri li mem mi ricevis raportojn nek bonajn, nek malbonajn. Solafoje li rimarkeblis okaze de instrukcio pri ŝetado de grenadoj. Tiutempe ni uzis ankoraŭ la malnovajn kastiliajn ladajn skatolojn, kies meĉo estis ekbruligenda per cigaredo. La manoj de Feliz tremis, kiam li prenis la skatolon plenigitan per dinamito. Dufoje li tuŝis nerve kaj tro mallonge sian cigaredon sur la meĉon. Kiam la objekto, ĉe la tria fojo, subite eksiblis, li lasis la grenadon pro ektimo fali apud sin. Ĉiuj ni forsaltis kiom rapide ni povis; la grenado eksplodis en la tranĉeo kaj estis kvazaŭ miraklo, ke neniu trafiĝis. Mi envicigis Feliz en la mastrumlaboran grupon kaj ne aŭdis plu ion pri li, ĝis kiam la forpermesa problemo fariĝis konstante pli urĝa.

Nur po du viroj el la cent kvardek povis unu fojon en tri tagoj iri forpermeso al Madrid. Ni elektis ilin el la plej bravaj, la plej fervoraj aŭ el tiuj, kiuj pro tre specialaj cirkonstancoj devis iri hejmen. Ĉiumatene post kolektiĝo Feliz venis al mi: „Kapitano, ĉu vi eble povas diri al mi, kiam mi rajtos iri hejmen?” Ĉiufoje mi devis respondi, ke ne jam venis lia vico. Neniam li insistis, sed senparole iris for; tamen estis videble, ke interne turmentas lin konstante plifortiĝanta sopiro al la hejmo. Mi sciis, kiom multe li amas siajn gefratetojn, kaj mi mem afliktiĝis, vidante lin iafaje, kun letero de la familio en la manoj, apatie tremanta. Eble ĝuste tio estis kaŭzo, ke mi finfine tamen metis lin sur la liston antaŭ ol li havis rajton por tio.

La forpermesotoj anoncis sin. Subite Feliz prenis mian manon kaj kisis ĝin antaŭ ol mi povis ĝin retiri. Li portis jutan sakon sur la ŝultro plenan de panrestaĵoj, kiujn li estis elŝparinta el siaj manĝporcioj. „Nur atentu, Feliz”, mi diris, „memoru, ke nuntempe reveno post fiksita tempo estas severe punata”. Li ridetis, ne respondante, kaj en la kava vojo al la komandantejo kaj la atendantaj ŝarĝaŭtomobiloj mi vidis

lin ankoraŭ plurfoje returnanta sin kaj salute gestanta.

Precizatempe Feliz revenis kaj iris, ne anoncinte sin ĉe mi, tuj al sia *chabola*. Li kuŝis vizaĝsurtere sur la malseka pajlo, plorante, ne manĝinte kaj ne aŭskultante ordonojn. Tiam malesperigon mi jam tiom ofte spertis ĉe miaj homoj, post ricevo de nigraranda letero, ke mi sciis, ke en tiaj periodoj nenio efikas al ili. Ĉu eble Enrique Martinez mortis pro siaj ĝis nun ne tute kuraciĝintaj vundoj? La kamarado, akompaninta Feliz al Madrid, diris al mi: „Ne nur Enrique. Kiam Feliz venis al Puente, la faŝistoj ĵus estis bombardintaj. El la ruinaĵo de lia domo oni elfosis nenion krom kadavroj”.

Konsciante, ke ĉia konsolo ĉi okaze estas vana, mi lasis lin trankvile kuŝanta, ĝis kiam li triatage anoncis sin ĉe mi:

„Kapitano! Mi petas al vi translokigi min el la kompanio al la instrukciejo por *dinamitero!*”

„Sed, kara Feliz, rememoru tiun ĵetgrenadon tiaman; vi ja mem scias, ke por tio vi estas multe tro nerva!”

„Mi jam ne estas la sama, kia tiam, kapitano, kaj mi volas anstataŭi Enrique”.

Kapskue mi konsentis. Oni akceptis lin ĉe la instrukcio kaj mi eksciis, ke li jam ne lasas fali ĵetgrenadojn, sed kun interna furiozo streĉas siajn fortojn. Malgraŭ tio li apartenis ĉe la *dinamiteros* same kiel antaŭe ĉe la trupo, nek al la plej lertaj, nek al la plej mallertaj.

La 8an de julio nia bataliono ricevis ordonon ataki. En nia dekstra flanko la kompanio de kapitano Bodega puŝis sin, furioze kaj preskaŭ ne serĉante ŝirmon, antaŭen. Mia kompanio tamen, trafiĝinte en duflanka pafado, nur tre malrapide antaŭeniĝis. Per mia teleskopo mi vidis, ke la malamikoj ĉe Las Molinas jam fuĝas el la tranĉeoj kaj atendas, ke Bodega ĉiumomente povos okupi la pozicion. Kun du oficiroj li kuris mem antaŭ la trupo, malgraŭ tiurilata ordono. Distance de malpli ol sesdek metroj de la tranĉeo grenado frakasis al li la

krurojn. La kompanio, subite sub nelerta komando de tro juna leŭtenanto, perdis la prudenton kaj retiris sin sennecese. Du malamikaj tankoj aperis el post la fervoja digo kaj metis nin en flankpafadon. Ĉar ni ne havis kontraŭtankajn kanonojn, Manolo komandis la *dinamiteros* kuri antaŭen por reteni la tankojn. Mi vidis Feliz perventre trarampanta fosaĵon al truo apud la *pozo*. En la dekstra mano li tenis preta por forĵeti botelon da benzino, kaj la tanko venis direkte al li. Timante, ke nia dekstra flanko estos izolata, mi ordonis al miaj viroj kuri returne. La tanko rapide alvenis. Subite Feliz levis sin kaj forĵetis la botelon. Proksimume dek metrojn distance de la tanko ĝi falis, eksplodante en fumon kaj flamojn. Antaŭ ol li povis preni duan botelon, ambaŭ maŝinpafiloj de la tanko ekpafis en lia direkto. Momenton poste la monstro trarompis nian linion, sed, ĉar ĝia infanterio ne povis sekvi sufiĉe rapide, la pli multaj el ni sukcesis reatingi la tranĉeon. Tiuvespere ĉe la kolektiĝo evidentiĝis, ke ni perdis okdek virojn de nia bataliono. Iliaj korpoj, inter kiuj ankaŭ tiu de Feliz, kuŝis kvazaŭ nigraj kurbaj linietoj sur neniestereno inter ni kaj la malamiko. La antaŭen direktitaj maŝinpafiloj ĉe la alia flanko malhelpis al ni enterigi la kadavrojn.

La 30an de oktobro, 1937a.

VUNDITOJ.

Henk S., kun kiu mi en Madrigueras kelkan tempon kunestis, rakontis al mi la jenon:

Dum kelke da semajnoj li kuŝis kun venenita makzelo en iu hospitalo, kie oni flegis ekskluzive pacientojn, kiuj bezonis artefaritan nutraddon. La pli multaj perdis pro dum-dumkugloj aŭ grenaderoj la malsupran makzelon kun parto de la parolorganoj. Pro tio regis en la salonoj neinterrompita silen-

tado. Ilia kuraciĝo estis longedaŭra martireco; ĉiutage la kuracistoj tranĉis malgrandajn pecetojn da karno el la gluteoj por surfiksi ilin sur la vizaĝon, por ke tio fine elkresku kiel ŝajnmakzelo. La kruda ruĝa karno havigis al iliaj vizaĝoj abomenindan aspekton. Multaj alilandanoj kaŭzis per sia nerveco ĝenon al la flegistinoj aŭ, image prezentante al si malserenan perspektivon, forkaŝis sin kvazaŭ malsanaj bestoj.

La hispanaj soldatoj, kiuj grandparte estis ankoraŭ tre junaj, eble jam en sia plej frua junaĝo kutimiĝis suferi malsaton, malvarmon kaj mizeron kun ia fatalismo. Kiam ili sentis sin iom pli bonaj, ili iris sur la terason aŭ sidis kune sur litoj ludante senfine domenon aŭ loton. La ĉefflegistino, kiu estis modela virino, venis ĉiutagmeze por kvaronhoro en la salonon kaj rakontis spritaĵojn.

„Tiam”, diris Henk, „ne eliĝis sonoj el iliaj buŝoj, sed sur la brilantaj okuloj oni povis vidi, ke ili interne ridas. Kiam poste la flegistino venis al iliaj litoj, ili penis esprimi per nura, kortuŝe helpbezona gesto la sincerecon de sia danko”.

Ĉu ne ververe ĉiuj vunditoj estas tiaj helpbezonaĵoj homoj plenkonfide sin donantaj al ni, post kiam ili antaŭe faris por siaj kamaradoj ĉion eblan? Ĉu humana Eŭropo povas laŭvere diri, ke ĝi plene plenumis sian devon koncerne la vunditojn en Hispanio, kiujn, kiel ajn oni deziras juĝi pri iliaj ideoj, tamen certe ne inspiris egoismaj celoj.

Ni scias, ke la oficiala Ruĝa Kruco jam dekomence tute malplenumis sian devon koncerne registaran Hispanion. Ni scias kontraŭ kiom grandegaj malfaciloj devis batali la rekonstruantoj de l'hispana sanistaro pro tio, ke oni en la antaŭaj hospitaloj povis disponi nur pri monaĥinoj kiel flegistinoj. En la internacia sanistara servo la konataj kuracistoj d-ro Tegelen, d-ro Walter Blanck kaj d-ro Max Hodann, kune kun internacia stabo da entuziasmaj junaj kuracistoj, faris preskaŭ miraklojn.

La social-demokratio fondis „Onteniente” kaj la skandinavaj landoj kolektis milojn da kronoj por aranĝi en Alcoy la plej bonan hospitalon de Hispanio. La alfluo de vunditoj kaj malsanuloj tamen kreskis konstante.

La nederlanda hospitalo en Villa Nueva de la Jara diferencas de tiu en Alcoy kaj de „Onteniente” per tio, ke ĝi fondiĝis sen ia ajn financa helpo el Nederlando mem. Ĝi fondiĝis el la kolektiva idealismo de kelke da nederlandaj kuracistoj, flegistinoj kaj la politika komisaro, kun la plej sindona kunlaboro de l’hispana registaro. Ĝi disponas pri stabo da nederlandaj medicinistaj kaj tehnikaj helpantoj, nederlandaj administrantoj, kuiristoj, ŝoforoj kaj kantinistoj, kiuj dum kelke da semajnoj pruvis kion kapablas efektiviĝi nederlanda organiza talento, nederlanda persistemo kaj sincera nederlanda kamaradeco.

Komence la hospitalo de Villa Nueva funkciis sub direktado de maljuna germana kuracisto, kiu konsideris ĝin ekskluzive kiel ian riparejon de homaj korpoj. Kiel tiu ĉi domo, granda kastelo de iu iama grafo, ĉiam staris rigide kaj malamike en la vilaĝo, tiel ankaŭ nun ne ekzistis iaj rilatoj inter la vilaĝanoj kaj la flegatoj. Ekstremokaze la lastaj, kiom ili almenaŭ povis iri, vizitis kelkfoje la trinkejojn, kie ili ebriigis sin. Malgraŭ la bonega medicina zorgado regis en la salonoj ekscitite deprimita atmosfero.

D-ro Voet, kiu jam kiel ĉefkuracisto de la centro Albacete meritis sian famon, tuj montris alian koncepton pri siaj devoj. Li malfermis la pordojn al la ekstera mondo kaj lasis en la grafajn salonojn brili la sunlumon de nova espero.

„En hospitalo tria en Albacete”, li rakontis al mi, „ni flegis junan nederlandanon, kies kruro, supergenue amputita, ripetfoje komencis pusi. Nenio povis deprimi lin. Ĉiumatene li prenis siajn lambastonojn kaj iris de lit’ al lito por rekuragiĝi

la aliajn. Tiu junulo mem trovis la plej certan vojon al rekuraciĝo. La necesan volon al rekuraciĝo povas trovi nur tiu, kiu konscias, ke li ne estas nur helpobezona kadukulo, sed ke lia vivo ĉiam ankoraŭ povos havi valoron por aliaj”.

Kiam li rakontis tion, mi rememoris junan hispanon, kiun mi antaŭ kelke da tagoj rimarkis en la hospitalo. Li estis belstatura viro perdinta unu brakon; kaj nun en la konversaciejo li oftege ludis melodiojn, unufingre serĉante la klavojn sur la piano. Ĉe tio li ofte ĝemspiris profunde, kvazaŭ la klopodoj estis tre malfacilaj, sed brila rido heligis lian tutan vizaĝon, kiam fine li sukcesis trovi la melodion. Kvankam nin ĉiujn tiu frapmuzikaĉo komencis tedi, neniu el ni, jam vidinte lian ĝojon, havis kuraĝon atentigi lin pri tio.

Ĉar la pli multe da flegistinoj ni elektis el la kamparanaj knabinoj de tiu vilaĝo, d-ro Voet tuj komencis organizi kurson por instrui al ili legadon kaj skribadon. Antaŭ kelke da tagoj preterpasante la kursejon, mi vidis tie, ke la sama junulo instruas la knabinojn. Lia vizaĝo estis ankoraŭ pli radia kaj feliĉa ol ĉe la piano; li ŝercis kaj ridis senĉese kaj malgraŭ tio li montriĝis bonega instruanto.

„Tia estas efektive la nuna stato”, diris d-ro Voet, „kompreneble ni fieras ankaŭ pri kelkaj medicinaj pliboniĝoj, kiujn ni povis enkonduki, ekzemple nian solarion por pulmotuberkulozuloj. Sed ĉefafero estas, ke miaopinie ni sukcesis rehavigi al niaj pacientoj kontakton kun la vivo”.

Dum la tempo, kiam mi estis flegata en Villa Nueva, mi havis okazojn por konstati, ke li ne troigis. De malsupre ĝis supren la malsanulejo estis kvazaŭ abelujo de vivo. Tuj sub la tegmento pentristoj kaj reklamdesegnistoj estis aranĝintaj laborejon por prepari afiŝojn, devizojn kaj pentraĵojn por la vilaĝa biblioteko, la soldata hejmo kaj por ornami la stratojn. Vespere kvarkelke da knaboj el la vilaĝa junularo venis tien por lerni desegnadon. Sur la vendoplaco, kie oni konstruis tribunon

destinitan por festi la datrevenon de l'Internacia Brigado, stumple iris aŭstria ĉarpentisto. La antikvan parte maŭrastilan preĝejon sur monteto oni riparis, aranĝante ĝin kiel klubojon. Vandaloj estis senkapigintaj belan renesancan skulptaĵon de Maria, kaj antikva, manskribita gregoria religia muzikaĵo kuŝis piedpremita post la orgeno. Unuavice ni savis kaj eldangherigis tie ĉion ankoraŭ saveblan. Kelkaj kamparanaj knaboj helpantaj nin en tio, diris kun kulpokonsciaj mienoj: „Ni ja ne sciis, ke tiuj objektoj havas ian valoron!” Efektive, kiu ja iam instruis al la malriĉuloj, konscii la valoron de l'arto? Tiu fakto inspiris ĉeĥan leŭtenanton helpe de l'ilustrita historia verko de Voet fari prelegon por la vilaĝa junularo pri la arto en Hispanio. Ĉiuj aŭskultis tre atente. Sian efektivan kulminon — kiel oni povis vidi en iliaj okuloj — la vespero atingis nur, kiam, post la prelego, oni preparolis kiel aranĝi la preĝejon kulturdomo kaj la unuan miksitan balon, kiun ni intencis okazigi tie.

Samtempe kun tiu balo ni intencis aranĝi muzikprezentadon kun kanthoro. La orkestrestro estis juna germano, kiu antaŭ mallonge diris al mi: „Mi povas vivi ankoraŭ nur mallongan tempon; la kuglon troviĝantan tuj sub mia koro oni ne povas forpreni, kaj pro la plumbo mia sango malrapide, sed certe veneniĝas”.

Infanoj . . .

Ne ekzistas amikeco pli intima ol inter soldatoj kaj infanoj, inter infanoj kaj vunditoj.

Ni montras al ili la portretetojn, kiujn ni kunportas: „Rigardu, ankaŭ mi havas tri filinetojn en Nederlando . . .”

Apud mi indiferenta Piet diras kun maldelikata voĉo: „Ĉu vi vidis tiun bubon tie, tiun malĝentilan knabaĉon? Li similas precize mian frateton en Nederlando . . .”

Eble ni tamen diras senparole en ni mem: „Ĝuste por tiu ĉi

junularo ni batalas; tiuj ĉi infanoj vivos, kiam ni estos jam mortaj; tiuj ĉi infanoj daŭrigos la batalon por nia idealo, ankaŭ kiam ni estos pereintaj”.

Sed volante ne ŝajni sentimentalaj ni laŭte diras nur: „Kiom damne belajn okulojn ili havas tie ĉi . . .”

Jam la unuan vesperon nia energia komisaro Tim kunvokis kunvenon de la delegitoj el ĉiuj salonoj, kune kun la vilaĝestro, la instruistoj kaj la estraroj de la tri junulaj organizoj (maldekstre respublikana junularo, unuigita socialista-komunista kaj anarhiista junularaj movadoj). En unu horo ili interkonsente konstatis, ke la stato en la lernejoj estas netolerebla por vilaĝo sub respublikana registaro. Ekzistis klasejoj kun okdek infanoj, preskaŭ sen lerniloj, en malhejmeca antikva monaĥejo; tio estis nepre ŝanĝenda!

Tuj d-ro Voet proponis korpe ekzameni la tutan lernejan infanaron. Dum tuta tago flegistino Annie asistis lin, palpante la ripojn de l'infanoj kaj butonumante iliajn pantalonetojn. Dume helpekspedicio de naturamikoj estis jam survoje por kulturprepari, helpe de l'infanoj, lernejan ĝardenon. Alia grupo, provizita per grandaj penikoj, kvazaŭatake okupis la malnovan stalon por ŝanĝi ĝin en gimnastikejon. Monkolekto inter la pacientoj rezultigis sufiĉe da mono por plensarĝi en Valencian ambulancan aŭtomobilon per atlasoj, libroj, kraĵonoj kaj kajeroj.

Mi ne povis ne kiom eble plej baldaŭ viziti ĉi tiun lernejon, pri kiu parolas la tuta hospitalanaro. La plej alta klasejo enhavanta proksimume kvindek infanojn (la ceteraj nun hejme helpas en la safranrikolto) estas malluma, malalta koridor-salono kun tri profunde enmuraj romanstilaj fenestroj. Antaŭ la klaso staras don Alfonso, aristokrata figuro kun palaj vangoj de tuberkulozulo. En la klaso regas modelaj ordo kaj kvieto. Ĉar la instruisto sola ne kapblas plenumi sian taskon, kelkaj

el la pli aĝaj knaboj helpas la malpli aĝajn. Kiam la instruisto trairas la klasejon por montri al mi la infanan laboron, oni sentas kortuŝon, vidante kiom multe la infanoj amas lin. Precipe la etuloj karese premas sur lin siajn kapetojn kaj kiam li ekiras for, kelkiu petole prenas lian manon. La laboro aspektas tre neta kaj mi miras pri la temoj, kiujn la instruisto ĉi tie jam pritraktas kun la infanoj. Kiam mi volas foriri, don Alfonso petas al mi — ili ja ĝuste okupis sin pri la historio — ĉu mi bonvolu rakonti al la klaso iom pri la historio de l'okdekjara milito rigardata per niaj okuloj. Pro tio mi ekhavas, post interrompo de multaj jaroj, la sensacian senton denove esti instruisto, sed nun antaŭ klaso hispana! Tamen la plej granda surprizo atendis min, kiam mi, post finiĝo de la leciono, trairis la longegan koridoron al la iama manĝejo nun aranĝita por la klaso de la plej malgrandaj infanoj. Subite la lumo el ĉiuj flankoj brilfluas al mi renkonte; ĉi tie oni evidente ne atendis ĝis helpo de l'Internacia Brigado!

La en hela koloro pentritaj vandoj estas ornamitaj per desegnaĵoj, flagetoj kaj girlandoj.

En la fundo de l'salono staras ia kristnaska arbo, kiun la knabinoj ornamas, pendigante sur ĝin ĉiuspecajn mem faritajn objektojn.

Antaŭ la fenestroj staras floroj kaj akvarioj kaj sur kelke da pentritaj bretoj staras ĉiaj figuroj el argilo modelitaj de la infanoj mem.

Ĉirkaŭ la malgrandaj tabletoj sidas la infanoj po kvar kaj ili okupas sin tiom serioze pri sia laboro, ke nur kelkaj el ili rimarkas mian eniron.

„Sed tio ja estas Montessori-metodo!”

„Ne precize”, diras la blonda instruistino kun rideto iranta al mi renkonte, „por tio mankas al ni la instruiloj; pli ĝuste ĝi estas miksaĵo el diversaj sistemoj adaptiĝanta al la ĉi lokaj cirkonstancoj”.

Ravita mi rigardas la feste ornamitajn kajerojn. „Sed tiu laboro estas belega!” Sendube ŝi ruĝiĝis pro plezuro. „Mi ĝojas, ke vi diris tion. Ankaŭ la aviadileja komandanto kun sia adjutanto vizitis nin kaj ankaŭ li estis tre kontenta, sed mi kredas tamen, ke vi estas pli kompetenta pri pedagogio!”

„Mi mem estis instruisto”.

„Tion mi konstatis el la maniero, laŭ kiu vi prenis la kajerojn”.

Kaj nun mi kompreneble devas ankaŭ admiri malgrandan Domingo, la geniulon en kalkulado, kaj Pepita, kiu scias tre bele deklami, kaj la desegnaĵojn de José, kiujn oni sendos al la ekspozicio de infana lerneja laboro en Barcelona.

Oni ne bezonas esti kompetenta por konstati, ke la rezultatoj ĉi tie atingitaj multe superas mezvalorecon.

„Kiel, pro Dio, vi sukcesas en tio, kun tiom multe da infanoj?”

Ŝi montras al mi du simple vestitajn virinojn irantajn de unu tableto al alia por helpi la infanojn. „Ili estas du vilaĝaj knabinoj, kiujn mi mem edukis kaj al kiuj mi pagas el mia salajro”. „Ho, ne kredu”, ŝi rapide aldonas, „ke tio estas ofero miaflanka; tiu ĉi lernejo ja reprezentas ĉion en mia vivo. En mia junaĝo, kiam mi deziris fariĝi instruistino, miaj gepatroj kontraŭis tion, ĉar knabino en nia popolklaso ne bezonis labori. Tamen mi persistis, forlasis la hejmon, per tio ĉesigante la rilatojn kun familio kaj ĉiuj miaj gekonatoj. Tuj post mia ekzameno mi venis tien ĉi kaj alian deziron krom resti tie ĉi mi ne havas. Kial ja infanoj aliurbaj estus pli amindaj ol tiuj ĉi? La gepatroj havas fidon pri mi, kaj kiam dimanĉe mi ekskursas en la montaron, min kutime akompanas deko ĝis dek-kvino da infanoj”.

Reveninte en la hospitalo mi rakontas pri la lernejo al iu kataluna milicano, kun kiu mi amikiĝis.

Li interrompas min:

„Mi ne havas plu fratetojn”, li diras.

„Kion vi aludas per tio?”

„Mi estis en Barcelona, kiam oni bombardis la urbon. Konjekteble oni informiĝis per siaj spionoj, ke ĉiuj niaj ĉasaviadiloj estas ĉe la fronto en Aragono. Kompreneble la bombardistoj ne riskis flugi super la urbocentron defendatan per kontraŭaviadilaj kanonoj. Ili flugis super nia kvartalo, antaŭe la grandaj bombardiloj kaj nur poste la ĉasaviadiloj. La trimotoraj maŝinoj ĵetis bombojn po kvincent kilogramoj, per kiuj konstruaĵoj sesetaĝaj detruigis kvazaŭ paperaj skatoloj. Kiam ĉiuj loĝantoj panike kuris sur la straton — kaj vi scias kiom larĝaj kaj rektaj la stratoj estas ĉe ni — venis la ĉasaviadiloj flugante tre malalte kaj per maŝinpafiloj oni pafadis en la rifuĝantan loĝantaron. Preskaŭ duonan horon mi kuŝis ventre en la defluilo, ĉar la aviadiloj senĉese revenis. Subite mi ekaŭdis kriojn, pro kiuj mi malatentis ĉiom da danĝero:

„Ili bombardas la lernejon de San Pablo!”

En tiu lernejo troviĝis miaj fratetoj! Ne ekzistis dubo, ili flugis malalte, cirkle, por ĉirkaŭi la konstruaĵon. Antaŭ ol mi povis atingi ĝin, ili jam sukcesis trafafi. Supozeble tiumatene ducent infanoj estis mortigataj aŭ vundataj. Inter ili ankaŭ miaj fratetoj, sed nur de du el la tri ni trovis la kadavretojn . . .”

Neatendinte mi estas revokata al Albacete, kie oni informas min, ke mi ekhavos forpermeson por propaganda vojaĝo. Samokaze mi akceptas ordonon de la stabo, ke mi, kiel transportkomandanto, akompanu grupon da tridek militinvalidoj al Paris.

En Posada del niño ili atendas min, unuavide kompatinda grupo da homaj ruinoj. Du el ili estis perdintaj ambaŭ krurojn, pluraj po unu brako, aliaj perdis okulon aŭ jen kaj jen trem-skuis tutkorpe rezulte de grenadpuŝego. Ĉiuj estis nervemaj,

malvarmaj en la malhejma *posada* kaj senpaciencaj, ĉar la trajno, kiu estis alvenonta noktmeze, malfruis pli ol kvar horojn. Kiam fine ĝi enveturis la stacidomon, evidentiĝis, ke la vagonon destinitan por ni oni survoje plenigis per virinoj kaj infanoj evakue senditaj el Madrid. Mi rigardis la malgrasajn, pro laceco kadukiĝintajn vizaĝojn, la dormantajn infanojn kaj la mizerajn pakajojn, sed spite al tio mi ne vidis alian solvon krom sendi ilin al la posta ŝarĝvagono ankoraŭ preskaŭ tute malplena. Tiumomente mi ekkonis miajn novajn soldatojn. Kiam mi ankoraŭ interkonsentis kun la stacidomestro, juna ĉefo parolis kun grupo da aliaj. Jen li venas al mi: „Kapitano, tiujn senkrurulojn ni enportu ĉi tien, sed por ni la ŝarĝvagono estas eĉ pli vasta; tiujn virinojn lasu tie . . .”

Kiam mi, sukcesinte havigi al mi kelke da faskoj da pajlo, fine saltis en la vagonon, ankoraŭ ĝuste antaŭ ol la trajno ekmoviĝis, la invalidoj jam estis aranĝintaj sin inter la pakajoj kaj sidis, kantante el nia internacia kantaro, dum kiam unu el ili per elektra poŝlanterno lumigis la paĝojn.

Tiu ĉi unua impresio pri homoj rompitaĵoj kvankam korpe, sed malgraŭ tio ne spirite, konfirmiĝis dum la tagoj, kiujn mi pasigis kun ili. Kaj tamen tio estis ĉiurilate abomenindaj, diable malfacilaj tagoj.

Jam en Valencia, kie ni esperis tuj vojaĝi plu al Barcelona, komenciĝis la malagrablo. Ĝuste en tiuj tagoj, kiam okazis nia granda ofensivo apud Fuentes del Ebro kaj nia antaŭgvardio jam okupis la nordan stacidomon en Zaragossa, la naturo malhelpis niajn planojn.

Torenta pluvego ŝveligis la riverojn dum malmultaj horoj, ruinigante pontojn kaj tutajn vilaĝojn kaj detruante en la Ebro-ebenaĵo la rikolton, brutarojn, la vojojn kaj eĉ la fervojon. Ĝuste en la tempo, kiam la registaro ŝanĝis lokon, la rekta trafiko inter Barcelona kaj Valencia estis dum pluraj semajnoj interrompita. Kelkan tempon minacis la danĝero, ke la mal-

amiko utiligos tiun ĉi situacion, projektante el Majorca atakon al nia marbordo. La ofensivo ĉe la fronto haltis, rezervaj trupoj prokrastiĝis, kanonoj kaj municio fiksiĝis en la koto, tutaj tranĉearoj forviŝiĝis, kvazaŭ ili neniam ekzistis antaŭe.

Pro tio ni sidas dum horoj en la stacidoma atendejo en Valencia, kie neniu lito restis neokupita, ĉar sammatene alvenis el Gijon ŝipo kun pli ol sesmil rifuĝintoj.

Fariĝas tagmezo, vespero, nokto kaj nur tiam mi fine sukcesas atingi, ke oni akceptas nin kun — mi volonte aldonu: nesupereblaj afablo kaj zorgo, en hospitalon malproksime ekster la urbo.

Ni troviĝas tie unu, jam du plenajn tagojn; niaj soldatoj sopirantaj iri hejmen, fariĝas malpaciencaj kaj nervemaj, sed ankoraŭ daŭre la fervojo kuŝas diversloke kelkmetre sub la akvo.

Ne sciante alian solvon, ni decidas iri per du grandaj francaj ŝarĝaŭtomobiloj laŭ la kvarcent kilometrojn longa nereкта vojo tra Aragono.

Sed jen, en la unua montpasejo, kiun ni trairas, difektiĝas la motoro de nia dua veturilo. De nun ni devos treni ĝin kaj la viroj en la unua veturilo sidas enfermitaj sen lumo kaj sen eblo elrigardi, kaj ambaŭ veturiloj tremas kaj skuiĝas pro la subita tiro de la ĉeno. Tiel ni rampas plu, preter profundaj ravinoj, ofte trovante, kiel pleniĝon de l'malfeliĉo, la vojon dum horoj barita per ĉiaj transportoj.

Nokte, veninte en vilaĝo, mirige trankvile kvazaŭ pende fiksita sur monto, mi grimpas tra la preskaŭ vertikalaj stratoj, serĉante litojn por miaj kamaradoj, kiuj frostotreme atendas en la veturiloj. Unu el ili estas trafita per pafado en la stomakon kaj devas trinki varman lakton, sed nenie ni povas ricevi lakton. Vundojn ni devas purigi, kontroli kaj bandaĝi, sed la flegisto nin akompananta kalkulis koncerne la bandaĝojn ne pri

vojaĝo tiom longedaŭra. Matene kaj posttagmeze mi devas, kun la magistratestroj de la vilaĝoj trapasataj, eliri por serĉi nutraĵojn, sed tra tiu ĉi cetere tre izolita regiono jam pasis miloj da soldatoj, kaj de la terkulturistoj ni nek per mono, nek per afabla peto sukcesas akiri ion. Aŭ pli ĝuste nur per petoj, ĉar parolinte sufiĉe longe pri miaj vunditoj, mi tamen preskaŭ ĉiufoje fine sukcesas aĉeti kelke da ovoĵoj, aŭ kuniklon fakte jam rezervitan por propra konsumo, kvankam mi konfesu, ke tiuokaze mi kelkfoje, kontraŭ tiurilataj ordonoj, superpagis la oficialajn maksimumajn prezojn. Sed kion faru korva patro, sciante, ke la idoj atendas kun malfermitaj bekoj? Kaj se mi pripensas, ke la vundoj de la juna ĉeĥo, kiuj post sepmonata flegado en hospitalo fine cikatriĝis, denove malfermiĝis! Pli ol kvar tagojn ni bezonis por traveturi tiujn malavantaĝajn kvarcent kilometrojn al Barcelona. Fine, ĉe Cerbère pasante la limon, mi diras al flandra Jan, kiu estis perdinta ambaŭ siajn kruojn: „Jen, por vi la batalo finiĝis”.

Riproĉe li rigardis min.

„Ne, kamarado”, li respondis, „la batalo daŭros plu”.

La 7an de novembro, 1937a.

ADIAŬO.

En hotelo Majestic ĉe Paseo de Gracia regas la atmosfero de aristokrata centro-londona hotelo. Senbrue funkcias la kelneroj kaj senbrue loĝas la gastoj. Ministroj aŭ konsuloj kun kalvaj kapoj forte premas sub la brakoj vaksbrilajn dokumentujojn, en kiuj konserviĝas la sorto de l'mondo. Malalte dekoltitaj sinjorinoj faras komplikitajn manipulojn per lipkolorigilo kaj pudro. En la halo la telefonĉeloj neniumomente estas neokupitaj; armeeto da ĵurnalistoj ĉi loke starigis sian

bivakon; konstante oni vidas ilin interparolantaj kun gravaj personoj, el kiuj ili penas informiĝi, kio ĝuste okazis en la interno de la lando. Kontraŭ la multo da oro de l'generalaj uniformoj mia eluzita kampuniformo faras mizeran kontraston kaj la civila vestaĵo, kiun mi ĉi matene mezurigas al mi, povos esti preta nur post dudek kvar horoj.

Kun kapitano Smircka, kiu, kvankam dek-unufoje vundita, tamen estas ankoraŭ unu el la plej aktivaj oficiroj en la stabo de l'Internacia Brigado, mi iras en la urbon. Por sia edzino li deziras aĉeti kelke da luksaj objektoj, kiujn mi povos kunporti. Pri manko je elekteblo ni ne bezonas plendi. Mi estas mirigita pri la nekredebla lukso kaj precipe ankaŭ pri la belgusto en la grandaj magazenoj. Al ĉiuj sinjorinoj dezirantaj lukse vesti sin mi forte rekomendas butikumadon en Barcelona. Ili konstato, ke koncerne modon kaj belguston Barcelona neniurilate malsuperas Paris.

Aŭtobuso duetaĝa veturigis nin al agrablasfera Rambla. Ĉiuj kafejoj estis plenaj kaj en la restoracioj ni konstatis, ke preze de dudek ĝis tridek pesetoj oni povas ankoraŭ tre bone manĝi. Ŝupolurigisto malakceptis la krommonon, kiun mi volis donaci al li. Kiel mi ja povis forgesi, ke la ŝupolurigistoj ĉi tie estas organizitaj kaj ke oni laboras nur laŭ tarifoj!

Efektive, preze de dudek ĝis tridek pesetoj oni povas en Barcelona ankoraŭ tre bone manĝi. Nur pano, la hispana popola nutraĵo, ne estas aĉetebla; kaj laboristo sen firma laboro supozeble gajnas ne multe pli ol dek pesetojn ĉiutage. Surloke, kie la kloakoj enfluas en la maron, mi vidis knabojn dekdu- ĝis dek-kvarjarajn, starantajn nudkrure en la jam malvarma akvo; la tutan tagon ili serĉkolektis tie metalrestaĵojn en la koto. Iliadire tio havigas, kun iom da feliĉo, eĉ du pesetojn ĉiutage.

Rememorante la brile belegan strandon de Valencia mi

informiĝis pri Playa. Pasinte inter kvazaŭa senfinaĵo da fabrikoj kaj magazenoj, mi atingis kadukan ŝtuparon kondukantan al mallarĝa strio de sablaĵo. Sur tiu ĉi mallarĝa strio inter strandmuro kaj maro staris domaĉoj . . . Jam en Valencia la aspektoj de la domoj kontraŭe al la hospitalo, en kiun oni gastigis nin, faris al mi tre apartan arĥitekturan impreson pri la hispana malriĉo.

En Madrid mi ekkonis la laboristajn domojn de l'antaŭurboj, kun argila planko, sen fenestroj, sen kloako kaj sen kameno.

En Cuenca mi vidis ĉiuloke la kavernajn loĝejojn, elhakitajn en la montflankoj.

En Valencia tio estis ŝajne ebenaĵo, konstrue okupita ekskluzive per kamentuboj. Pli proksime rigardante oni trovis inter tiuj kamentuboj profundajn deklivajn kavojn, kondukantajn al la enirejoj de loĝejoj. Kelkloke vidiĝis metalretaĵo etendita super kvadrata kavo: korteto. Enfose en la roka tero estis aranĝintaj sin homoj kvazaŭ talpoj aŭ kunikloj. Se ni transkalkulus la laboron en salajron, ĉiu el tiuj ĉi domoj sendube kostus kapitalon; sed tiuj, kiuj konstruis ilin, ne pagis salajron al si mem kaj, ĉar la roka tero povas servi kaj kiel muro kaj kiel tegmento, oni kalkulis nur pri ŝparado de materialoj. Ĉar oni ne venigas kuraciston okaze de malsaneco, ankaŭ kuracista kalkulo pri reŭmatismo kaj tuberkulozo ne ŝarĝas la budĝeton.

Tiuj ĉi subteraj kavernoj kaj eĉ la loĝveturilaroj de l'ciganoj ŝajnis al mi kvazaŭ palacoj kompare kun la domaĉoj sur la strando de Barcelona, ofte minacataj de maruraganoj. La duone putrintajn tabulojn aldrivigis la maro, la tegmento konsistis el platigitaj konservujoj, la fenestroj el fragmentoj de vitro, krom kio la truoj estis glufermitaj per papero.

Al la homoj ĉi tie loĝantaj la nomo „malsuperaj homoj” ŝajnis efektive aplikebla. Vestitaj per ĉifonoj, malpuraj kaj malzorgitaj, kun haroj nekombitaj ili kuŝis kaj sidis antaŭ siaj pordoj.

Pasis kelka tempo, ĝis kiam mi, instigita de scivolo, decidis malsupreniri en ilian strateton. Ili rigardis min kiel malamikan fremdulon. Ĉi tie neniu levis la pugnon, nek diris „salud”.

Kiam mi, veninte ĝis la fino de l' strateto, returnis min, mi trovis barita la reiron al la ŝtuparo. Meze en la strato eksplodis subite forta interbatado, pleniganta la aeron per krudaj krioj kaj blasfemoj. Du junaj viroj kun dispendantaj ĉemizoj atakis sin reciproke, kaj ĉiumomente mi atendis, ke ili elpoŝigos tranĉilojn. Knabo dek-dujara saltetis plorkriante ĉirkaŭ ili, penante ŝeti ŝtonojn al la atakinto de lia frato. Kelke da virinoj kuris al mi plore kriante: „Ay, *madre* mia, kapitano, volu do helpi, por ke ili ne mortigu sin reciproke!” Subite mi trovis min, ĉar lasinte mian revolveron hejme, en la malagrabla situacio de policisto sen armilo. Ĉu mi ne riskus, ke la tuta loĝantaro de tiu strato turnos sin kontraŭ mi, se mi intervenus, miksante min en ĝiajn aferojn?

Mi ankoraŭ ne scias, kiel mi sukcesis fari tion; kiel ajn okazis, subite mi staris inter la du batalantoj, kiujn la virinoj retenis; kaj mi diris proksimume, ke en tiu ĉi tempo ni havas efektive aliajn devojn krom kapti unu alian ĉe la kolo. La atakinto retiris sin ŝultroleve kaj insultante, sed la malgrandan frateton oni devis aparte sendanĝerigi, ĉar li postkuris lin por denove ataki lin per ŝtono. La alia junulo, kiun mi retenis, ŝajne jam ne povis regi la nervojn; hurle kriante pro furiozo li alvokis ĉielon kaj inferon kiel atestantojn: „Mi ne estas forkurinto, sinjoro kapitano, kiel asertis tiu kanajlo, mi ne estas forkurinto; mi povas montri al vi la dokumentojn, kiuj pruvas, ke mi estas malakceptita nur pro miaj malsanaj pulmoj!”

Revenante al hotelo Majestic mi trovis okazon por detale pripensi la diferencon inter la rusa kaj la hispana internaj militoj. La reakciaj skribsklavoj malpravas, senĉese babilante pri ruĝa Hispanio. Ili ne bezonas maltrankviliĝi; ilia kapita-

lisma „ordo”, kun la necesaj diferencoj inter riĉo kaj malriĉo, ankoraŭ daŭre ekzistas en Barcelona. La hispana popolo ne jam defendas la rezultatojn de socia revolucio, sed ekskluzive sian esperon pri la estonteco, kiel ankaŭ la esperon de l'homoj malsuperaj, kiuj volas fariĝi homoj veraj.

Tiom longe staris nia trajno en Port Bou, ke ŝajnis al mi, ke oni nepre volas atendi ĝis kiam venos la ĉiutagaj bombardaj aviadiloj de l'faŝistoj. En la atendejo la tuta meblaro kun ĉiuj boteloj de l'ama bufedo estis disfrakase detruita per aviadila bombo. Sur la vandoj tamen pendis ankoraŭ, tute sendifektaj, la reklamafiŝoj de Lissone:

„Go to Spain and have a different holiday!" 1)

„Spain . . . The romance of the east with the comfort of the west". 2)

Kaj sube en germana lingvo:

„Besuche Spanien . . . , Tausend Wunder warten auf dich!" 3)

Mi ridetis; tiujn ĉi admirindaĵojn jam ekkonis la germanaj dungitoj apud Guadalajara, ĉe Brunette, Berchite kaj Quinto!

Transverse super la perono pendis ankoraŭ alia tukafiŝo, sur kiu la ruĝa koloro jam komencis flaviĝi:

„Hommes libres du monde entier, soyez les bienvenus chez les peuples libres d'Ibérie!

La Catalogne et l'Espagne vous saluent!" 4)

1) Vizitu Hispanion kaj vi havos varian ferion! Trad.

2) Hispanio . . . La romanesko de oriento kun la komforto de okcidento. Trad.

3) Vizitu Hispanion . . . , mil admirindaĵoj atendas vin! Trad.

4) Liberaj homoj de la tuta mondo, estu bonvenaj ĉe la liberaj popoloj de Iberio!

Katalunio kaj Hispanio salutas vin! Trad.

Liberaj homoj el la tuta mondo venis al Hispanio por helpi la hispanan popolon en ĝia batalo por libereco kaj estonteco. Tio estas efektive admirindaĵo, konstatebla nur en Hispanio. Admirindaĵo valoranta la klopodojn!

POSTPAROLO.

Tiu ĉi verko estas verko pri Hispanio; ĝi pretendas esti verko de batalanto, kiu eĉ nun ne por unu momento formetas la armilojn. Ĉe la fronto de l'homaro batalas la hispana junularo por la libereco kaj ĝia batalo decidus pri la sorto de Eŭropo.

Ni fidas, ke ĝi triumfos; sed eĉ se, pro ankoraŭ pli grava perfido de la demokratiaj ŝtatoj, aŭ pro ankoraŭ pli imperinenta subtenado de la diktatoraj ŝtatoj al Franco, ĝi estus kondamnita al provizora pereco, ĝia batalo ne restus senrezulta. Same kiel la Parisa Komuno ĝi servus tra la jarcentoj kiel perspektivon montranta kaj entuziasmiga ekzemplo al la laborista klaso. La proletaro agnoskas kiel verajn malvenkojn nur tiujn, kiuj perdiĝis senbatale.

Ni, kiuj ekkonis la profundan entuziasmon kaj la gigantan rezistopovon de la hispanaj kamaradoj, eĉ ne unu momenton kredas, ke la batalo malgajniĝos. Sed pri kio ni estas certaj, tio estas, ke nuntempe neniu ofero povas esti tro granda kaj neniu ago tro forta por helpi la kamaradojn ĉe la fronto en ilia batalo. Necesas, ke la tuta mondjunularo unuiĝu en la batalo por la estonteco. Ne en ia ajn oportunisma unuiĝa fronto kaŝiĝas la solvo, nek en kvara internacio klopodanta interpreti nur la malnovajn dogmojn alisence. Nia unuiĝa fronto estu tia, ke ĝi ampleksu ĉiujn, kiuj sentas sin kamaradoj; malgraŭ la diversaj partioj, al kiuj ili apartenas, ĉiujn, kiuj pretas sen profitavido kaj senkondiĉe batali la batalon; ĝi estu la unuiĝa fronto de ĉiuj, kiuj konscias, ke nia plej forta armilo estas la vero. Nur per tia unuiĝa fronto eblos rompi la faŝismon,

ne nur kiel materialan potencon, sed ankaŭ ĝian ĉion infektantan, pereigan spiriton, kiu disigas rasojn kaj popolojn anstataŭ voki ilin al reciproka amo.

Ni regajnu la rajton pri amo, la rajton pri konvinkiĝo propra, la rajton pri respekto, eĉ por la malamiko, se ni konvinkiĝis pri lia sincereco.

Ni fariĝu birde liberaj en tiu senco, en kiu birdo estas libera ¹⁾.

JEF LAST.

1) La nederlanda esprimo „birde libera” havas specialan signifon, ne la ĉi loke celitan: libera kiel birdo, sed: ekster protekto de la leĝo, proskribiita. Trad.

RIMARKOJ DE LA LITERATURA KOMITATO.

La tasko de „Literatura Komitato”, fondita de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo, estas konstrua, aŭ pli ĝuste: rekonstrua. En jam aperintaj verkoj oni povas nur kritiki la erarojn, esperante, ke la aŭtoroj utiligos la kritikojn. Sed plenan efikon ni atingos nur, korektante manuskriptojn antaŭ presiĝo. Jen prezentiĝas tiaj konvenaj okazoj: la libroserio, kies eldonadon projektis F.L.E. en kunlaboro kun S.A.T., aperos kontrolata de „Literatura Komitato”.

Oni ne miskomprenu tiun fakton! Ni ne havas troan sinfidon, do ne kuraĝas aserti, ke verko, kontrolita de la komitato, aperos tute senripoĉa. Unue, eĉ la plej ekzaktan kontrolon povas trapasi eraretoj. Kaj due, oni komprenu, ke nepre ne estas nia tasko ligi la personajn opiniojn de iu aŭtoro aŭ tradukinto. Iasence ni eĉ ŝatas tiajn personajn konceptojn, eĉ se ili kontraŭas niajn proprajn. Nur se iu formo estas kontraŭregula aŭ mallogika, ni rekomendas ŝanĝon. Koncize: nian taskon ni plenumas kiom eble plej ekzakte, sed ankaŭ kiom eble plej libérale koncerne aliies opiniojn.

Laŭ tiu liberala koncepto ni rigardu ankaŭ ĉi tiun tradukon, en kiu kelkfoje estas aplikitaj gramatikaj formoj ne ĝenerale uzataj, sed bazitaj, laŭ persona prefero de l'tradukinto, sur nepra logiko. Specialan malfacilon en la tradukado de tiu ĉi verko prezentis la fakto, ke la verko konsistas pligrandparte el leteroj skribitaj ofte en la plej malfacilaj kaj senkomfortaj

cirkonstancoj, pro kio la stilo ne ĉiuloke estas tiom glata kiom ĝenerale en verkoj de la sama aŭtoro.

Aparta rimarkindaĵo de l'Esperanta traduko estas, ke ĝi enhavas kelkajn ĉapitrojn (i.a. Unua majtago ĉe la fronto, Retaguardia, Oazo, Feliz), kiuj ne aperis en la originala nederlanda eldono, sed estas rekte tradukitaj el neeldonitaj manuskriptoj de l'aŭtoro.

Uzo de kelkaj neologismoj ne troviĝantaj en „Plena Vortaro” montriĝis preferinda super rigidaj kunmetaĵoj. Ĉi sube ili sekvas kun klarigoj:

- aerodromo* = tereno instalita por for- kaj alveturo de aviadiloj.
- bestiala* = sovaĝinstinkta, krude bestaĉa.
- bizara* = strangefekta; malharmonie originala.
- danteska* = laŭ maniero de Dante, simila al Dante.
- ekspresionisma (o)* = arta skolo klopodanta esprimi impresojn kaj sentojn per simplaj kaj trafaj rimedoj.
- flako* = neprofunda marĉeto aŭ surstrata kaveto pleniĝinta per pluvakvo.
- frazeologio* = rezonmaniero en belsonaj, sed ĝenerale malmultsignifaj frazoj.
- geŭzo* = ano de nederlanda partio malamika al la hispana reĝo, en la okdekjara milito.
- gregoria* = religia muziko, stilo, kalendaro k.t.p. laŭ papoj Gregoro Ia kaj Gregoro XIIIa.
- hiliasma (o)* = religia kredo pri miljara regno de paco kaj feliĉo post reveno de Kristo surteren.
- hiliasto* = adepto de l'hiliasmo aŭ homo havanta similajn fantaziajn ideojn.

- ĵaluzio* = kurtensimila sunŝirmilo konsistanta el horizontalaj latoj,
- kareo* = unurada ŝarĝveturileto.
- kario* = dentputro.
- majusklo* = granda komenclitero.
- mentaleco* = mensa stato.
- mitralo* = maŝinpafilo similanta malgrandan kanonon.
- ne-intervencio (a)* = kontrakto inter eŭropaj ŝtatoj celanta ne miksi sin en la hispanan internan militon.
- onanismo* = kontraŭnatura seksa kutimo.
- plebiscito* = popola decido farata per rekta ĝenerala voĉdono.
- ravino* = interroka terfendo, profunda intermonta valo.
- romanesko* = iom troigita romaneca fantazio.
- sadista* = psike malsana emo al turmentado.
- solario* = sanatorio kun speciala aranĝo, laŭ kiu ĝiaj ĉambroj estas turneblaj al la suno.
- stahaŭnovismo* = laborsistemo en Sovetio, laŭ kiu laboristoj per pliintensigo de la produktopovo vivas en pli favoraj kondiĉoj kaj cirkonstancoj (nomita laŭ la iniciatinto Stachanov).
- stahaŭnovisto* = laboristo vivanta en pli bonaj cirkonstancoj pro la stahaŭnovismo.
- taŭromaĥio* = historio, arto kaj teĥniko de hispanaj taŭrobatalaj ludoj,
- tirajlora (o)* = maniero (dise larĝigita) de batalordo; soldato en tirajlora linio.

Traduko de hispanaj voroj, ne tradukitaj en la teksto!


<i>alegria</i>	= ĝojo.
<i>alvarez</i>	= vicleŭtenanto.
<i>attention!</i>	= atenton!
<i>ay, los ricos de aqui, mucho,</i>	= ho, la tiamaj riĉuloj, tre
<i>malo!</i>	= malbone!
<i>bodega</i>	= vinkelo.
<i>compaxero</i>	= kamarado.
<i>dinamiteros</i>	= dinamitjetistoj.
<i>flamenco</i>	= kanto, ario.
<i>flamengos</i>	= kantoj, arioj.
<i>frente de l'estacion de Goya</i>	= fronto de la stacidomo de Goya.
<i>gratis</i>	= malgrava.
<i>guardia civil</i>	= ĝendarmo.
<i>hijos del pueblo</i>	= filoj de l'vilaĝo (aŭ de l'po- polo).
<i>hijos de puta</i>	= filoj de malĉastulino.
<i>izquierda derecha, up arrow,</i>	= male-dekstre, unu-du!
<i>un dos!</i>	
<i>junta de defensa</i>	= konsilantaro de defendo.
<i>la cosecha es sagrada</i>	= la rikolto estas sankta.
<i>los esclavos el triumf alcan-</i>	= la sklavoĵ kantos sian trium-
<i>taran!</i>	fan kanton.
<i>madre</i>	= patrino.
<i>milicano de l'cultura</i>	= milicano de la kulturo.
<i>norra</i>	= puto kun akvorado.
<i>no tirad! vamos á canatar!</i>	= ne pafu! ni kantu!
<i>novia</i>	= fianĉino.
<i>novio</i>	= fianĉo.
<i>nuestra</i>	= nia.
<i>pajaro negro</i>	= nigra birdo.

<i>patio</i>	= korto.
<i>perdido!</i>	= perditaj!
<i>pero! propio! igual! igual!</i>	= kontentige bona! ĝi similas! ĝi similas!
<i>por la causa</i>	= por la intereso.
<i>posada</i>	= gastejo.
<i>pozo</i>	= puto.
<i>que Eulogio canta</i>	= ke E. kantul!
<i>refresco</i>	= refreŝiga trinkaĵo.
<i>retaguardia</i>	= postgvardio.
<i>salud</i>	= sanon! bonfarton!
<i>suerte</i>	= evidente: benon.
<i>todos los proletarios del mundo son hermanos!</i>	= ĉiuj proletoj de l'mondo estas fratoj.
<i>teniente</i>	= leŭtenanto.

Menciende estas ankoraŭ, ke en ĉi tiu verko la nomoj de urboj, vilaĝoj, riveroj kaj montoj neniuloke estas esperantigitaj. Ankaŭ la ortografio de la personaj nomoj ne estas ŝanĝita, escepte de la nomo Ĉang Kaj Ĉek, kies originalo devus esti skribata ankaŭ per aliaj signoj.

Fine ni esprimas nian dankon al K-dino E. Faulhaber-Ĉiŝkovska, kiu, kiel ne-nederlandlingvano, bonvolis kontrole tralegi la manuskripton, kaj al K-do W. Slotegraaf, kiu afable disponigis sian scion pri la hispana lingvo per la tradukado de diversaj hispanaj vortoj, netradukitaj de la aŭtoro.

Literatura Komitato F.L.E.









BRINKMAN PROD. NR. B



04 16 612